

Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo

Fremdlingvo-instruado

kiel

publika politiko

François GRIN
Profesoro, Universitato de Ĝenevo
Vicedirektoro, SRED

N° 19
Septembro 2005

Raporto verkita je la peto de
la Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo.

**Raporto verkita je la peto de
la Alta Konsilio pri Taksado de la
Instrusistemo**

Direktoro de la eldono: Christian
FORESTIER

Ĝenerala sekretario: 61-65, sr.Dutot
75015 – PARIZO
Tel : 01 55 55 77 41
Retpoŝto: hcee@education.gouv.fr

ISSN pretigata
Koncepto kaj presado : DPMA C7

Enhavo

| | |
|---|----|
| Averto | 3 |
| Sintezo kaj rekomendoj | 5 |
| ĈAPITRO 1 : ENKONDUKO | 9 |
| 1.1 Objekto kaj limigoj de la studo..... | 9 |
| 1.2 Tri ĉefdimensioj de la defioj..... | 14 |
| 1.3 Strukturo de studo..... | 16 |
| ĈAPITRO 2 : LINGVA POLITIKO, PUBLIKA POLITIKO KAJ FREMDAJ LINGVOJ | 19 |
| 2.1. Kio estas lingva politiko ? | 19 |
| 2.2. Ekonomiaj teorioj pri la lingva valoro kaj lingvaj kompetentoj. | 23 |
| 2.3. Diverseco kaj optimumeco | 27 |
| 2.4. Atribuo kaj distribuo..... | 29 |
| ĈAPITRO 3 RENDIMENTO DE LINGVAJ KOMPETENTECOJ | 32 |
| 3.1 Aplikeblo de teorio pri homa kapitalo | 32 |
| 3.2 Privataj rendimentoj | 33 |
| 3.3 Sociaj rendimentoj | 38 |
| 3.4 Limoj de esplormaniero kaj problemoj por poste | 40 |
| ĈAPITRO 4 ENTREPRENOJ KAJ FREMDAJ LINGVOJ | 46 |
| 4.1 Lingvo kaj ekonomiaj aktivecoj en entreprenoj | 46 |
| 4.2 Esploroj ĉe entreprenoj..... | 50 |
| ĈAPITRO 5 LINGVODINAMIKO | 53 |
| 5.1 Kial zorgi pri lingvodinamiko?..... | 53 |
| 5.2 Retefikoj kaj ties konsidero | 57 |
| 5.3 Komunikado, uzebleco kaj minimumo-maksimigo | 61 |
| 5.4 Lingvodinamiko kaj mastrumado de diverseco..... | 65 |

| | |
|---|-----|
| <u>ĈAPITRO 6 TRI SCENARIOJ</u> | 71 |
| 6.1 Komparprincipo inter scenaroj | 71 |
| 6.2 Lingvaj ĉirkaŭaĵoj | 72 |
| 6.3 Profitoj | 74 |
| 6.4 Instrupolitiko kaj iliaj kostoj | 79 |
| 6.5 Mezuro de transpgoj | 82 |
| 6.6 Kompara bilanco..... | 93 |
| <u>ĈAPITRO 7 KIAJ STRATEGIOJ ?</u> | 98 |
| 7.1 Longtempa strategio..... | 98 |
| 7.2 Malongtempa strategio..... | 102 |
| 7.3 Ĝenerala konkludo..... | 105 |
| <u>REFERENCOJ</u> | 107 |
| ANEKSOJ..... | 119 |
| <u>Annexe A1</u> : Lingvaj kompetentoj de la eŭropanoj... .. | 119 |
| A1.1 : La angla kiel fremda lingvo, laŭ lando ka lingva kategorio | 119 |
| A1.2 : La angla kiel fremda lingvo laŭ profesio | 120 |
| <u>Annexe A2</u> : Lingvaj reĝimoj por Eŭropa Unio | 122 |
| <u>Annexe A3</u> : Kvantoj kaj horaj kontribuoj por la instruado de fremdaj lingvoj en la franca eduka sistemo | 125 |

Averto

Ĉi tiu studo ekprovas pensigi, en kelkaj paĝoj, pri la lernado de fremdaj lingvoj, emfazante la ofte malatentitajn aspektojn de la problemaro. Ne temas pri pedagogio, pri taksado de lernakiro aŭ pri organizado de la instrusistemo; kaj kvankam la temo de fremdlingva instruado en specifa lando, ĉikaze en Francio, estas pritraktita laŭ eŭropeca perspektivo, oni provos nek kompari la instrumanierojn en diversaj landoj, nek kulture aŭ socie analizi la multlingvismon en Eŭropo, nek priskribi la juran aŭ institucian kadron pri tiu temo. Fakte, tiaj studoj grandparte jam ekzistas. Kio, kontraŭe, ankoraŭ ŝajnas manki, estas analizo de la interesoj, bazita sur analizo de politikoj : kiujn fremdajn lingvojn instrui, kial, kaj en kiuj situacioj? Tiuj estas la demandoj kiujn la nuna studo pritraktas, apogante sin sur la lingvoekonomio kaj sur la taksado de lingvaj politikoj. La demandoj estas kompleksaj kaj ilia pritrakto, pro tio ke ĝi apartiĝas de la kutimaj esplormanieroj, sendube prezentas esploran karakteron. La rilatitaj interesoj certe meritis pli fundan kaj longdaŭran esploron ol kion eblis plenumi ene de la templimoj de la mandato donita de la Alta Konsilio pri la taksado de la instrusistemo. Sekve, bonvolu konsideri la jenan raporton kiel nuran ĉirkaŭpromenon. Ĝi provos sinteze taksii la rilatitajn interesojn, apogante sin sur teoria instrumentaro, kiu parte ankoraŭ pluevoluas, kaj sur kelkaj ciferoj arigitaj tiuokaze, kaj kiuj nur celas doni ideon pri proksimumaj grandecoj.

Mi tamen esperas ke tiu esploro povos utile kontribui al la plilarĝigo de la diskuto pri la interesoj, kies ekonomia, politika kaj kultura gravecoj ne povas esti mistaksitaj. Kvankam la jena studo rezultas de individua laboro, ĝi profitis el interŝanĝoj kun pluraj kolegoj pri la temo de lingvoj en Eŭropo, kaj pri la problemoj de efikeco kaj justeco kiujn tio malkovras. Ĉar tiu studo baziĝas sur longdaŭra pensado, diskutoj kaj interŝanĝoj ankaŭ nutris ĝin dum jaroj. Mi do insistas rimarkigi mian intelektan ŝuldon al miaj kolegoj, nome Philippe van Parijs kaj François Vaillancourt. Aldone, ĉi lastan, same kiel sinjoron Gilles Falquet, mi dankas pro iliaj tre utilaj komentoj kaj sugestoj pri la sesa ĉapitro. Pluraj kolegoj signalis al mi, aŭ tute trafe, atentigis min pri interesaj referencoj, kaj mi ci tie estas dankema al Detlev Blanke kaj Robert Phillipson. Fine, mi dankas Michele Gazzola kaj Julien Chevillard por ilia valora kaj efika helpo dum esplorado.

FG, Genevo, 12a de septembro 2005

Sintezo kaj rekomendoj.

Ĉi tiu raporto ekstraktas la problemaron de instruado de fremdaj lingvoj kiel formo de publika politiko. Laŭ tiu vidpunkto, tiu instruado estas instrumento de lingva politiko kiu troviĝas je pli ĝenerala nivelo. Ĉi tie, la ĉefaj demandoj ne temas pri pedagogio aŭ organizado; anstataŭe, temas pri kiujn fremdajn lingvojn instrui, kaj pro kiuj motivoj. Oni do flankenlasas la kutimajn klopodojn, kiuj baziĝas sur pedagogiaj, juraj, politikaj, historiaj aŭ soci-lingvistikaj konsideroj. La uzo de integrita esplormaniero pri la fremdlingva instruado, laŭ modelo de «analizo de politikoj», estas nova ekprovo. Pro tio, la nuna studo havas esploran karakteron, kaj la taksadoj kiujn ĝi disponigas en ĉapitro 6, neniam estis publikigitaj.

Lingvo-ekonomio kaj taksado de lingvaj politikoj estas fakoj plej esencaj por ekstudi tiun problemaron. Samtempe, la analizo devas apogi sin sur konceptoj disvolvitaj en aliaj fakoj, nome soci-lingvistiko, juro kaj normiga politika teorio.

Sekve, la eblaj lingvaj politikoj (kun siaj konsekvencoj pri lingvo-instruado) povas esti komparataj laŭ atribuo kaj distribuo de rimedoj, alivorte, laŭ efikeco kaj justeco. Ĉar lingvo ĉieas en homaj aktivecoj, indas substreki ke la termino "efikeco" devas esti pli vaste komprenita, enkalkulante ne nur komercajn valorojn, sed ankaŭ nekomercajn.

Konsiderante ke konvenaj informoj raras kaj (ĝenerale) analizo-kampoj diversas, la argumentaro favore al instruado de ajna lingvo ofte limiĝas al la aldonaj monprofitoj, kiuj rezultas de regado de tiu lingvo. Kvankam ne sufiĉa, tiu esplormaniero tamen necesas kaj ĝi partoprenas al pli vasta pritrakto. Ankaŭ raras informoj kiuj permesas taksati, helpe de ekvacioj pri profito, la valoron de *fremdlingvaj* kompetentoj, eĉ ene de Eŭropo. La svisaj statistikoj montras ke la individuaj profitoj kiuj rezultas de kompetentoj pri la angla, estas tre altaj, sed tio ankaŭ veras por la franca aŭ la germana, lernitaj kiel dua lingvo. La komparo de tiuj statistikoj al la elspezoj por instruado de tiuj lingvoj, ebligas kalkuli la netan profiton por la socio. La svisaj statistikoj montras ke tiuj altaj profitoj kompareblas al la profitoj de financaj investaĵoj. Tamen, tiaj rezultoj ne sufiĉas por difini politikon pri lernado de fremdaj lingvoj, ne nur ĉar informoj mankas, sed ankaŭ ĉar ili ne permesas

prognozi la evoluon de tiuj profitoj. Efektive, estas kredeble ke ju pli lingvaj kompetentoj banaliĝos, des pli la profitoj donitaj pro kono de la angla malaltiĝos.

La informoj, kiujn oni disponas pri la manieroj mone valorigi fremdlingvajn kompetentecojn ene de entreprenoj, relative malmultas, kaj ĉefe, estas malprecizegaj; la kaŭzo de tio eble estas, ke manke de analiza referenco-kadro, la lokaj enketoj arigas informojn sen ajna difinita celo. Nuntempe, eĉ se iuj ciferoj liveras iom da aldonaj utilaj informoj pri la uzo aŭ valorigo de la lingvaj kompetentecoj en entreprenoj, tio ne permesas difini la celojn kaj la prioritatojn de politiko pri instruado de fremdaj lingvoj.

La analizo ne povas limiĝi al serĉado de tiuj celoj kaj prioritatoj en certaj cirkonstancoj, ĉar la orientiĝoj de eduko-politiko daŭre ŝanĝas la kadron kie la diversaj fremdaj lingvoj montriĝas pli malpli utilaj. Sekve, ne eblas kontentige pritrakti la problemon kaj proponi rekomendojn, sen alfronti la malfacilan temon de la lingvo-dinamiko. Malgraŭ la fakto ke ĝenerala teorio pri lingvo-dinamiko ne ekzistas hodiaŭ, tamen ekzistas pri tio gravaj elementoj en faka literaturo. Bedaŭrinde, tiuj verkoj ofte estas ege teknikaj kaj abstraktaj, ekzemple pro uzado de ludoteorio. Por klarigi la procezon de lingvo-dinamiko, oni povas uzi simplan kaj efikan modelon, kiu kombinas du agpovojn (« uzebleco » kaj « minimaksimigo »). Tiu modelo antaŭvidas, en la nuna eŭropa kunteksto, rapidigitan konverĝon al lingva hegemonio de la angla. Tamen, tia evoluo montriĝas malefika pri atribuo de rimedoj, maljusta pri distribuo de rimedoj, danĝera por lingva kaj kultura diverseco, kaj zorgiga pro ĝiaj geopolitikaj sekvoj. Necesas do, ekzameni alternativojn al tia scenaro.

Tri scenaroj estos analizitaj: la « tutangla » (scenaro 1) ; la « multlingvisma » (scenaro 2) ; kaj « Esperanto » (scenaro 3). Tiuj tri scenaroj kompreneble povus esti objekto de pli detala analizo, kaj esti kombinitaj kadre de strategia esplormaniero de la lingva politiko. La emfazo ne situas sur la konsekvencoj de la efektivigo de tiuj scenaroj, sed sur ilia komparo laŭ efikeco kaj egalrajteco. Pro la noveco de la analizo-kadro kaj la manko de taŭgaj informoj, la taksado povas esti nur proksimuma kaj nur celas disponigi gradojn de grandeco; laŭ mia opinio, tio tamen estas la unua fojo kiam oni provas kalkuli la netajn transpagojn kiujn la anglalingvaj landoj profitas pro la supero de la angla, kompare al la ŝparoj pro la elekto de alia scenaro. Memkompreneble, ne la angla lingvo

mem kulpas, sed la lingva hegemonio, sen konsidero al lando aŭ grupo de landoj kiuj profitas el ĝi. La ĉefaj rezultoj de la komparo inter tiuj scenaroj jenas:

- 1) Britio enspezas nete almenaŭ 10 miliardojn da eŭroj jare, pro nuna domino de la angla;
- 2) se oni konsideras la multobligan efikon de certaj komponantoj de tiu sumo, kaj la rendimenton de la kapitalo kiun la anglalingvaj landoj povas investi aliloke, pro la privilegia pozicio de sia lingvo, tiu sumo atingas 17 ĝis 18 miliardojn da eŭroj jare;
- 3) tiu sumo sendube estus pli alta, se la hegemonio de tiu lingvo plifortiĝus pro la prioritato kiun aliaj ŝtatoj konsentus doni ĝin, interalie en la kadro de siaj respektivaj edukpolitikoj.
- 4) tiu sumo ne enkalkulas diversajn simbolajn efikojn (kiel la avantaĝo kiun ĝuas la denaskaj parolantoj de hegemonia lingvo dum ajna situacio de intertraktado aŭ konflikto okazanta en ilia lingvo); verdire, tiuj simbolaj efikoj eble havas ankaŭ materialajn kaj financajn konsekvencojn.
- 5) la «multlingvisma» scenaro (kiu, praktike, povas alpreni tre malsimilajn formojn, inter kiuj unu estas analizita ĉi tie) ne malpliigas la kostojn, sed la malekvilibro inter lingvouzantoj; tamen, pro la rolantaj fortoj pri lingva dinamiko, ĝi prezentas iun riskon de malstabileco, kaj postulas tutan aron da akompanantaj aranĝoj por esti vivipova..
- 6) la scenaro « Esperanto » montriĝas plej avantaĝa, ĉar ĝi okazigos netan ŝparon, por Francio, de almenaŭ 5,4 miliardojn da eŭroj jare, kaj nete, por la tuta EU (inkluzive de Britio kaj Irlando), de ĉirkaŭ 25 miliardojn da eŭroj jare.

La oftaj rifuzreagoj kontraŭ esperanto malebligas la scenaron 3 ene de mallonga templimo. Aliflanke, oni povas rekomendi ĝin, en kadro de longdaŭra strategio, kiun oni povas efektiviĝi ene de unu generacio. Du kondiĉoj tamen nepras por ĝia sukceso: unue grandega informkampanjo, por venki la antaŭjuĝojn pri tiu lingvo — kiuj ĝenerale baziĝas sur simpla ignoro — kaj helpi la evoluon de la pensmaniero; due, vera interŝtata kunordigado por la komuna efektivigo de tia scenaro. Okdek kvin procentoj de la loĝantaro de la EU-25 akiras tujan kaj evidentan profiton el tio, eĉ sen konsideri la riskojn politikajn kaj kulturajn kaŭzajn pro lingva hegemonio.

En mallonga aŭ meze longa templimo, la scenaro 2, t.e. tiu de « plurlingvismo » estas preferinda, nur ĉar ĝi ĝuas pli grandan politikan akcepton.

Se ĝi ne estas malpli kosta, koncerne rektajn kostojn, ol la nuna solvo aŭ ol tiu de scenaro 1 («tutangla»), ĝi konsiderinde malaltigas la maljustajn transpagojn kiuj estas konsekvenco de la 1-a scenaro. Aldone, tio eble estas scenaro kiu akordiĝas al la ideo de EU konstruita sur la diverseco de lingvoj kaj kulturoj, kion oni ofte aŭdas en paroloj de komunumaj oficialuloj. Tiu 2-a scenaro tamen entenas riskojn malstabiliĝi kaj erodi favore al la angla, kio donas argumenton favore al la 3-a scenaro. Tamen, se la akompanaj aranĝoj povas daŭre garantii multlingvismon, la dua scenaro povas esti longtempa strategio.

Ĉapitro 1

Enkonduko

1.1 Objekto kaj limigoj de la studo.

La temo de instruado de fremdaj lingvoj kaŭzas gravajn zorgojn al ĉiuj eŭropaj instrusistemoj. La kampo de fremdaj lingvoj (kiel kampo aparta de aliaj fakoj instruitaj en tiuj sistemoj) akiras pli da graveco kaj agnosko (Beacco kaj Byram, 2003 ; Raasch, 2002 ; Haskell, 2002), kio ankaŭ vidiĝas en eldonoj de la Eŭridico-programo de la Eŭropa Unio (Eŭropa Komisiono 2000, 2001) kaj en la fakto ke freŝdata Eŭrobarometro-raporto enfokusiĝis sur la kompetentecojn pri fremdaj lingvoj kaj ilia lernado (INRA, 2001). Tia evoluo plifortigas tendencon kiu jam de longe ĉeestis en kelkaj landoj kaj fiksiĝis en iliaj historiaj cirkonstancoj; por aliaj landoj, temas pri pli fundamenta ŝanĝo, kiun oni povas interpreti kiel konsekvencon de grandskalaj mutacioj sociaj, politikaj kaj kulturaj.

Ĉar instrupolitiko pri fremdaj lingvoj dependas de la kompetento de la ministerioj pri edukado (de naciaj ministroj aŭ dependaj de regionaj aŭtoritatoj, eble foje lokaj, laŭ la strukturo de la koncerna ŝtato), ĝi estas ofte influata - tute normale - de la kutimaj zorgoj de tiuj ministerioj. Por ili, la ĉefa problemo tradicie estas: kiel funkciigi lernejon plej glate. Sekve, la instruado de fremdaj lingvoj estas perceptataj el vidpunkto de interna efiko : ĉar la ĝeneralaj celoj estas jam difinitaj aliloke, oni provos determini la kondiĉojn, kiuj garantias plej efikan instruadon de fremdaj lingvoj, ekzemple pri la nivelo de kompetenteco, kiun akiras la lernantoj de la instruataj lingvoj.

Tiu zorgo troviĝas en freŝdata kompara studo pri kompetentecoj pri la angla de lernantoj de ok eŭropaj landoj (Bonnet kaj al., 2004). En tiu studo, ĉefrolas mezurado de la kompetentecoj per testo kaj memtaksado. La lernantoj estis ja invititaj klarigi la

avantaĝojn, kiujn donas la regadon de la angla, kio alproksimigas nin al la problemaro pri la motivoj kiujn oni povus havi por investi en instruado de tiu lingvo; tamen, tiu temo tenas en tiu studo nur etan rolon (Bonnet kaj al., 2004 : 90-932) kaj la problemoj pri ĝenerala politiko («Kiujn lingvojn lerni? Kial?») ne estas pritraktitaj.

Pli ĝenerale, la plej gravaj zorgoj de analizoj pri la efikeco de instruado de fremdaj lingvoj, direktiĝas al eltrovo de diversaj faktoroj, aŭ psiko-lingvistikaj, aŭ socio-lingvistikaj, aŭ pedagogiaj, kiuj influas la akirojn de lernantoj, al la relativa graveco de tiuj faktoroj, kaj al la interago inter ili; speciala atento estas dediĉata al la faktoroj kiujn la edukaj aŭtoritatoj povas kontroli.

Nu, tiuj demandoj pri manieroj laŭ kiuj oni instruu fremdajn lingvojn, kvankam esencaj, ne sufiĉas en si mem; kaj la respondoj la plej trafaj kaj la plej ellaboritaj, solaj, ne povus sufiĉi por konduki politikon pri instruado de fremdaj lingvoj. Ĉar multe antaŭe la demando pri la kielo, leviĝas la prademandoj pri la *kio* kaj *kialo* : ĉikaze, kiujn fremdajn lingvojn oni instruu, al kiu, celante kiujn kaj kiajn nivelojn de kompetenteco, responde al kiuj motivoj, celante kiujn uzojn? (Ager, 2001 ; Baker, 1992 ; Hornberger, 2003). Tiaj demandoj apartenas al tio kion oni nomus, en edukekonomio, ekstera efikeco.

En analizo laŭ ekstera efiko, la rezultoj de la analizo laŭ interna efiko (precipe la kompetentoj akiritaj dank' al instrumetodo) estas traktataj kiel la fonto por alia procezo : tiu de cifrado de kompetentecoj dum aktiveco profesia aŭ alispeca (Grin, 1999a). Ne nur en la bone establita tradicio de edukekonomio, sed ankaŭ en lingvekonomio (Grin, 2003a ; Grin et Vaillancourt, 1997), oni ĝenerale atentis pri la komercaj rendimentoj de kompetentoj pri fremdaj lingvoj, t.e. pri salajraj avantaĝoj el kiuj profitas tiuj, kiuj posedas lingvajn kompetentojn je certa nivelo, kompare al tiuj kiuj ne posedas tiujn kompetentojn. Malsimilaj specoj de rendimentoj povas esti kalkulataj: privataj, sociaj, fiskaj (vidu ekz. Weber, 2003). Tiu taksmaniero permesus trafe elekti la edukinveston, kaj orientigi la aŭtoritatajn prioritatojn pri edukado de fremdaj lingvoj.

En ĉapitro 3, ni plu pritraktos la diversajn rendimentojn privatajn kaj sociajn. Tamen, ni povas dekomence rimarki, ke tiu laŭmodela analizo iom stretas, konsidere la kunludantajn faktorojn, kaj indas substreki du punktojn.

Unue, pro la fakto ke la analizo inklinas konsideri kiel nuran profiton, salajrajn diferencojn, ĝi lasas en ombro ĉiajn profitojn kiuj rezultas de fremdlingva kompetenteco: nome tiujn kiuj povas

rezulti el kontaktoj kun kulturaĵoj el iu lingva sfero, aŭ pli ĝenerale, el ĉiutagaj kontaktoj kun la parolantaro de iu lingvo. Eĉ se tiuj faktoroj nur intervenas duavice, post la salajraj avantaĝoj, se oni ne konsideras ilin, oni nur havos malkompletan bildon pri la motivaro, ambaŭkaze ĉu oni serĉas respondon por individuo, ĉu por grupo. Temas pri konata problemo, malofte pritraktata, de «nekomercaj valoroj», kaj de la graveco kiun konvenas atribui al la pritraktado de la eblecoj, kiuj devus ĉefroli, antaŭ ol oni alprenas ajnan politikan decidon (en specifa etika kaj politika situacio).

Due, transiro de individua nivelo al kolektiva (alivorte, de taksado de «privataj» rendimentoj al tiu de «sociaj» rendimentoj) limiĝas al konsidero de la mezumaj elspezoj investitaj de la socio, pere de la edusistemo, por instruado de fremdaj lingvoj. Tiuj mezumaj elspezoj, poste, estas komparataj al la mezumo de la aldonaj salajraj avantaĝoj por individuo. La punkto kiun necesas substreki ĉi tie, estas ke la implica procezo de kolektado de informoj silentas pri fundamenta karakterizo de ĉiu lingvo, nome la fakto ke ĝi permesas aparteni al reto de parolantoj. La «reto» kiun konsistigas ĉiu lingvo-komunumo (ambaŭkaze ĉu la lingvo estas gepatra, ĉu fremda) kreas kompleksajn rilatojn inter la konduto dum lernado, kaj la valoro de la kompetentoj tiel akiritaj. Alivorte, la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj estas fenomenoj, kiujn oni praktike ne povas kompreni sen konsideri la *eksterajn retefikojn*. (vidu sekcion 5.2)

Tiu retefiko havas gravan konsekvencon : tio, kio pravigas la instruadon de iu lingvo (aŭ male, la malvolon okupiĝi pri ĝia instruado), estas aro da konsideroj kiuj dependas de multe pli larĝa kunteksto socia, kultura kaj geopolitika. La intenco ĉi tie ne estas invoki iun historian aŭ kulturalan pravigon — eĉ se tiaj konsideroj estas nepre bezonataj por difini politikon, krome tiu punkto estis ĵus tuŝita, rilate la «nekomercajn» valorojn. Anstataŭe, la intenco estas ekkonsciiĝi, ke la publika politika kunteksto estas ankaŭ rezulto de tiu politiko. Oni ne subtaksu la gravecon de tiu demando por instruado de fremdaj lingvoj; tamen ĝi estas ofte ignorata, kaj mirigas konstati, ke lingvo-instruado estas kampo en kiu la gravaj decidoj estas ofte prenataj sen konsidero al vortigo, kaj eĉ malplie, al komparo inter la elekteblecoj (Kaplan et Baldauf, 1997 ; Phillipson, 2003).

Tiel, la Raporto de la Komisiono de la *debato pri la estonteco de la instrusistemo* (Thélot, 2004 : 54) rekomendas la instruadon de tio kion ĝi nomas «la angla de internacia komunikado». Oni povus supozi ke tiu rekomendo estis bazita sur decidigaj argumentoj — ekzemple, la percepto ke la angla estas

socia postulo de la lernantoj kaj iliaj gepatroj, aŭ ke la angla lingvo estas dominanta je internacia nivelo kaj *sekve*, lernenda. Nu tiaj argumentoj dependas de kunteksto kaj mem interagas kun ĝi, en tio ke tiu forta socia demando kaj tiu geopolitika domino ne estas *sendependaj* de la strategiaj elektoj faritaj de la edukaj aŭtoritatoj, en Francio aŭ aliloke. Sekve, analizante tiujn elektojn, oni ne povas preterlasi kritikan ekzamenon de la kunteksto en kiu ili estas farataj, nek de ilia kapableco ŝanĝi tiun kuntekston, kio povas konduki al rekonsidero de tiuj samaj elektoj. Tio postulas prilumi la fortojn kiuj agas en lingvo-dinamiko, kaj pri tio plej gravas analizi la kapablecon formi reton de parolantoj, karakterizo tiom tipa por lingvo.

Oni bone komprenas, pro tiuj diversaj motivoj, kial la taksado de politiko pri fremdlingva instruado ne povas kontentiĝi je konsidero pri interna efikeco – kaj tio, eĉ validas se tiuj konsideroj, kun ellaso de la didaktikaj aspektoj, plilarĝiĝas al ekzamenado de la organizaj kondiĉoj de la sistemo, kaj ankaŭ se tiuj konsidroj respondas al jena demando: kiel funkciigi klasojn kaj lernejojn ene de la sistemo. Tial konvenas meti la analizon de politikoj pri instruado de fremdaj lingvoj, sur la nivelo de *lingvopolitiko*, poste, duavice, reekzameni la edukajn aspektojn laŭ ties angulo; laŭ tiu vidpunkto, edukpolitiko estas *instrumento* de lingvopolitiko.

Tio do, estas la vidpunkto prenita en la nuna studo. Alivorte, en la sekvaj paĝoj, tute ne temos pri interna efikeco. Krom la fakto ke tiu lasta jam estis amplekse pritraktita de teoria literaturo (Ellis, 1994 ; Singleton et Ryan, 2004), de priskribaj notoj (Dickson et Cumming, 1996), kaj de diversaj empiriaj studoj (inter kiuj la kompara studo de Bonnet kaj aliaj jam menciita), kiuj jam liveras vastan korpuson de rezultoj, ĉiu pluprofundigo postulos, aŭ tre avangardan kaj sendube tre sektorecan laboron bazitan sur la samaj informoj, aŭ novan kolektadon de informoj; ambaŭ strategioj multe superus la amplekson de la nuna raporto. Sekve, ni apenaŭ okupiĝos, en la nuna studo, pri tio, kio okazas en lernejoj aŭ klasoj, en Francio aŭ aliloke, dum kursoj de la angla, germana aŭ hispana. Ni preparolos nek didaktikon, nek pedagogion, nek organizadon de eduksistemoj. Kvankam multaj demandoj ja postrestas pri tiu kampo, rilate la instruadon de fremdaj lingvoj, kaj estus tute pravigite plustudi cele al la plibonigado de interna efikeco, ni decidis por tiu ĉi studo, nur okupiĝi pri la temo de ekstera efikeco, kaj pri la kadro-kondiĉoj kiuj determinas tiun eksteran efikecon. Al ni, tiuj demandoj ŝajnas almenaŭ same gravaj, kvankam ili ofte restas en mallumo, aŭ estas supozataj jam esti fintraktitaj.

Oni ĉi tie emfazas la eksteran efikecon, do la kuntekston, kiu povas decidigi la edukaŭtoritatojn difini iun celobjekton pri fremdlingvo-instruado, kaj tio igos nin atribui apartan gravecon al la eŭropa kunteksto. Tamen en la sekvaj paĝoj oni ne trovos priskribadon de multlingvismo en Eŭropo, ĉu en la eduksistemoj mem, ĉu en la agmanieroj de la eŭropaj institucioj. Tiaj priskribadoj, ofte elstaraj, jam ekzistas (Assemblée nationale, 2003), same kiel politikaj konsideroj (Marí kaj Strubell, 2002) aŭ juraj (de Witte, 2004 ; Nic Shuibhne, 2004a), kaj permesas prijuĝi tiujn agmanierojn; pro tio, ne utilas refari la samon. Sed pli esence, la esplormaniero kiun ili uzas, ne sufiĉos por evidenti certajn mekanismojn, kiuj gravas por vortigi proponojn por politiko pri fremdlingvoinstruado, kaj ni atentus ĝuste pri tio antaŭ ĉio: pri analizo de tiaj mekanismoj.

Oni ankaŭ rezignos, en la nuna studo, pri ĉiu ĝenerala diskuto pri multlingvismo en Eŭropo, pri estiĝanta eŭropa identeco kaj ties rilatitaj grandaj kulturaj kaj sociaj faktoroj. Analizo de tiuj rilatoj estas necesa, sed malfacila, kaj foje diluiĝas en ĝeneralaĵojn. Aliflanke evidentiĝas, ke des malpli utilas dediĉi tempon al tio, ju pli vastas la literaturo pri la temo (Coulmas, 1991 ; Smith kaj Wright, 1999 ; Hagege, 2000 ; Ammon, 2001 ; Gubbins kaj Holt, 2002 ; Kraus, 2004 ; ktp.).

Fine, konvenas substreki ke la sekvaj paĝoj celas nek inventari, nek resumi la diversajn verkojn pri ekstera efikeco de la fremdlingva instruado. Efektive, miascie ne ekzistas publikaĵoj kiuj klare pritraktas la temon, kaj kiuj provas prezenti ĝeneralan analizon, argumentitan laŭ la vidpunkto de publika politiko, pri la elekto de instruindaj fremdaj lingvoj, kaj la esploristoj raras en tiu kampo. Tio estas la motivo kial ĉi tiu raporto ne komenciĝas per la kutima recenzo de la verkaro, sed tuj malkovras diversajn analitikajn dimensiojn de la problemo, referencante en tiuj diversaj partoj de la raporto, al taŭgaj verkoj. Oni konstato ke je ĉiu etapo, la raporto ĉerpas el diversaj fakaj kampoj (nome lingvo-ekonomio, socilingvistiko kaj normigapolitika teorio). Samtempe, la nuna raporto provas prezenti kompletan pritrakton de la temo, kombinante la kontribuojn de tiuj diversaj verkoj el originala vidpunkto. Pro tio, la nuna studo havas esploran karakteron, kiu tamen nepre necesas pro du motivoj: unue, por kohere prezenti la problemon, sen limiĝi al tro sektoraj esplormanieroj, kiuj ne permesas koncepti ĝin laŭ ĝia komplekseco; due, por provi ekzameni kelkajn proponojn vere argumentitajn, pri la temo – la elekto de la Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko fremdaj lingvoj kiujn oni instruos – pri kiu oni asertas multe

fremdaj lingvoj kiujn oni instruos – pri kiu oni asertas multe en politikaj debatoj kaj amasmedioj, sed ofte sen bona pravigo.

1.2 Tri ŝlosilaj dimensioj de la problemaro.

La konsiderindaj aspektoj de la fremdlingva instruado devas esti metataj en la perspektivo de tri fundamentaj tendencoj, interalie kiam temas pri studo direktita al la specifa kazo de Francio. Sen klopodi detale pridiskuti ilin, mi opinias utile, priparoli ilin, ĉar ili nuancas la iradon de la analizo.

Unue, la instruado de fremdaj lingvoj aperas kiel neĉirkaŭirebla elemento de ĉies klerigado. Dum tio de longe estis memkomprenebla en landoj kiuj taksas sin plurlingvaj (ekzemple Luksemburgio, Svislando, Finnlando), aŭ en landoj kies nacia lingvo estas konsiderata malgranda je la internacia nivelo (ekzemple Danlando, Svedio, Norvegio, Nederlando, Malto, Ĉeĥio, Baltaj landoj, ktp), tio estas nova sperto por landoj kiel Francio, Germanio aŭ Hispanujo, kies lingvoj estas kalkulataj inter la «grandaj». Oni povas havi la tendencon atribui tiun evoluon al la konstruado de Eŭropo, reference interalie al dokumentoj eldonitaj de Eŭropa Unio kiel la *Blanka Libro* (1995), kiuj prezentas Eŭropon kiel socio fondita sur la kono, aŭ la strategio, devenanta de la *Lisbona Deklaracio* (2000), kio samas al atribui ŝlosilan rolon al komunikado, kaj *pro tio mem*, al lingvoj. Oni ankaŭ mencias multnombrajn politikajn deklarojn de la eŭropa Parlamento pri la graveco de multlingvismo [1] (Podestà, 2001 ; Marí kaj Strubell, 2002 ; Nic Shuibhne, 2005) aŭ al projektoj pli enfokusigitaj kiel la *Agoplano* de la eŭropa Komisiono pri lingvo-instruado (Eŭropa Komisiono, 2004). Tamen tiu konsekvenco de la eŭropa konstruado plejeble nur konsistigas flankan kaŭzon: eĉ se multaj deklaroj tiudirekten havas nur simbolan karakteron (Ives, 2004), la alveno antaŭscene de la problemo pri fremdaj lingvoj pli ĝuste estas konsekvenco de tutmondiĝo aŭ de certgrada tutmondiĝo. Ĉiukaze, la problemo de la instruado de fremdaj lingvoj povas esti nek neglektata, nek flanken metata el espero ke ĝi perdos urĝecon. Tute male, urĝas, kaj kiel mi provis montri en la paragrafo 1.1, esplormaniero nur centrata pri la eduksciencoj ne povas sufiĉi por akcepti la defion.

Due, akceliĝas la procezo de tutmondiĝo, pri kiu oni povas kredi ke ĝi, pli ol io ajn, fundamente modifas la problemon pri la instruado de fremdaj lingvoj. Sed por

¹. Vidu interalie la retejon Internet Europa Diversa : http://www.europadiversa.org/eng/docs_oficials.html.

doni bonan kalkulon/klarigon pri la fenomeno, utilas distingi du ĝiajn aspektojn. Unuflanke, ekzistas supraĵaj procezoj, nome la monda integriĝado de socioj, kun ĉio kion tio signifas, kiel la disvastiĝado tra la mondo — eble la altrudo al la mondo — de certaj kulturaj modeloj, de certaj vivkutimoj, de certaj lingvoj. Tiun procezon oni ĝenerale nomas «tutmondiĝo» aŭ samsignife en la angla « globalisation » (Wolton, 2003). Samtempe, oni povas distingi fundamentan transformiĝon, nome la enradikiĝon de logiko propra al modernismo, kun kiel finrezulto, la procezo de individuigo kaj la postulo pri persona aŭtonomio, kiu karakterizas tiun transformiĝon. Tiu fenomeno akompanas la tutmondiĝon, kaj tial oni povas paroli, citante neologismon de Rossiaud (1997) pri *moNdernigo*. Sekve, «la akceliĝo» pri kiu temas ĉi tie, fakte referencas pli fundamentan evoluon ol simple integradon de socioj kaj tutmondan disvastiĝon de certaj konsumadomodeloj. En la kampo de klerigado kaj de fremdaj lingvoj, tio implicas ke ĉiu politiko devas konsideri, pli ol antaŭe, la motivaron de individuoj, kaj akordi kun certaj postuloj, nome agnoski «la *aŭtonomecon*» de la partoprenantoj dum iliaj elektoj, ankaŭ kiam temas pri akiro de fremdaj lingvoj kie elemento de manifestiĝo de ilia individueco kaj kolektiveco. Tio veras, eĉ se la kreadoprocezo de personaj motivadoj aŭ celoj treege povas esti influata de manipulado, tiom komerca, kiom ankaŭ ideologia. Tamen necesas enkalkuli ambaŭ aspektojn cititajn, ĉar tiu konsidero, kiel ĉiu alia, pravigos ajnan politikon pri linvoinstruado, al la civitanoj.

Trie, la strategioj pli energiaj pri lingvoj (ĉar tiuj klare koncernas la lingvopolitikon, kaj pro tio situas sur la kampo konvena al nia pritrakto), kiujn ĝis nun Francio aplikis en la kadro de la francparolantaro (Conseil de la langue française, 1999 ; Favre d'Echallens, 2004), estas alĝustigataj ekde iom pli ol deko da jaroj.[2] Kiel rimarkigas Claude Hagège; «oni ekkonsciiĝas ke la defendo de la franca fare de la francparolantaro aŭ de la franclingvula klubo, ne nur limiĝas al la defendo de la franca, sed de modelo minacata de senkulturiĝo pro la monda disvastiĝo de la angla» (Hagège, in Bourdieu kaj al., 2001 : 57) [3]. Oni devas tiri ĉiujn konsekvencojn de tiu alĝustigo kaj apliki ilin al la franca politiko pri instruado de fremdaj lingvoj. Pli precize, evidentiĝas ke la defendo de la franca lingvo, kaj la retoriko kiu ĉirkaŭas la problemaron,

-
2. Unu grava evento estas la « kunveno de la kvar Konsilioj » (Francio, Kebekio, franca Komonumo de Belgio, romanda Svislando) kiu okazis en Kebeko en Novembro 1994.
 3. Ankaŭ vidu la intervjuon de Abdou Diouf, ĝenerala Sekretario de internacia Organizon de la franca parolantaro: «Ni batalas kontraŭ unusola lingvo», en *Le Figaro littéraire*, 18a de Marto 2004, p. 10.

ne plu utilas kiel spino sur kiu artikiĝus lingvopolitiko, nek des pli prave, kiel politiko pri instruado de fremdaj lingvoj. Nuntempe, oni konsentas ke la defendo de la franca lingvo havas sencon, kaj estas efektivebla, nur en la kadro de la defendado de la lingva kaj kultura diverseco. Oni tiel alvenas al ideo kiun oni povis jam subkompreni en la paragrafo 1.1, nome ke lingvopolitiko povas nur esti politiko kiu zorgas pri diverseco (Grin, 1999b, 2003b). Tiu ĝenerala principo ankaŭ manifestiĝas en la franclingvula kunteksto. Diskurso pri politiko pri fremdlingvo-instruado ne havas sencon, se ĝi ne estus fiksita en politiko de pritrakto de la diverseco. La konsidero de diverseco kiel organiza koncepto de la lingvopolitiko havas rektajn konsekvencojn por la difino de instrupolitiko pri lingvoj kaj por la taksado de diversaj scenaroj.

1.3 Strukturo de la studo.

Post konsidero de la antaŭo la nuna studo estas organizita ĉirkaŭ nocioj de diverseco kaj de lingvopolitiko. Tial la raporto estas strukturita jene:

La dua ĉapitro priskribas la lingvopolitikon kiel ĝeneralan politikon, kaj klarigas la koncepton de lingva valoro kiel kriterion por preni decidojn pri instruado de fremdaj lingvoj. Ĝi evidentiĝas la nociojn de atribuado kaj de distribuado de rimedoj por tiel taksati edukpolitikojn pri lingvoj.

La tria ĉapitro pritraktas la individuajn instigojn kaj strategiojn pri akirado de fremdaj lingvoj, kiuj principe pravigas, je la plej fundamenta nivelo, la elektojn kaj prioritatojn pri lingvoinstruado. Ĝi provas montri la motivadon de la agantoj pro ilia propra profito kaj prezentas diversajn rezultojn pri la rendimentoj «privataj-komercaj» de la lingvaj kompetentoj, kaj poste transiras al la sociaj rendimentoj. Oni vidas ke la informoj necesaj por tiu speco de taksado raras, sed ti kie ili disponeblas, ili indikas ke la angla posedas, kiel fremda lingvo, altan komercan profiton, tiel je la privata nivelo, kiel je la socia.

La kvara ĉapitro ekstraktas la problemon de la bezonoj de entreprenoj pri lingvokompetento ĉe iliaj dungitoj; teorie oni devus konstati konverĝon inter la prioritatoj sur kiuj baziĝas la elektoj de individuoj, kaj la prioritatoj de entreprenoj; kaj la ekzameno de la uzmanieroj kaj de la procezoj de valorigado, ene de entreprenoj, de la kompetentoj pri fremdaj lingvoj, devus esti informriĉaj, ĉar tie okazas tiu interesa kreado de valoro, almenaŭ kiom koncernas komercan valoron. Ni tamen vidas ke la empiriaj bazoj pri kiuj oni disponas, restas relative krudaj,

pro manko de analiza kadro kiu permesus identigi la gravajn pridemandojn; koncerne la entreprenojn mem, la rezultoj de la disponeblaj esploroj indikas, ke ili ĝenerale ne disponas pri bone ellaboritan ideon pri siaj propraj bezonoj, kaj ofte kontentiĝas gurdadi la samajn rekantojn pri la graveco de la angla kiel «negoco-lingvo», «internacia lingvo», ktp.

La kvina ĉapitro eble estas la plej grava por tiu ĉi studo, pro tio ke ĝi celas klarigi kial la logiko rilate la homan kapitalon, fakte sufiĉe simpla, estas malsufiĉega por difini politikon pri instruado de fremdaj lingvoj. Efektive, ĉiu aktiveco koncerne instruadon kaj lernadon, devas esti metita en la kuntekston de la lingvodinamiko, kaj tiu ĉi ĉapitro estas dediĉita al tio. La mekanismoj de tiu dinamiko estas kompleksaj, kaj oni ĉi-momente ne jam disponas pri kompleta teorio, kiu klarigas tiun dinamikon. Elirante de kelkaj verkoj de la literaturo pri lingvoekonomiko kaj prijuĝado de lingvopolitikoj, ni tamen provos proponi sintezan modelon, kiu permesos konsideri la ĉefajn agantajn fortojn kaj kompreni la demografiajn kaj lingvajn konsekvencojn, kiujn povas konduki, pro la ekzisto de tiuj agantaj fortoj mem, al diversaj elektoj de politiko pri instruado de fremdaj lingvoj.

La sesa ĉapitro celas apliki al la kazo de Eŭropo la konceptojn priskribitajn en la antaŭaj ĉapitroj. Efektive, estus sencece pritrakti iun ajn landon sen referenco al internacia kadro. Ĝi analizas tri scenarojn kaj identigas la diversajn konsekvencojn koncerne atributado kaj distribuado. Tio permesos al ni montri ne nur la oportunojn, sed ankaŭ la riskojn rilatitajn al diversaj scenaroj, inkluzive tiun proponitan en la *Raporto de la Komisiono de la nacia debato pri la estonteco de la Instrusistemo*. La komparo inter la scenaroj montras, ke la ebla kunordigado, inter la membroŝtatoj de Eŭropa Unio, de la politikoj pri instruado de fremdaj lingvoj, povas produkti rekomendojn kiuj malsamas, foje multe, de tiuj kiujn oni ofte aŭdas.

La sepa ĉapitro provos dedukti el la analizo ĝeneralajn konkludojn je diversaj niveloj. Unue, ĝi provas malkovri kelkajn gvidliniojn por poste esprimi rekomendojn pri ĝenerala politiko de mastrumado de diverseco kaj pri la rezultanta politiko pri fremdlingvoinstruado. Oni konsideru tiujn rekomendojn kiel nurajn eblecojn, kaj oni nepre distingu inter la diversaj orientiĝoj pri politiko de instruado de fremdaj lingvoj, kontrastigante unuflanke proksiman kaj malproksiman tempohorizonton, kaj aliflanke la politikojn «kun» aŭ «sen» kunordigado inter ŝtatoj, specife je la eŭropa nivelo. Oni analizas la konsekvencojn de tiuj rekomendoj helpe de du ĉefaj strategioj, kiuj povas, memkompreneble, esti kombinitaj en pli kompleksan strategion.

Ĉi tiu raporto celas starigi la problemon de instruado de fremdaj lingvoj, komencante distingi, inter la diversaj scenaroj *aprior*e konsiderindaj, tiujn kiuj estas relative dezirindaj kaj kiuj ne. Kiam scenaro, ŝajne pli probabla, montriĝas relative malmulte dezirinda, la evidenta demando fareda tiam estas: : « Ĉu tio estas neevitebla? ». Tiu ĉi raporto, esplorante la politikon pri instruado de fremdaj lingvoj laŭ tiu vidpunkto, volas proponi analizon kiu diferencas de tiuj, kiujn oni plej ofte trovas, kaj volas kontribui al la unua ĝenerala orientiĝo pri la ekzistantaj demandoj. Ĝi sekve ne pretendas prezenti kompletajn kaj tuj aplikeblajn solvojn. Tamen, se ĝi utilas, eĉ nur malmulte, por progresigi komprenon de la instruado de fremdaj lingvoj kiel publika politiko kaj ĉefe faciligi la ekkonscion pri la komplekseco de la rilatitaj interesoj, ĝi estos atinginta sian ĉefan celon.

ĈAPITRO 2

LINGVA POLITIKO, PUBLIKA POLITIKO KAJ FREMDAJ LINGVOJ

2.1. Kio estas lingva politiko ?

«Lingva politiko», aŭ «lingva planado», estas la kampo de teoria kaj empiria esploro kiu plej rekte baraktas kun la demandoj starigitaj dum difino de politiko pri lingvinstruo. Antaŭ ol komenci, ni avertos ke en la sekvantaj paĝoj, ni ne faros precizan diferencon inter lingva *politiko* kaj lingva *planado*, ĉar la distingo inter tiuj du terminoj ne estas konstanta en la literaturo [4]. Eĉ se la plimulto de aŭtoroj pri franclingva socilingvistiko emas preferi unu aŭ la alian el la terminoj, la distingo inter la du ne ĉiam estas la sama laŭ la aŭtoroj (Maurais, 1987 ; Calvet, 1987, 1996) ; ekzistas kebeka prefero por planado (france: *aménagement*), sed ĝi ne estas rigora. Same, la anglalingva socilingvistiko parolas pri lingva politiko (*language policy*) kaj pri lingva planado (*language planning*) (Jermudd, 1983, 2001 ; Schiffman, 1996 ; Kaplan kaj Baldauf, 1997 ; Ricento, 2006), tamen ne klare diferencigante ilin. [5]. Dume, en la lastaj jaroj, la termino politiko (*politique*) kaj planado (*policy*) staras pli ofte sur la antaŭscenejo, precipe kiam temas, kiel en ĉi-tiu studo, pri la gravaj orientiĝoj de la publika politiko kun la necesa komparo de la alternativoj, kiun tiu orientiĝo implicas. Tamen, eĉ se la terminoj *aménagement* kaj *planning* ŝajne estas ofte rezervitaj por aferoj, kelkfoje iom teknikaj, rilatitaj al plenumado de pli ĝeneralaj orientiĝoj, kiuj dependas de la lingva politiko, la distingo ne estas absoluta [6].

4. La literaturo proponas ankaŭ la terminon «glotpolitiko», malofte uzatan, kiun ni ankaŭ ne uzos ĉi-tie.

5. Ekzemple, estus preskaŭ neeble kategoriigi la revuojn *Language Policy*, *Current Issues in Language Planning*, kaj *Language Problems and Language Planning* surbaze de la temoj, kiujn ili pritraktas.

6. Tiamaniere, la *Revue d'aménagement linguistique* (Revuo pri lingva planado), publikigata en Kebekio, pritraktas amplekse politikajn kaj instituciajn aspektojn, kiuj klare temas pri tio, kion mi nomas ĉi-tie «lingva politiko»

Eble ne estas senutile rememorigi ĉi-tie la signifon donitan al la vorto «politiko» : ĝi respondas al la sama koncepto kiel la angla *policy*, kontraŭe al la angla *politics*. Eĉ se tiu diferencigo ne estas tute preciza – kaj eĉ se oni povas citi kelkajn kontraŭajn ekzemplojn – estas tamen klare, ke, kiam oni parolas pri *politics*, ĝenerale temas pri tio kion oni nomas, france, *faire de la politique* (politiki: agi kiel politikisto). Tio-ĉi referencas la konfrontadon de interesoj kaj de valoroj en iu socia kaj institucia kunteksto. Kontraŭe, kiam oni parolas pri 'policy', oni supozas, ke la politika debato jam finfinis certan nombron da principoj, kaj ke la demando staras pri la aranĝoj plej bone ebligantaj ilian efektivigon. Ĉe tiu etapo ekstaras la problemo de la komparo inter la argumentoj favoraj aŭ malfavoraj al la diversaj ĉeestantaj opcioj, kaj ĉe tiu nivelo, laŭ la bezonoj de tiu studo, ni situigas la lingvan politikon.

Ĉu la lingva politiko tial resumiĝas en banalan analizon de kostoj-profitoj (AKP) ? Verŝajne ne, konsidere ke AKP ĝenerale rilatas al projektoj, kies sekvoj estas pli precizaj ol kiam temas pri lingvoj ; la tradicia AKP ĝenerale nur identigas kaj enkalkulas sekvojn sufiĉe rekte mezureblajn, kaj poste el ĉi-tiuj ĝi deduktas netan valoron por ĉiu ebla scenaro ; tiam la alprenota scenaro estas tiu, kiu prezentas la plej altan netan valoron (Dum, 1994). En lingva politiko, male, oni ne povas eviti kompari tre kompleksajn elementojn de prijuĝado, kiuj estas malfacile, aŭ praktike ne mezureblaj : ĉar lingvo estas ne nur komunikilo, sed ankaŭ vehiklo de kulturo, historio kaj identeco, estas memkompreneble ke konsiderindas simbolaj aspektoj, kiuj foje povas esti plej gravaj. Ĉu tio malvalidigas ĉiun pritrakton de la lingva politiko kiu prijuĝu la avantaĝojn kaj malavantaĝojn ? Certe ne, ĉar la identigo kaj, kiom eble, la mezurado de tiuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj estas unu el la kondiĉoj de demokratia debato. Tamen tiuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj estu komprenataj laŭ sia plej ampleksa signifo, por ne banaliĝi kiel valoroj tiel nomataj «merkataj» (vidu sekciojn 2.2 kaj 2.3) ; ankaŭ nepras enkalkuli la aspekton de efikeco, sed ankaŭ de justeco, kaj tiucele nepras enmeti en la analizon la distribuajn konsekvencojn de ĉi scenaro (vidu sekciojn 2.4). Mallonge, temas pri pritrakto de publika politiko, kiu entenas larĝgaskalan gamon de elementoj konsiderindaj dum la komparado de konkurencaj scenaroj. [7]

7 Tiu strebo identigi kaj mezuri la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la eblaj opcioj estas kelkfoje kritikata kiel «materialigema» aŭ «reduktema» ; la riproĉo facilas, des pli ke ankaŭ la riproĉantoj de tiu «reduktismo» ne mankas la okazon antaŭenigi rekomendojn, kaj faras tion surbaze de komparo, ne ĉiam eksplicita, de la argumentoj por aŭ kontraŭ. Necesas do fari tiun komparon kun tiom da homogeneco kaj travideblo kiel eblas.

Sekve, la ambicio de ĉia analizo de lingva politiko (do en la signifo de *polita analizo*) ne celas anstataŭigi la publikan debaton aŭ malgravigi aŭ senefikigi la politikajn dimensiojn (en la signifo de *politiko*) kiuj vole-nevole akompanas lingvopolitikon. Tute male, la rolo de tia lingva politiko, kia ĝi estas ĉi-tie priskribita, estas servi la politikan debaton, prilumante la konsekvencojn de la konsiderataj elekteblecoj. Eblas situigi tiujn diversajn terminojn, unu rilate al la aliaj, helpe de la jena diagramo:

FIG. 1 : LINGVAJ POLITIKO KAJ PLANADO.



La literaturo ofte diferencigas, kiel proponis Kloss (1969), inter planado de la *statuso* kaj planado de la *korpuso*. Tiulastkaze temas pri interveno en la lingvon mem : alpreno de alfabeto, reformo de ortografio, disvolvado de neologismoj, ktp... [8]. Ĉi-tiu studo pritraktos nenion el tio : ĝi foriros el la principo ke, eĉ se lingvo ne estas por ĉiam fiksita sed evoluas, ne necesas interveni sur tiu kampo. Ĉiukaze, la laborado pri lingva korpuso estas malofte farata por si mem ; ĝi plej ofte estas ilo por interveni pri la statuso, kiu finfine estas ja la temo de ĉi-tiu raporto.

La koncepto de «statuso» povas esti interpretata diversmaniere. Historie, la literaturo difinis la statuson en juraj terminoj (Cooper, 1989) : ĉu tiu aŭ alia lingvo estas oficiala? Se jes, ĉu tiu statuso de oficialeco validas por ĉiuj ŝtataj agadoj aŭ nur por kelkaj ? Nuntempe la termino «statuso» estas ĝenerale komprenata laŭ sia plej ampleksa signifo : ĝi difinas la aspektojn, ne nur jurajn kaj instituciajn, sed, pli amplekse, politikajn, ekonomiajn kaj sociajn de la pozicio de iu lingvo *rilate al iu alia*. [9] Eblas do diri, ke la lingva politiko

8. La vorto « korpuso » estas do ĉi-tie uzata ne en sia kutima signifo en aplikita lingvistiko, en kiu ĝi rilatas ĝenerale al aro da observoj pri lingvaj realigoj.

9. Tiu evoluo povas esti interpretita kiel respiegulo de la graveco de regionaj kaj minoritataj lingvoj en la disvolviĝo de la lingva politiko kiel fako. Ekzemple, la rimarkinda efikeco de la kataluna lingvopolitiko, kaj la seriozeco de la esplorado, sur kiu ĝi apogiĝas (Direccio General de Política Lingüística, 1997, 1999), fiksiĝas en integrita vidmaniero de la kataluna statuso rilate al la kastilia lingvo; ĝi materialigiĝas en la koncepton de '*normalització*', aŭ «normaligo», kiun Vallverdù (1979) devenigas de meze de la sesdekaj jaroj. Ĝi pensigas tute ne pri lingva *normo*, sed pri tio ke la uzo de la kataluna lingvo reĝu, ne nur kiel lingvo de la registaro de la "Generalitat" kaj de ĝia administracio, sed ankaŭ en ĉiuj kampoj de la ekonomia kaj socia vivo.

finfine celas modifi nian *lingvan ĉirkaŭaĵon* laŭ direkto supozeble dezirata (Grin, 2003c).

La pozicio de lingvo rilate al alia, kompreneble dependas de interagado de tre diversaj agantoj : ne nur de ŝtatoj, sed ankaŭ de entreprenoj, de asocia sektoro, kaj lastvice de individuoj mem. Tial ni povas paroli pri «lingva politiko» de grandaj entreprenoj, kaj tiu esprimo troveblas en franclingva literaturo. Tamen gravas taŭge diferencigi la agantojn, ĉar ne ĉiuj havas la samajn celojn. Tiel tute eblas, ke iu entrepreno havas prilingvan *strategion* (ekzemple iu multnacia entrepreno kiu, kvankam franca, dekretas la anglan interna komuniklingvo), sed tiukaze ĝi agas cele al ekonomia profito. Kontraŭe, *publika* politiko, inkluzive kiam ĝi koncernas lingvon, supozeble celas komunan bonon. Kaj cetere ĝuste tie troviĝas ĝia malfacileco : oni komparu la diversajn scenarojn laŭ iliaj konsekvencoj pri tiu komuna bono.

Krome la *lingva ĉirkaŭaĵo* entenas la klasikajn karakterizojn de kolektivaj varoj kaj servoj, nome la « nekonkurenceco pri konsumo » kaj « malebleco pri ekskludo ». Tiuj karakterizoj videble similigas lingvan ĉirkaŭaĵon al natura ĉirkaŭaĵo, kaj do la principoj de publika politiko aplikeblaj al la unua, aplikeblas al la dua. Pli precize, la libera ludo de merkataj fortoj certe malsukcesos garantii la socie plej dezirindan lingvan ĉirkaŭaĵon, pro la samaj motivoj, ke tiu ludo ne povas garantii plej taŭgan nivelon de «produkado» sen malutili al la kvalito de la vivmedio. Sekve necesas ŝtata interveno en la lingva ĉirkaŭaĵo, precize laŭ ekonomia logiko. Ni ne eniros en diskuton pri la formoj de « merkata fiasko », kiuj pravigas pritraktadon de la lingva ĉirkaŭaĵo kiel formo de publika varo (Grin, 2003a), sed ni reparolos, ĉe la 5-a ĉapitro, pri neceso de interveno de publikaj komunumoj.

Ni krome precizigu, ke tiu studo intence evitas ian ajn referencon al nocio de «bona politiko», aŭ al alia simila nocio, ofte popularigata per angla etikedo kiel «good practice» aŭ «best practice». Kvankam ili furoras en literaturo kiu fontas el organizaĵoj, en kiuj oni prijuĝas publikajn politikojn, kiel inter multaj aliaj la Organizo por Eŭropa Kunlaborado kaj Evoluigado (france: OCDE) aŭ la Organizo por Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo (france: OSCE) por nur mencii tiujn du, tiuj esprimoj referencas al ofte malpreciza kolekto de dezirindaj karakterizoj. Finfine ili ĉiuj resumiĝas al efika atribuo kaj justa distribuo de rimedoj, tiel materialaj, kiel simbolaj.

Lingva politiko do povas difiniĝi tiel : «*strebo sistema , racia, kaj bazita sur teoria analizo, [kiu] situas ĉe la nivelo de la socio, kaj kiu celas solvi la problemojn pri lingvo, por pliigi la bonstaton. Ĝi estas kutime kondukata de la aŭtoritatoj aŭ de iliaj komisiitoj, kaj ĝi koncernas parton aŭ tuton de la loĝantaro dependa de ilia jurisdikcio*» (Grin, 2002 : 19).

2.2. Ekonomiaj teorioj pri lingva valoro kaj lingvaj kompetentoj.

Okaze de la plimulto de la politikaj debatoj pri lingvinstruado, prezentiĝas iumomente la demando pri «valoro de lingvo». La rilato kun instruado de la lingvoj estas rekta: ju pli iu lingvo «valoras», des pli da motivoj por enigi ĝin en la instruprogramon ; finfine, plejeble sub tiu logiko kategorias la freŝdataj rekomendoj devige instrui la anglan en Francio. Tamen, la koncepto pri «valoro» aplikata por lingvo devas esti prudente uzata ; krom tio ke ĝi ofte utilas por kaŝi konfuziĝon, konscie aŭ ne, ĝi estas ankaŭ uzata por pravigi rekomendojn tute kontraŭajn.

Referenco al la valoro de iu lingvo kuniras kun karakterizado de ĉi-tiu kiel «trezoro», formo de riĉeco, ktp...; kaj kompreneble tiu karakterizado povas aplikiĝi al ajna lingvo senescepte. Certe tiuj deklaroj estas nur simplaj retorikaĵoj ; kelkaj aŭtoroj ŝajne konsideras memkomprenebla la fakton, ke la lingvoj havas valoron, kaj sekve opinias evidenta la fakto ke lingvoj valoras *laŭ la ekonomia signifo de la termino*. Ne estas tiel laŭ neceso por ĉiu lingvo, aŭ ĉiukaze ne laŭ sama signifo, kaj sekve la nocio de «valoro» de lingvo estu detale klarigota. [10]

Ne eblas prezenti ĉi-tie la ekonomiajn konceptojn de valoro kaj iliajn konsekvencojn por la lingvinstruado, kaj oni nur evidentigos diversajn formojn de valoro. Ni konsideru unue la problemon laŭ la vidpunkto de individuo. Distingo, iom mencieta en la antaŭa ĉapitro, estu farita inter la valoroj «merkataj» kaj «ne-merkataj». La merkatajn valorojn spegulas la prezoj aŭ samspeca indikilo. Ni ekzemple supozu, ke por iu produktanto paroli la lingvon X faciligas vendadon de produktaĵoj al la Xe-parolanta publiko kaj sekve ebligas realigon de pli altaj profitoj ; laŭ alia ekzemplo ni imagu, ke iu salajrulo Xe-parolanta, pli multe gajnas, ĉar li scipovas la lingvon X, dum samas ĉiuj ceteraj elementoj. Ambaŭkaze, la lingvo X posedas *merkatan* valoron. La takso de la

10. Necesas dekomence flankenmeti analogiojn inter «lingvo» kaj «mono», kiuj fontas el metaforado kaj kiuj apenaŭ kontraŭstaras analizadon. Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko

rendimento, kiun ni priesploros en la sekcio 3.2, precize celas raporti pri tiu merkata valoro.

Tamen ankaŭ ekzistas *ne-merkata* valoro. Ekzemple, kono de la lingvo *X* ebligas aliron al la *X*-lingva kulturo, faciligas la sociajn kontaktojn kun membroj de la *X*-lingva komunumo, ktp.... Tiu valoro ĝenerale ne troviĝas en la prezoj, sed iuj individuoj aprezos ĝin, se plaĉas al ili interrilati kun la *X*-lingvaj kulturo kaj komunumo. Tiu argumento povas esti ĝeneraligita de iu specifa lingvo (*X*) al la lingva *diverseco* ; la lingva diverseco posedas ne-merkatan valoron por la personoj, kiuj atribuas valoron al la diverseco en sia lingva ĉirkaŭaĵo, same kiel ili atribuas valoron al ia kvalito de sia (natura) ĉirkaŭaĵo. Miascie ekzistas neniu sistema mezurado de la ne-merkata valoro de la kompetentoj pri fremdaj lingvoj ; ni tamen vidos en sekcio 3.2, kiujn spurojn sekvi por eble permesi tian mezuradon.

La merkata aŭ ne-merkata valoro de lingvo *X* por certa individuo povas parte klarigi la fakton, ke ĝi elektas lerni aŭ ne la lingvon *X* kaj konsentas aŭ ne, ke la ŝtato uzu impostojn por la instruado de tiu lingvo. Tamen necesas rezoni plue por analizi la elektojn je la socia nivelo, kaj por alfronti la demandojn pri orientiĝo de la politiko pri lingvinstruo.

Ĝis ĉi tie la merkata valoro kaj la ne-merkata valoro estas priskribitaj el «individua» vidpunkto. Laŭ socia vidpunkto la diferencigo inter «merkata» kaj «ne-merkata» taŭgas, sed la socia valoro diferencas de la individua valoro kaj bezonas propran taksadon. La plimulto el la ekonomikistoj interkonsentas, ke eblas taksati sociajn valorojn per *sumigo* de privataj valoroj. Pro tio ke tiuj privataj valoroj estas nur malofte taksataj (kaze de merkataj valoroj) aŭ neniam taksataj (kaze de ne-merkataj valoroj), malmultas la provoj de tiuj sumigadoj; sed, manke tion, oni ŝajne konsentas, ĝenerale, ke tiu sumigado resumiĝas al simpla adicio. Tial la sumo de la privataj merkataj valoroj por ĉiuj membroj de iu konsiderata socio donus la socian merkatan valoron, dum la sumado de la privataj ne-merkataj valoroj donus la socian ne-merkatan valoron. Do, la valoro de lingvo *X*, aŭ de specifa lingva ĉirkaŭaĵo, difinita interalie per la situo de la lingvo *X* en tiu ĉirkaŭaĵo, egalas la sumon de la socia merkata valoro kaj de la socia ne-merkata valoro. Se la lingvo *X* estas iu fremda lingvo, kiu interesas nin nur kiel lernfako, la principo restas sama : la sumo de la privataj merkataj valoroj, por ĉiuj membroj de la socio, donus la socian merkatan valoron — kaj same pri la ne-merkata valoro. La ĉi-suba tabelo 1 resumas tiun aliron.

TABELO 1 : KONSISTIGILOJ DE LA VALORO

| | | |
|---------------|--------|---------|
| | Privée | Sociale |
| Marchande | A | C |
| Non marchande | B | D |

En tiu tabelo, «A» reprezentas la privatan merkatan valoron, «B» la privatan ne-merkatan valoron, «C» la socian merkatan valoron, kaj «D» la socian ne-merkatan valoron. La totala socia valoro SV egalas do al C+D. Por iu socio, konsistanta el N individuoj ($1, 2, \dots, i, \dots, N$), en kiu la individua merkata valoro de la lingvo X aŭ de iu difinita lingva ĉirkaŭaĵo - estas mv_i kaj la ne-merkata valoro estas nmv_i , la totala socia valoro SV estas :

$$SV = \sum_{i=1}^N mv_i + nmv_i$$

Simpla regulo dedukteblas el tiu maniero formuli la elektojn pri lingva politiko : la politiko, kiu devus esti elektota kaj efektivigota, ĉiuj aliaj elementoj restante egalaj, estas tiu kiu maksimumigas SV, *minus* la kostoj respondantaj al tiu politiko; ĉar la politiko alprenita surbaze de tiu kriterio estas tiu, el kiu oni povas esperi la plej altan bonstaton. El tiu ĝenerala principo rezultas kelkaj konsekvencoj por la instruado de fremdaj lingvoj, kaj la rilata politiko devas kontentigi la samajn kriteriojn.

Tiu procedo donas kadron por kompari diversajn scenarojn kaj fari elektojn ; malgraŭ ke ĝi ne estas perfekta, oni tamen povas per ĝi klarigi la partoprenantajn scenarojn kaj la publikan debaton pri la temo, ĉar plej ofte oni ne praktikas tion. El tiu vidpunkto, la simpla rekono de la fakto, ke ekzistas pluraj formoj de valoro, ne estas sen utileco. Tamen ĝi starigas ankaŭ diversajn konceptajn kaj praktikajn problemojn.

Unue, la simpla sumado ne estas taŭga modo de kunigado, kiel pruvas simpla ekzemplo. Se iu persono h lernas la lingvon X (ekzemple ĉar ĝi esperas monan profiton el tiu investo), ĝi aldoniĝas al la nombro de la jamaj X -parolantoj. Tio diversmaniere influas la situacion de alia persono k . Ni supozu, ke k jam scipovas la lingvon X . Unuflanke, la fakto ke h lernis la lingvon X kreskigas la *taŭgecon* de la lingvo X , kaj do altigas la valoron de la lingvaj kompetentoj de k . Samtempe, la fakto ke sur la dungomarkato, aperas unu plia X -parolanto, povas malaltigi la salajran avantaĝon kiun la X -parolantoj profitas, kaj k povas sperti malbonigon de sia salajra situacio. Sekve la socia merkata valoro

de la instruado de la lingvo *X* al la *Xe*-neparolantoj, ne povas esti kalkulita per *sumado* de la esperataj profitoj de ĉiu ne-parolanto, nur pro la argumento ke, interalie, 1) la jamaj parolantoj povas sperti profiton aŭ malprofiton; 2) la esperataj profitoj de tiuj kiuj ne jam parolas la lingvon estos influataj de la nombro de aliaj personoj kiuj decidis lerni ĝin. Tiu fenomeno de reto, montrita en la enkonduko, ludos gravan rolon en ĉapitro 5.

Due, la elementoj de ne-merkata valoro estas teorie tre malfacile identigeblaj, kaj empirie, ili ankaŭ estas tre malfacile mezureblaj; krome ankaŭ ili verŝajne estos influataj de la ĵus priskribita fenomeno pri «ekstera efiko de reto». Tria, publika politiko principe celas transigi el iu ekzistanta lingva situacio al alia situacio, supozeble pli bona. Ĝi enhavas avantaĝojn, sed ankaŭ kostojn, kelkfoje malfacile identigeblajn, kaj ĉiukaze, malfacile takseblajn, precipe se oni konsideras la ne-merkatajn (aŭ simbolajn) kostojn, kiel konvenus, principe post konsidero de ne-merkataj profitoj.

Resume, ne eblas, ĉi momente, vere kalkuli la «valoron» de iu lingvo, la «avantaĝojn» (merkatajn aŭ ne-merkatajn) espereblajn el iu aparta politiko, kaj plejparton de la kostoj akompanantaj ĝenerale ĉian lingvan politikon kaj precipe ĉian politikon pri instruado de fremdaj lingvoj. Fakte, analizistoj malofte starigas la problemon laŭ integrita maniero, kaj ili ĝenerale esploras unu aŭ alian flankon de tiu problemo. Entute oni observas, ke :

- ◊ oni ignoras la retefikojn, ĉefe ĉar oni hipotezas ke certaj estas pozitivaj kaj aliaj negativaj, tiel ke verŝajne ili grandparte nuligas sin; ni tamen reesploras tiujn efikojn en ĉapitro 5;.
- ◊ oni akcentas la privatan merkatan valoron, ĉefe mezuritan per statistika rilato inter lingvaj kompetentoj kaj salajraj tarifoj.
- ◊ tiujn taksadojn de (averaĝaj) privataj merkataj avantaĝoj ligitaj al lingvaj kompetentoj oni ofte rilatigas al (individuopaj) averaĝaj publikaj elspezoj dediĉitaj al lingvinstruado, por kalkuli la socian merkatan valoron.
- ◊ oni preterlasas ne-merkatajn valorojn ĉefe ĉar pro manko de informoj malfacilas procedi alie. (oni tamen povus pruntepreni iajn utilajn metodojn de kalkulado el vivmedia ekonomio).

2.3. *Diverseco kaj optimumeco.*


Ni ĵus eksciis, ke, se oni deziras bazi elektojn pri lingva politiko sur ia nocio de «valoro», gravas eviti facilajn metaforojn kaj gravas analizi la problemon tiamaniere ke la komponantoj de la valoro estu identigotaj kaj mezurotaj. Nu tiu provo stumblas sur teoriajn kaj empiriajn malfacilaĵojn tiom ampleksajn, ke vera takso de la respektiva socia valoro de diversaj lingvaj ĉirkaŭaĵoj restas ne atingebla. Tio aplikiĝas ankaŭ al elektoj en politiko pri instruado de fremdaj lingvoj. Tiam, kiuj principoj postrestas por gvidi tian politikon, eĉ nur laŭ ĝeneralaj linioj ?

Pripensado pri la ĝenerala valoro de *diverseco* estas trafa elemento de taksado de elektoj pri instruado de fremdaj lingvoj, laŭmezure en kiu ĝi kontribuas al tiu diverseco; kaj eblas ĉi-rilate kalkuli ĝeneralan teorian rezulton pri la relativaj valoroj de lingvaj situacioj pli malpli diversecaj. Tiu rezulto pensigas, ke verŝajne ne estas avantaĝe por la socio lasi diversecon malaperi, nek inverse favori senliman diversecon. La argumento estas jena : diverseco prezentas avantaĝojn kaj malavantaĝojn, kiujn ni simplige nomu profitojn kaj kostojn, kaj pri kiuj estas klare, ke ili estas ne nur monaj valoroj, ĉar la ne-merkataj elementoj estas konsiderendaj.

La ĝenerala deirpunkto estas ideo, ke pli granda diverseco kreskigos avantaĝojn kaj kostojn. Sed la avantaĝoj pligrandiĝas laŭ malkreskanta grado, dum la kostoj pligrandiĝas laŭ kreskanta grado. [-piednoto 11-] Laŭ tiuj kondiĉoj, la kurboj kiuj reprezentas avantaĝojn kaj kostojn ĝenerale havas la formon montritan en figuro 2, kun optimuma nivelo de diverseco ĉe punkto d^* , kiu egalas *nek* nulon *nek* infiniton.

11. Legantoj, spertaj pri ekonomia teorio, rekonos tie la konceptojn pri malkreskanta marĝena utileco en konsumado kaj pri kreskanta marĝena kosto en produktado.

FIG. 2 : Optimuma DIVERSECO.



Kvankam ĝi aspektas ne grava, la rezulto, laŭ kiu la diverseco socie optimuma estas *pozitiva* kaj *limigita*, havas praktikajn konsekvencojn, ĉar ĝi supozigas, ke, deirante de difinita situacio, la dispozicioj celantaj ŝirmi aŭ devigi lingvan homogenon - aŭ alidire «maleston de diverseco» - estas malkonsilindaj, ĉar ili subtaksas la avantaĝojn kaj supertaksas la kostojn de diverseco. Inverse grandanimaj iniciatoj (ofte inspirataj de plenzorgigoj kiel «homaj rajtoj») favoraj al senlima lingva diverseco kaj starigo de politikoj por kompleta agnosko de ĉiuj lingvoj en la socio - inkluzive de tiuj de enmigrantaj komunumoj, eĉ malgrandaj nombre - enkaptigiĝas en la malan eraron.

Por proksimume taksavi avantaĝojn kaj kostojn, du vojoj estas preneblaj. La unua konsistas el simple fidi al la politika debato, interalie per prezentado de detalitaj elekteblecoj al la voĉdonantoj. Teorie la preferoj esprimitaj de voĉdonado spegulos la takson faritan de la voĉdonantoj pri merkataj kaj ne-merkataj avantaĝoj kaj kostoj. Kaj, eĉ se laŭplimulta voĉdono ne solvas la problemon de la eksteraj efikoj, specife de la eksteraj efikoj de retoj (kiel ni antaŭe vidis), la procezo almenaŭ prezentas iajn demokratiajn garantiojn ; eĉ se la rezultoj de laŭplimulta voĉdono ne interpreteblas kiel garantio de «optimuma» solvo, laŭsence de ekonomia teorio.

Tamen, por havi pli precizan ideon pri la ne-merkataj elementoj de iu studata valoro, teorie eblas (kvankam miascie tio ne estis provita) apliki al prilingvaj elektoj, la metodojn de taksado uzatajn en ekonomio de la vivmedio (Kahnemann kaj Kuetsch, 1992).

Principe, konsistas en demandi, kadre de enketo ĉe signifa muestro da loĝantoj, kiom ili pretus pagi (ekzemple pere de kroma imposto aŭ de ioma procento el sia nuna impostkosto), por ke la socio transiĝu de la aktuala lingva situacio al alia lingva situacio, kiun difinita politiko celus starigi. Inverse, ankaŭ eblus demandi, ĉu ili pretus pagi por politiko kiu celos *eviti* nedeziratan ŝanĝon de ilia lingva situacio. Ekzemplo de politiko konformiĝanta al la unua situacio estus masiva plialtigo de la averaĝa nivelo de fremdlingvaj kompetentoj en la loĝantaro (avantaĝo) dank'al ĝeneraligo de dulingvaj lernoklasoj en la instrusistemo. Ekzemplo de politiko konformiĝanta al la dua situacio estus plialtigo de la monhelpo favore al iu minacata lingvo, kies malapero kaŭzus nerebonigeblan perdon sen tia politiko. [-piednoto 12-]

2.4. Atribuo kaj distribuo.

Ĝis nun, la nuraj kriterioj kiujn ni pritraktis por la prijuĝado de iu ĝenerala lingva politiko, aŭ de iu politiko de instruado de fremdaj lingvoj kiel nepra elemento de tiu ĝenerala politiko, rilatis la efikecon kaj koncernis problemaron pri atribuo de rimedoj. Tamen efikeco ne estas ĉio, kaj iu ajn publika politiko estu juĝata ankaŭ laŭ justeco. Fakte, iu publika politiko neeviteble kaŭzas redistribuon de la monrimedoj kaj surscenejas la agantojn ĉu kiel gajnantojn, ĉu kiel malgajnantojn; kaj eĉ se estus nur gajnantoj, ĉiam estus diferenco inter la ege- kaj ete-gajnantoj.

La distribua efiko de la publika politiko estas ofte preterlasita, kaj tio videblas ankaŭ kaze de lingvaj politikoj. Tiu neglekto estas ĉi-okaze eble tiom pli probabla, ke la speco de redistribuo (materiala aŭ simbola), devenanta el lingvaj politikoj aŭ el politikoj de lingvinstruado, evidentiĝas nur kondiĉe ke oni devojiĝu de la kutimaj metodoj por mezuri la justecon. En la prijuĝado de instrusistemoj ĝenerale la justeco estas mezurata surbaze de distribuado de rimedoj inter agantoj aŭ grupoj de agantoj klasifikitaj laŭ diversaj indikiloj de sociekonomia statuso (enspezo, sociprofesia kategorio, ktp...). Sed tiu klasifiko ne evidente estas la plej trafa. Fakte lingva politiko (same kiel politiko de lingvinstruo) redistribuas la rimedojn laŭ la lingvaj atributoj de la agantoj.

12. Ankaŭ eblas proponi al la demandatoj ke ili taksu la tutan koston de certa lingva politiko, kaj demandi, ĉu ili konsideras tiun koston akceptebla aŭ ne. Tio implicas, ke la kostoj estis antaŭe kalkulitaj, kio plej ofte ne estas farita.

Male al religio, lingvo estas ne privatigebla, ĉar ŝtato devige uzas lingvon en la praktikado de sia povo kaj funkciado de sia administracio (Kymlicka kaj Grin, 2003). Tial, kiam multlingva lando alprenas ununuran oficialan lingvon (pretekstante ekzemple motivojn pri efikeco en sia funkciado), ĝi sekve neeviteble forĵetas la aliajn. Tiu decido neeviteble efektiviĝas malprofite al parolantoj de tiuj aliaj lingvoj. Kompreneble, en iu ŝtato, kie vivas n lingvaj komunumoj, la limigo al unu sola lingvo (ni diru : la lingvo X) el la oficialaj lingvoj, ŝparas funkciokostojn al tiu ŝtato, kio rezultas en malpliigo de la impostŝarĝo, kiun profitos ĉiuj loĝantoj. Tamen, la ŝarĝo de lerno de la oficiala lingvo refalos sur ĉiujn, kies lingvo ne estos alprenita kiel oficiala lingvo, same kun la ŝarĝo de adaptiĝo al ties normo (ekstera), ktp... Oni konstata redistribuan de la personoj kies gepatra lingvo ne estas X al la personoj, kies gepatra lingvo estas X (Pool, 1991b). *Mutatis mutandis*, similaj transiĝoj realiĝas en internacia komunikado, ekde kiam oni konsentas *hegemonistatuson* al iu lingvo (Grin, 2004 a) ; tiu kerne grava punkto estos pli funde ekzamenata en ĉapitroj 5-a kaj 6-a.

La karaktero pli malpli akceptebla de la redistribuo kaŭzata de certa publika politiko, mezureblas laŭ pli malpli severaj kriterioj. La malplej severa (sed la plej preferata en manlibroj pri ekonomio) estas la tiel nomata Pareto-kriterio, laŭ la nomo de la ekonomiisto Vilfredo Pareto (1848 - 1923). Tiu kriterio simple specifikas ke politiko, kiu redistribuas la rimedojn, konvenas kondiĉe ke profitantoj *sukcesu* kompensi perdantojn. Pool (1991 b), van Parijs (2001) kaj de Briey kun van Parijs (2002) asertas eĉ pli, modeligante la sumon de la provizendaj kompensoj, en la kunteksto de lingvaj politikoj, sen garantii ke tiu korektiga redistribuo estos *praktike efektivebla* kaj ke tiuj kompensoj estos efektive pagitaj. Fine tiu redistribuo estas submetebla al etika testo, tio estas ke ĝi ne implicu devigojn kontraŭajn al la homa digno, eĉ kiam finance kompensitaj (Arnsperger kaj van Parijs, 2003).

La temo de lingva justeco do konsistigas kernan dimension de la afero, sed ĝi daŭre restas malmultege konsiderata dum publika debato aŭ dum politika debato en la eŭropa Parlamento, eĉ se Eŭropo konsistigas kuntekston, en kiu, memkompreneble, tiuj demandoj gravegas. Parolante pri la Komisiono, oni povus preskaŭ supozi, ke ĝi intence klopodas vuali la demandon, aŭ ĉiukaze ke la komisionanoj ne ĉiam havas klaran analizon pri ĝi. [13] Teorie, la

13. Ĉi-rilate la ekskomisionano pri laboro kaj sociaj aferoj, Anna Diamantopolou, en 2001 proponis en intervjuo antaŭ la ĵurnalo *Kathimerini*, ke la angla fariĝu la oficiala dua lingvo de Greklando (<http://www.hri.org/news/greek/mpab/2001/01-11-18.mpab.html>) ; pri la intencoj de la Prodi-komisiono dum tiu sama jaro, fiaskigitaj per letero kune subskribita de la germana kaj franca ministroj pri alilandaj aferoj, Joschka Fisher kaj Hubert Védrine, vidu Phillipson (2003 : 20).

ebleco de kompenso ege plivastigas la kampon de la imageblaj politikoj, sed la problemoj kuŝas en ĝia praktika aplikeblo. Ni havas la okazon denove pritrakti tiujn demandojn en ĉapitroj 6-a kaj 7-a.

ĈAPITRO 3

LA RENDIMENTOJ DE LINGVAJ KOMPETENTOJ

3.1 Aplikebleco de la teorio pri homa kapitalo

Kiam temas pri lingvoinstruado, ŝajnas tute normala afero rezoni, almenaŭ por parto de la analizo de la elektotaĵoj, per la bone konata teorio pri la homa kapitalo (Vidu ekzemple Johnes kaj Johnes, 2004). Ni do rememorigu pri ĝiaj principoj, adaptante ilin al fremdaj lingvoj:

- ◇ lingvolernado kostas tempon kaj monon, el ambaŭ vidpunktoj, tiu de la lernantoj kaj tiu de la socio;
- ◇ la lingvaj kompetentoj de la agantoj, tamen, ebligas al ili esti pli produktivaj; do ili kreas avantaĝojn por ambaŭ, por la individuoj kaj por la socio;
- ◇ la individuoj same kiel la socio emos investi en akiradon de fremdlingvaj kompetentoj, se la rilatumo inter profito kaj kostoj estas sufiĉe alta kompare kun ceteraj eblaj investoj.

Tamen tio, kio ŝajnas sufiĉe evidenta, kiam temas pri kompetentoj kiuj, kvankam tre postulemaj, restas tre limigitaj (ni diru ekzemple, de la librotenado), tio same ne aplikiĝas al la lingvoj sen alia formo de proceso.

Tamen tio, kio ŝajnas sufiĉe evidenta, kiam temas pri kompetentoj kiuj, kvankam tre postulaj, restas tre limigitaj (ni diru ekzemple, librotenado), tio same ne simple aplikiĝas al lingvoj. La kialo de tio estas, ke lingvoj ne estas nur iloj, kaj ke eĉ kiel iloj ili estas tre multflankaj. Ili servas ne nur por efektiviĝi precizan taskon kadre de ekonomika aktiveco laŭ strikta senso; ili krome servas ekster tiu kadro kaj por ege diversaj uzoj. Aldone, lingvo estas ne nur komunikilo, ĉar ĝi rilatas al identeco. Jen punkto, pri kiu socilingvistoj prave insistas. Kaj kvankam la lingva ekonomio, al kiu apartenas la esploroj aplikantaj la teorion pri homa kapitalo al lingvoj, historie koncernis iun aŭ alian dimension, pli freŝdataj esploroj (kaj ĝenerale ek de Vaillancourt, 1980) traktas la efikon de la lingvaj atributoj de la agantoj, konsiderataj samtempe kiel elemento de homa kapitalo kaj kiel identec-markilo.

En tiuj esploroj, la identeca aspekto estas ĝenerale difinita de la gepatra aŭ unua lingvo, kaj la kompetentoj pri fremdaj aŭ duaj lingvoj estas vidataj kiel elementoj de la homa kapitalo en kiun la agantoj investas. Paroli pri lingvo kiel homa kapitalo estas do preterlasi la problemon de la lingvo kiel identigilo (kaj sekve la tutan literaturon bazitan sur la *diskriminacio* laŭ lingva aparteno) por favorigi la lingvon kiel investadon; alivorte, tio tutsamas al koncentriĝi pri fremdaj lingvoj sen zorgi pri la efiko, kiun povas havi la aparteno al iu aŭ alia lingva komunumo.

Tiu klopodo estas trafa, kondiĉe ke la elekto de la faritaj investoj malmulte aŭ tute ne havas konsekvencojn por la rendimento de la gepatra lingvo. Nu, tio ne estas la kazo je longdaŭro, tio egalas la aserton, ke la teorio pri homa kapitalo, kiu povas esti sufiĉa gvidilo por la *individuaj* decidoj pri lernado de fremdaj lingvoj, povas ne plu esti tia por *politikaj* kaj *kolektivaj* decidoj pri instruado de tiuj lingvoj. La teorio pri homa kapitalo do povas doni al ni klarigon nur utilan, sed nekompletan.

3.2 Individuaj rendimentoj.

La kalkulo de individuaj rendimentoj de fremdlingvaj kompetentoj povas baziĝi sur la minceraj ekvacioj, kutimaj ĉe taksado de edukadaj rendimentoj, laŭ la nomo de la ekonomikisto Jacob Mincer (1974). Oni ofte enkondukas ĝin elirante el la komparo de la profiloj, kiuj reprezentas la rilaton inter aĝo kaj enspezoj de personoj kiuj posedas aŭ ne tiun klerigadon. Ĉar tiu metodo estas bone konata kaj ofte uzata (Vidu ekzemple Lemelin, 1998; Psacharopoulos kaj Patrinos, 2004), ne necesas detale reekzameni ĝin.[14] Kaze de la taksado de la valoro de fremdlingva kompetento, oni “plivastigu” la minceran ekvacion per almenaŭ unu termo reprezentanta la lingvajn atributojn de la individuoj.

Elirante de la taksado de la rendimento de unu plua trejnoĵaro i kiel :

$$r_i = \frac{Y_i - Y_{i-1}}{Y_{i-1}}$$

14 Oni do preterlasos ĉiun diskuton pri la eblaj ekonometriaj profundigoj, precipe tiuj kiuj rilatas al al klasika problemo de mem-selekto, kiun endus priatenti eĉ rilate al la akiro de lingvaj kompetentoj (Chiswick kaj Miller, 1995). Ĉar tiuj profundigoj celas taksati la nivelon de la rendimentoj tiom precize kiom eblas, ili ne unuarange gravas ĉi-tie. Fakte, alĝustigo je kelkaj elcent-poentoj ne influas la demonstron kiun proponas nunan esploron.

oni povas skribi la enspezon post s jaroj de trejnado kiel :

$$Y_s = Y_0 (1 + r_1) * (1 + r_2) * \dots * (1 + r_s)$$

Tamen, por relative malaltaj valoroj de r (tio estas, en praktiko, malpli ol 10%), eblas apliki la transformadon :

$$(1 + r) \approx e^r$$

per kiu eblas reformuli :

$$Y_s = Y_0 e^{rs}$$

Uzante la naturan logaritmon de tiu ekvacio, oni obtenas esprimon facilan por ekonometria taksado :

$$\ln Y_s = \ln(Y_0 e^{rs}) = \ln Y_0 + (\ln e)rs \equiv \ln Y_0 + rs$$

Tamen, nenio malhelpas nin decidi ekde komenco, ke la enspezo dependas de ceteraj faktoroj krom trejnado. Tiel oni povas tuj multipliki la komencan esprimon Y_0 per faktoro $(1+bu)$ kie u reprezentas la tuton de tiuj diversaj faktoroj, kaj b iun nombron ebligantan kalibradon de la efiko de u je la enspezo. Laŭ la sama maniero kiel supre nun validas

$$\ln Y_s = \ln(Y_0 e^{rs} e^{bu}) = \ln Y_0 + rs + bu$$

Se la faktoro u estas simbolo por fremdlingvaj kompetentoj, eblas taksati tiun funkcion pere de la ordinara metodo de plej malgrandaj kvadratoj, kaj la taksata valoro de la parametro b indikos la rendimentojn de tiuj kompetentoj (kompare kun malesto de tiaj kompetentoj).

La ekvacio taksata laŭ la ordinara metodo de plej malgrandaj kvadratoj havos do la sekvan formon :

$$\ln Y = \alpha + \beta_1 E + \beta_2 X + \beta_3 X^2 + \beta_4 L + \beta_5 F + \varepsilon$$

kie E reprezentas trejnadon en jaroj, X la profesion sperton, same en jaroj, L la lingvajn atributojn, kies efikon pri la enspezoj oni provas taksati, kaj F reprezentas ceterajn kontrolparametrojn. [15] La parametro β_4 estos taksata en poentoj de

15 Pli ekzakte, ĉar la aplikata metodo ne uzas metodon por aktualigi la profitojn, tiuj taksadoj ne donas *rendimentojn*, sed *diferencialojn de labordevenaj enspezoj*, kiujn oni nomas “netaj” kontraste al la diferencialoj malnetaj, kiujn oni obtenus per simpla kalkulo de la averaĝa enspezo de la pridemanditaj personoj laŭ kategorio de fremdlingva kompetento.

logaritmo, sed simpla transformo ebligas konverti ĝin en elcentojn.[-piednoto -16]

Ĉi-specaj ekvacioj uziĝis por multnombraj taksadoj ĉe muestroj de enmigrintoj, ĉefe en Usono (Vidu ekz. McManus, 1985, 1990; Chiswick, 1978, 1991, 1999, 2002; Chiswick kaj Miller, 1995). Ili ĉiuj emas pravi, ke enmigrintoj en ĉi-lando havas gravan avantaĝon lerni la anglan, eĉ se la efiko malpli evidentas en “lingvaj enklavoj” (Bloom kaj Grenier, 1996). Tiaj rezultoj kompreneble estas apenaŭ surprizaj; krome ili nur limigite aplikiĝas ĉi-tie, ĉar ili celas kompetenton pri lingvo kiu certe estas “fremda” aŭ “dua” por la koncernatoj (tiuj estas enmigrintoj parolantaj la hispanan, la vjetnaman, la filipinan kaj aliajn lingvojn), sed ne el vidpunkto de la soci-ekonomia medio, en kiu ili vivas. Fakte, la koncerna lingvo, la angla, estas la domina lingvo de Usono – kaj kvankam tiu lando ne havas oficialan lingvon, kelkaj ŝtatoj ja proklamis la anglan kiel la oficialan lingvon (Crawford, 2000). Estas kompreneble tute alia demando, kiom “profitigas” la kompetento pri la angla, la germana, la rusa aŭ la eŭska al persono kiu loĝas en Francio.

Taksi la rendimenton de kompetentoj pri fremdaj lingvoj postulas informojn pri, samtempe, labordevenaj enspezoj, nivelo de kompetenteco, kriterioj pri la enspezo (principe trejnado, profesia sperto, ekonomia sektoro de aktiveco, hierarkia pozicio de la posteno, ktp.), kaj krome, kompreneble pri diversaj ceteraj socidemografiaj proprecoj ebligantaj kontroli la efikon de aliaj faktoroj. Nu, tiaj informoj ege maloftas. Niascie tiaj ne ekzistas en Francio, kaj la landoj kie ili ekzistas estas Aŭstralio, Kanado (ĉefe Kebekio), Israelo, Luksemburgio kaj Svisio [-piednoto 17-]. Tamen Kanado disponas la plej kompletajn rezultojn regule ĝisdatigitajn laŭ la informoj de sinsekvaj censoj (Vaillancourt, 1996; Lemay, 2005).

Tamen, la kanada situacio nur parte kompareblas kun tiu de Francio pro la kun-oficialeco de la angla kaj de la franca. Pro tio la tabelo 2 ilustras la individuajn rendimentojn de la kompetento pri la angla laŭ la svislandaj informoj. Tiuj rezultoj estas interesaj ĉar la informoj pri la lingvaj kompetentoj estis evidencigitaj per la tabelo por memtaksado

16 La esprimo en elcentoj t estas donata per : $t = e^{\beta} - 1$. Tamen, por praktikaj celoj, $t \approx \beta \quad \forall \beta \leq 0,1$.

17 Ekzistas ankaŭ taksadoj pri la valoro de la kompetento pri la germana por ne-germanparolantaj enmigrintoj en Germanio (Dustmann, 1994) kaj pri la rendimento de la ukraina en la labormerkato en Ukrainio (Kastoukievitch, 2003).

de la *eŭropa Portfolio pri lingvoj* (en ties 'Lingva pasporto', NdIT). *Speciala* versio de tiu tabelo estis ellaborata por la pertelefona esploro, per kiu oni kolektis la informojn.

TABELO 2
NETA ENSPEZ-DIFERENCO PRO KOMPETENTO PRI LA ANGLA,
ELCENTOJ, SVISIO 1995-1996

| | Viroj (n=1141) | Virinoj (n=803) |
|-----------------------------|-------------------|--------------------|
| Konstanto | 1505.96 | 1308.79 |
| Nivelo de klerigado (jaroj) | 4.45 | 5.83 |
| Sperto (jaroj) | 5.90 | n.s. |
| (Sperto) ² | -0.09 | n.s. |
| Bonega | 24.09 | 25.19 |
| Bona | 18.03 | 39.52 |
| Elementa | 8.93 | 18.09 |
| R ² alĝustigita | 0.360 | 0.095 |

Fonto: Grin (2000c)

Ĉiuj menciitaj koeficientoj estas signifiaj je nivelo de 99% ; n.s.: ne signifiaj

Tiu tabelo montras ekzemple, ke por viroj ege bona kompetento pri la angla rezultigas salajran plibonigon de ĉirkaŭ 24%, kompare kun tuta nekompetento pri la angla; tiu diferenco estas observebla por difinitaj niveloj de klerigado kaj jaroj de sperto. Oni vidas ke la kompetento pri la angla prezentas ege altajn rendimentojn. Kompreneble indus multe diri pri tiuj rezultoj, sed ni limigu nin al la esenco.

1) La efikoj je la salajro de lingvaj kompetentoj (inklusive la aldona jaro de klerigado) malpligrandiĝas, se oni inkludas en la ekvacion la ekonomian sektoron de aktiveco kaj la (hierarkian) pozicion en la profesio. [- piednoto 18-] Tamen, laŭgrade ke la kompetento pri la angla kontribuas al determini la profesian karieron, la fakto, ke ĝia alta koeficiento parte klariĝas

18 La rezultoj en Luksemburgio, kie la lingva kompetento estas malpli precize difinata, sed kie ege precizaj aspektoj de la profesia aktiveco estas enkalkulitaj por la taksado, montras salajran avantaĝon de proksimume 2,5% ĝis 3% por ĉiu poento de kompetento pri la angla, laŭ skalo iranta de 1 ĝis 9 (Klein, 2004). La maksimuma kompetento pri la angla donus do averaĝe, kontraste kun totala nekompetento pri tiu lingvo, enspezan diferencon de proksimume 22,5% ĝis 30%, kio kongruas kun niaj propraj rezultoj.

per tiuj karieroj (anstataŭ per enkalkulado de iu aŭ alia kriterio, observita aŭ ne, de labordevena enspezo), pravigas, ke ni plu rezonu surbaze de tiaj koeficientoj.

2) Eĉ post normigo de la klerigada nivelo kaj de la profesia sperto, la salajra profito ligita al la kompetento pri la angla restas grava: por la plej alta nivelo pri angla kompetento (nivelo "eĝe bona"), ĝi estas ĉirkaŭ 24% por viroj kaj 25% por virinoj, sed eĉ por malpli altaj kompetentaj niveloj, iom scipovi la anglan lingvon pli valoras ol tute ne scipovi ĝin: tiele bazaj kompetentoj "valoras" eĉ ĉirkaŭ 18 elcentojn da salajra profito por virinoj.

3) La rezultoj ankaŭ validas por virinoj, kio rimarkindas (ĉar en la kanadaj esploroj, la rezultoj por virinoj ofte evidentiĝas statistike ne signifikaj).

4) La kresko de la diferencoj estas ne monotona kaze de virinoj. Sendube tio grandparte rezultas el la fakto, ke virinoj pli ofte partatempe laboras ol viroj, kaj ke partatempa laboro eble ne estas sendependa de la nivelo de kompetento pri la angla.

5) Eĉ kiam tiaj kalkuladoj estas faritaj surbaze de enspezoj kiuj respondas al ekvivalenta plentempa laboro, tiu ne-monotoneco restas, kio igas nin pensi, ke ceteraj efikoj rolas, precipe ke la lingvaj kompetentoj de virinoj estas rekompencataj ne tiom pro tio ke la kompetentoj estas uzataj en la labormerkato, sed tial, ke ili ludas rolon de «averto» por la dunganto.

Pli profunda analizo konfirmas la ekonometrian firmecon de ĉi-rezultoj (Grin, 1999a); sed ĝi ankaŭ montras ke la realeco estas eĝe pli kompleksa ol tio, kion ĉi-simplaj ciferoj pensigas. Unue, gravaj malsimilecoj ekzistas inter la lingvaj *regionoj*. Analizo aparte farita por la tri regionoj (german-, franc-, kaj ital-lingva) montras, ke la rendimentoj de kompetento pri la angla estas eĝe pli altaj en germanlingva Svisio. En franclingva Svisio, male, kompetento pri la germana kiel dua lingvo estas iom pli bone pagita ol kompetento pri la angla. Due, eblas montri ke la rendimento dependas de sektoro : en iuj ekonomiaj sektoroj (ĝenerale, tiuj kiuj eĝe orientiĝas al internacia komerco), la angla estas eĝe postulata; en aliaj sektoroj, la rendimentoj estas malaltaj.

Oni rimarku ke ĝenerale la taksado de individua rendimento de lingvaj kompetentoj neglektas lernadajn kostojn. Fakte, la rektaj kostoj pagataj de individuo kiu ricevas instruadon estas duspecaj: unuflanke, la rektaj elspezoj ligitaj al libroj, kursoj, ktp. kaj, aliflanke,

la tiel nomataj nerektaj kostoj, aŭ foroferitaj profitoj. Eblas flankenlasi la rektajn kostojn pro la sekvaj kialoj. En la plejmultaj landoj, kiam edukado estas efektivigata de la publika sektoro kaj la lingvoj instruataj kadre de la eduka sistemo, la rektaj elspezoj far la studentoj por lernadaj aferoj, eĉ se ne nulaj, estas relative malaltaj, kaj povas esti ignorataj (se oni enkalkulus ilin, tio ne kondukus al gravaj diferencoj en la taksataj rendimentoj). Pri la foroferitaj profitoj, ili estas proksimume nulaj por studentoj ne ankoraŭ atingintaj la leĝan aĝon por labori (ĉar ili ne rajtus vendi sur la labormerkato la liberan tempon ekster la lernejo); krome, eĉ preter la minimuma leĝa aĝo por pagata aktiveco, estus kvazaŭ neeble negoci pri salajro por la tempo *intence* deprenita el la semajna horaro de lingvokurso.

Individuaj elspezoj enhavas ankaŭ ceterajn elementojn, kiel aliĝkostojn por vesperaj kursoj kadre de trejnado de plenkreskuloj. Ĝenerale, tamen, klerigado de plenkreskuloj aŭ permanenta klerigado restas individua decido, ne ŝtata decido, kaj sekve ne estas enkalkulata en la kostoj de publika edukada politiko. Oni do ne inkludu ilin en la taksadon de la individuaj rendimentoj de kompetentaj akiritaj de la plejmulto de la loĝantaro per la publika edukadosistemo.

3.3 Sociaj rendimentoj

La sociaj rendimentoj transponas la kalkuladon de la individuo al la socio. Oni principe uzas averaĝajn valorojn por profitoj unuflanke kaj por kostoj aliflanke, sciante ke temoj pri kostoj konsentitaj de la publikaj administracioj por instruado de fremdaj lingvoj.

La taksado de la kostoj aperigas certan nombron da malfacilaĵoj: la informoj pri tiu parto de la tuto de edukaj elspezoj plej ofte ne ekzistas aŭ estas ege disaj, ĉar la librotrenadaj praktikoj en la instruada kampo ne ankoraŭ uzas la analizan librotrenadon, kaj do ne donas ciferojn de la elspezoj *laŭ fakoj*. La kostoj de difinitaj lernejoj programoj karakterizataj per uzo de specifa lingvo kiel kursa lingvo estas foje taksitaj (ekzemple Patrinos kaj Velez, 1996); miascie la sola ekzemplo de ĉi-specaj taksadoj eksplicite derivitaj el la entutaj elspezoj troviĝas en esploro pri lingvoinstruado en Svisio (Grin kaj Sfredo, 1997). Laŭ tiu esploro, la entuta jara elspezo je studento por la instruado de la tuto de ĉiuj duaj lingvoj estas 1 500 svisaj frankoj (proksimume € 1 000). Ege skeme, eblas diri ke averaĝe 10% de la entutaj edukadaj elspezoj estas dediĉataj al la instruado de duaj lingvoj. Tiuj nombroj ne enkalkulas

la postabituriantan instruadon. Oni tamen povas uzi ilin kiel referencpunkton enkalkulante, ke ili fakte koncernas edukon sistemon en kiu, en la tempo, kiam informoj estis kolektataj, lernejoj de “mallongaj” cikloj ĝenerale lernis unu fremdan lingvon dum tri jaroj, kaj tiuj de “longaj” cikloj lernis unu fremdan lingvon dum sep jaroj kaj alian fremdan lingvon dum kvar jaroj [-piednoto 19-]. Tiu cifero de 10% verŝajne ne multe malsimilas al tio, kion oni povas observi en ceteraj eŭropaj landoj, tiel ke diferenczo inter 5% kaj 15% de la entutaj edukaj elspezoj povas esti konsiderata kiel aprioro akceptebla taksaĵo pri la publikaj elspezoj dediĉataj al la instruado de fremdaj lingvoj en tiuj landoj; oni poste vidos en ĉapitro 6 ke tiu elcentaĵo tute spegulas la francan situacion.[-piednoto 20-]

La taksado de la socialaj rendimentoj ĝenerale enkalkulas la tempajn dimensionojn, kaj la taksoj en ĉi-kondiĉoj vere meritas la kvalifikon “rendimento” (rilatumo inter kosto kaj profito, NdIT). La bezonataj teknikoj, tamen, estas pli kompleksaj ol tiuj uzataj por taksado la netajn (individuajn) enspezodiferencojn kaj ne estos prezentataj ĉi-tie. La ĝenerala logiko de la modelo estas jena (por detala klarigo, vidu Grin, 1999a, ĉapitro 9) :

- ◇ du apartaj tipoj de kurboj de enspezoj (ekz. entreprena profito, NdIT) laŭ aĝo estas taksataj por la personoj “unulingvaj” kaj “dulingvaj” respektive;
- ◇ la respektivaj ciferoj por labordevenaj enspezoj por ĉiu aĝperiodo estas taksataj;
- ◇ la diferenco inter la du modeloj dum ĉiu aĝperiodo estas akirata per subtraho de la plej malaltaj nombroj de la plej altaj;
- ◇ se la tiel akirita diferenco (pri la laborenspezo, NdIT) spegulas (kiel povas okazi depende de la naturo de la uzataj informoj) subkuŝantajn monatajn enspezojn, oni dekduobligos ilin por ekhavi la jarajn enspezojn;
- ◇ oni konjektas pri la momento, kiam la taksoj estis faritaj - ĝenerale, ĉe la komenco de la profesia vivo de aganto;
- ◇ la diferencoj pri estontaj enspezoj, taksataj por norma aganto, estu ĝisdatigataj ekde tiu specifa momento;

19 Ekde la epoko kiam oni faris tiujn taksadojn (informoj de 1993-94), diversaj prilernaj reformoj en la kantonaj edukistemoj de la Svisa Konfederacio havis por konsekvencon la enkondukon de pli fruaĝa lernado de duaj lingvoj (naciaj lingvoj de Svisio kaj la angla); vidu Grin kaj Korth (2005).

20 Tiu taksado tamen ne aplikigis al angleparolantaj landoj kiel Usono aŭ Britujo, kies neglekto pri la instruado de duaj lingvoj estas fama (Baker, 2002; vidu cetere “Britain’s language gap : Oh là là !”, *The Economist*, 7-a de aŭgusto 2004, p. 24); ni revenos al tiu demando en sekcio 6.2.

◇ la ciferoj pri la elspezoj je loĝanto dediĉataj al lernado de la koncerna fremda lingvo estas poste enkalkulataj;

◇ la enspezdiferencoj unuflanke, kaj la elspezoj je loĝanto aliflanke, estas enmetataj en ekvacion kiu spegulas la profilojn pri enspezo laŭ aĝo;

◇ la aktualiga faktoro, kiu ekvilibrigas la netan aktualan valoron (NAV) de la investaĵo en fremdajn lingvojn (tio estas la termo ĉe la maldekstro de la ekvacio) reprezentas la socialan rendimenton de la instruado de la koncerna lingvo, kun enkalkuliĝo de la diferencoj en taksitaj gajnoj kaj en instruadaj elspezoj.

La rezultoj pri Svislando evidentigas, ke la socialaj rendimentoj de la instruado de duaj lingvoj (angla, germana aŭ franca) varias laŭ cellingvo kaj lingva regiono de 4% ĝis 14%. Pli specife koncerne la instruadon de la angla en franclingva Svislando, la sociala rendimento estas inter 5% kaj 9% por viroj, kaj inter 9% kaj 13% por virinoj; oni povas plidiferencigi la rezultojn per la ektaksado samtempe de la deklaritaj enspezoj kaj de la elspezoj konvertitaj en plentempajlaborunuoj. Ĉiukaze tio donas rendimenton avantaĝe eltenanta la komparon kun la meza rendimento de la financa kapitalo. La instruado de fremdaj lingvoj do ŝajnas por la socio tre profitdona investado – sendepende de politikaj kaj kulturaj kialoj, kiuj povus esti kondukintaj al lernado de tiuj lingvoj.

Kvankam estas malmulte probable, ke la ciferoj estus tre malsimilaj en aliaj eŭropaj landoj, tamen estus riske ĝeneraligi rekte el la svisa ekzemplo. Por koni la rendimentojn de publika investado en lingvoinstruadon en aliaj landoj nepre necesas kolekti taŭgajn informojn, kiuj miascie ne estas disponeblaj en Francio. Veras tamen ke eble el tiaj taksadoj, en aplikado de relative strikta kompreno de la logiko de homa kapitalo, oni emus rekomendi la devigan instruadon de la angla por ĉiuj. Tamen, kiel oni baldaŭ vidos en la sekvanta sekcio, kaj precipe en ĉapitro 5, nenio garantias, ke tio sufiĉos por konstrui sur tio taŭgan politikon de fremdlingvoinstruado.

3.4 Limigoj de la esplormaniero kaj problemoj je longa daŭro

Sendepende de la limigoj ligitaj al la hipotezo de la teoria modelo kaj de ĝia empiria konstato kaj al la fidindeco de la informoj per kiuj la taksadoj estas faritaj, du tipoj de limigoj estas rimarkigendaj rilate la eblojn de interpretado de la rezultoj.

Unue, oni jam diris, ĉi tie ne temas pri nur “komercaj” rendimentoj, kiuj neglektas la profitojn, kiujn povas doni la regadon de fremdaj lingvoj ekster la partopreno en la labormerkato. Estas apenaŭ dubo, ke tiuj motivoj ankaŭ ĉeestas. Ili nome ligiĝas al la kontentigo, kiun la aktoroj havas pro la rekta aliro al la socio kaj al la kulturoj ligitaj al la lingvo X, kiun ili estos peninta lerni. Sekve estas logike konsideri, ke tiuj nekomercaj valoroj estas enkalkulataj far la individuoj en la propraj lernodecidoj, kaj ke ili devus esti enkalkulataj ĉe la politikaj elektoj pri lingvinstruado.

Tamen la ekzisto de tiuspeca valoro (kaj do de la motivo, kiun ĝi okazigas) estas ĝenerale nur akceptita kiel postulato aŭ supozata kiel evidenta. Miascie ĝi neniam estis taksita. La afero estas sendube konsiderebla, nome uzante la metodologion, bone disvolvitan en la vivmedia ekonomio, de la “hedonismaj prezoj” kaj de la kontingenca taksado (Rosen, 1974; Hahnemann kaj Knetsch, 1992).

Tamen mi ne plu pritraktos tiun diskuton. Por la sekvo de la studo ni do kontentiĝos farante la du jenajn hipotezojn: unue, ke la nekomercaj valoroj aldoniĝas al la komercaj valoroj, kaj ke la komercaj rendimentoj [-piednoto 21-] estas multiplikendaj per termino $(1+k)$, en kiu $k \geq 0$; due, ke la valoro de k estas des pli alta, ju pli la *komerca* rendimento estas malalta. Alivorte, se la komerca rendimento estas alta, la suplemento de la valoro pro nekomercaj efikoj estos malalta, ne absolute, sed *relative* al la komerca valoro; inverse, se la komerca rendimento estas alta, la suplemento de valoro pro la nekomercaj efikoj emas esti alta, ne necese absolute sed *relative* al la komerca valoro. Restas do tre eble, ke la entuta rendimento restas la plej alta por la lingvoj kiuj tuj prezentas altan komercan rendimenton.

Jen la dua limigo, kiu malfaciligas la uzon de la rendimentaj rilatumoj, ĉu komercaj, ĉu ne komercaj, kiel bazon de decido pri eduka politiko.


Unu el tiuj esencaj limigoj de ĉiu analizo de ekstera efikeco bazita sur la netaj diferencoj aŭ sur la rendimentaj rilatumoj estas, ke ĝi donas ideon pri la monprofito de iuj kompetentoj en certa momento, sed ke ĝi diras nenion pri ilia posta evoluo; en la plej taŭga kazo, ĝi validas nur je mallonga aŭ mezlonga daŭro. Tiu ĝenerala limigo validas ankaŭ por la taksado de kompetentoj pri fremdaj lingvoj. Tiele la forta rendimento de la angla en Svislando, taksita elirante el informoj kolektitaj en 1995-1996, tre eble multe plifortiĝis ekde tiam; sed tio ne antaŭdiras tion, kio ĝi estos post dek aŭ dudek jaroj, en la

21 Kiujn oni tiam supozu strikte pozitivaj, eĉ se ege malaltaj. Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko

epoko, kiam eklaboros la junuloj nuntempe plenumantaj aŭ komencantaj sian lernadon.

Estas tre malfacile prospective sen konsideri la dinamikon de la lingvoj, kiel ni poste detale vidos en ĉapitro 5. Tamen oni povas skizi diversajn scenarojn kaj diskuti pri ilia kredebleco. Ni konsideru la aferon el vidpunkto de longa daŭro kaj supozu, ke ial la angla lingvo iĝis monprofita kompetento, kiu al tiuj, kiuj regas ĝin, donas aliron al salajraj diferencoj tiaj, kiajn priskribas tabelo 2 en la sekcio 3.2. Tiu situacio povas esti reprezentata pere de tre klasika grafiko de labormerkato, en kiun oni metas abscise la laborkvanton L (ĉi tie, de kvalifikita laboro en la senco de “kompetenta pri la angla”) kaj ordinate la salajran rilatumon S (oni ankaŭ povintus ordinate meti la salajran *diferencon*, al kiu la regado de la angla donas aliron). En tiu grafiko (Fig. 3), la mendo-kurbo M normale estas malkreska, kaj la ofertokurbo normale estas kreska; la valoroj s^* kaj L^* markas la salajron kaj la nivelon de dungofertoj ĉe ekvilibro de la labormerkato.


FIG 3: LABORMERKATO KUN KOMPETENTO PRI LA ANGLA



Se la dungantoj efektive postulas de kreskanta proporcio el siaj dungitoj, ke ili scipovu la anglan, tio montriĝas per dekstrenŝoviĝo de la kurbo M en la direkto de M' . El tio sekvas plialtiĝo de la salajra rilatumo sur tiu merkato de s^* al s'^* , kaj ankaŭ kresko de la dungokvanto kun kompetento pri la angla, de L^* al L'^* . Tamen la individuoj, observante ke la regado de la angla estas pli bone pagata, kreskigos sian investadon en la

anglan — aŭ de si mem, aŭ rezulte de aranĝoj de eduka politiko. Tio enigas ŝoviĝon dekstren de la oferta kurbo, de O al O' . El tio sekvas nova kresko, de L^* al L^{**} , de la ekvilibra kvanto sur la labormerkato “kompetento pri la angla”, sed la efiko je la salajra rilatumo estas duba, kiel montras figuro 4, kie la nova ekvilibra punkto E'' povas situi sub aŭ super la komenca ekvilibra punkto.

FIG. 4: ŜOVOJ DE LA EKVILIBRO



Ni tamen supozu, ke la salajra diferenco favora al la personoj scipovantaj la anglan daŭras kaj ke ĝi estas sufiĉe grava por pravigi la daŭrigon de la investado far la individuoj. Aliflanke oni supozos (ĉiam sub la hipotezo de mondo, en kiu la angla iĝis nemalhavebla), ke la kresko de la nombro de tiuj, kiuj regas ĝin, plifortigas la sociekonomian aferkoncernecon de la scipovo de tiu lingvo kaj igas la dungantojn postuli de ĉiam pli da kategorioj de dungitoj, ke ili scipovu la anglan. Fakte tio ja ŝajnas esti la tendenco en multaj francaj entreprenoj, kvankam ne ĉiam estas klare, ĉu tiuj kompetentoj tiele postulataj vere utilas en la profesia aktivado. [22]


Ĉiukaze, sekve de tio oni povas antaŭvidi ke la merkataj fortoj sufiĉas por enigi sinsekvajn ŝoviĝojn dekstren de la kurboj de oferto kaj mendo. Do la demando estas jena: je longa daŭro, ĉu la efiko de oferto aŭ ĉu tiu de mendo estos la plej akcentita? Se la efiko de mendo dominas, la regado de la angla okazigas diferencojn de

22 Vidu ekzemple la dosieron “Anglais exigé” en la kajero “Emploi” de *Libération*, 25 novembro 2002, aŭ «Do you speak business ?» en *L'Express*, 16 junio 2004.

kio konfirmos tiun kompetenton en rolo de ŝlosilo al sukcesoj profesia kaj financa. Kontraŭe, se la oferta efiko dominas, laŭgrade de la disvastiĝo de la kompetento pri la angla en ĉiam pli larĝaj tavoloj de la populacio, la profito de la angla povas nur malkreski; estas la scenaro, kiun priskribas figuro 5 ĉi-sube, en kiu la serio x, x', x'', x''' ktp. priskribas la ŝoviĝon de la sinsekvaj ekvilibraj punktoj de tiu merkato (Grin, 1999b).

En la kazo de tia figuro la lernado rezultus malpli el libervola investado ol el neceso de sociekonomia partoprenado. Ĉu tiu evoluo estas kredebla? Sendube maleblas diri tion pro du kialoj. Unue, la donitaĵoj ebligantaj projekcion sur la estontecon ne ekzistas; due, la aktuala formo de la disvastiĝo de la angla estas sen precedenco en la homa historio kaj la similaĵoj kun la latina antaŭ du jarmiloj estas tre malmulte konvinkaj, ĉar la kondiĉoj teknologiaj, socialaj kaj ekonomiaj ne rilatas al tiuj, kiuj kuraĝigas la nunan ekspansion de la angla. Tamen, nenio malhelpas starigi paralelon al alia kompetento, kiu komence rezervita al maldika tavolo de la socio, etendiĝis en kvazaŭ la tuton de la loĝantaro de la evoluintaj landoj: la kapablo legi kaj skribi (sen necese sin turni al la nocio, pli postula, de lingva klereco; vidu OCDE, 1999). Kvankam temis pri malofta kaj vendebla kompetento, ĝi iĝis banala, nemalhavebla kaj precipe malsufiĉa por garantii sukceson profesion kaj financon. Tre eblas, ke oni observas je longa daŭro similan evoluon por ĉiu lingvo, de kiu la regado ĝeneraliĝus ĉe la majoritato de la populacio, precize kiel sugestas figuro 5.

Fig.5: SALAJRADO DE LA ANGLA JE LONGA DAŬRO



Estus do malĝuste supozi, ke oni prave kontentiĝu kuraĝigi la anglan kaj forgesi la aliajn lingvojn. La sukceso financa kaj profesia de la individuoj, kiomgrade ĝi dependas de ilia kapableco diferencigi ties kompetentojn disde tiuj de aliaj personoj, sendube postulos de ilia flanko investadon en la akiradon de aliaj lingvoj. Probablas, ke la dungantoj pretos salajri tiujn kompetentojn: en tutmonda ekonomio, en kiu la konkurenco ronĝas la diferencojn pri kvalito kaj prezo inter konkurencaj produktoj, kaj en kiu la vendanto kaj la aĉetanto ambaŭ kapablas angle interparoli, la komunikadaj kompetentoj (esencaj, interalie, en ĉio apartenanta al la postvendaj servoj) vidos sian signifon kreski. Efektive, se la aĉetanto povas elekti inter varioj proksimume identaj de iu produkto, li emos preferi, ĉio cetero egala, la produkton ofertitan al li en la propra lingvo. Tiu prefero al la konsumado “en la propra lingvo” troviĝas en la studoj faritaj en Kebekio kaj en Katalunio, kaj probablas, ke ĝi ĝuas pri multe pli ĝenerala valideco [23].

Tio implicas, ke la instruaj politikoj de lingvoj ne estu direktataj nur al la angla kiel unua fremda lingvo, sed *ankaŭ al aliaj lingvoj*. Gravus substreki, ke tiu opinio ne baziĝas sur politikaj aŭ kulturaj konsideroj, sed sur ekonomiaj perspektivoj koncerne la probablan evoluon de la valoro de dua lingvo sur la labormerkato.

Tiu penso baziĝas sur implicita kaj iom simpleca modelo pri la dinamiko de lingvoj; ni rediskutos tiun temon en ĉapitro 5. Intertempe tamen indas studi la uzadon de lingvoj en entreprenoj.

23 Tio konfirmas aliaj atestoj, tro disaj tamen por ke eblus dedukti ĝeneralan regulon; vidu ekzemple Müller (2001) aŭ Über Grosse (2004).

Ĉapitro 4:

ENTREPRENOJ KAJ FREMDAJ LINGVOJ

4.1 Lingvo kaj ekonomia aktiveco en entreprenoj

El la vidpunkto de la fundamenta ekonomika analizo, por kompreni la valoron de kompetentoj pri fremdaj lingvoj, ne nepre necesas demandi sin pri la procezo de mona valorigo de tiuj kompetentoj interne de la entreprenoj. Fakte sufiĉas *konstati* la ekziston de la diferencoj de salajroj, kiel ni faris en la antaŭa ĉapitro pere de taksado de enspezaj ekvacioj, por dedukti el ili, ke la entreprenoj interesiĝas pri tiuj kompetentoj kaj fakte bezonas ilin. Unue, oni malbone vidas kial ili ofertus kromsalajron pro kompetento, kiu neniel servas al ili. Due, la mikroekonomika teorio opinias ke la salajro respegulas la produktivecon de la laboro [-piednoto 24-]; konsekvence, se oficistoj scipovantaj lingvon perlaboras pli ol aliaj oficistoj kun cetere egalaj kompetentoj, sed ne scipovantaj tiun lingvon, tio signifas, ke la scipovo de tiu lingvo kontribuas al la produktado.

Tiu ĝenerala teoria perspektivo eble klarigas, kial oni tiel malmulte okupiĝis pri la meĥanismoj de mona valorigo de la lingvaj kompetentoj interne de la entreprenoj, kaj ĉi-ĉapitro estos la plej mallonga de la studaĵo. Oni tamen sciigos, ke ekzistas kelkaj teoriaj modeloj, kiuj eksplicite referencas la meĥanismojn de produktado aŭ de distribuado por klarigi la salajran diskriminadon inter personoj kun malsama gepatra lingvo (Lang, 1986), por enkalkuli la malegalan amplekson de la merkatoj por varoj vendataj en malsamaj lingvomedioj (Hoĉevar, 1975), aŭ por esplori la procezojn de agordiĝo (al kiu strebas la entreprenoj pro produktivaj motivoj) inter la lingva profilo de la oficisto kaj la lingvaj postuloj de specifaj postenoj interne de la entreprenoj. (Sabourin, 1985). [-piednoto 25-]

24 Pli precize, ke ĝi estas paŭsita laŭ la laŭvalore aldona produktiveco de la laboro, plus kromsalajro donanta la «salajron pro efikeco» kaj servas por stimuli la motiviĝon de la oficistoj.

25 Ekzistas aliaj analizoj de la salajraj diferencoj pro lingvokono, sed tiuj analizoj ne taŭgas ĉi tie, ĉar ili baziĝas sur procezo de selektado kaj dungado de kandidatoj, aŭ sur intenca volo diskriminacii, anstataŭ baziĝi sur struktura rilato kun produktado kaj distribuado; vidu ekz. Raynauld kaj Marion (1972) aŭ Lavoie (1983).

La nune disponeblaj teoriaj studoj en lingva ekonomio pri la mona valorigo de lingvoj en entreprenoj estas do multe tro partecaj kaj tro disaj por vere klarigi la problemon de elektado de instruendaj fremdlingvoj.

La kontribuoj rezultantaj el socilingvistiko kaj ĝenerale rezultantaj el observado celanta la empirian kontrolon de teoriaj analizoj de lingvaj praktikoj en multlingva profesimedia estas tro malproksimaj de la temaro de la ekonomia valorigo (kaj do de la *postulo* de kompetentoj pri fremdaj lingvoj far entreprenoj) por multe utili (vidu ekz. Cigada, Gilardoni et Matthey, 2001).

Cetere la norma mikroekonomika teorio ne ebligas detalan analizon de la motivoj, kiuj igas tiun aŭ alian fremdlingvon profitdona, kaj apenaŭ disponigas bazon por difini la enhavojn de la instruaj programoj, eventuale proponante adaptitajn trejnfertojn al malsamaj grupoj de lernantoj. Nuntempe diversaj esploroj pri tiu demando estas planataj [-piednoto 26-] kaj kvankam la ekzameno de tiu kolekto de demandoj ege superas la kampon de la nuna studo, tamen eblas proponi analizan skemon (figuro 6 ĉi-sube).

La analizo devus komenciĝi per tipologio de la kuntekstoj, en kiuj la aktiveco de la produktado aŭ distribuado estas esence modifita *pro* la diverseco de ĉeestantaj lingvoj. Tiu tipologio siavice, fiksiĝu en certa koncepto de la ekonomia aktiveco. *Apriora*, oni do bezonus analizi la influon de la lingva diverseco sur:

- 1) la eksteran komunikadon kun la klientoj kaj la liverantoj ;
- 2) la internan komunikadon unue inter laborantoj rekte okupataj en la produktado, kaj due inter la direkcio kaj/aŭ proprietuloj unuflanke, kaj laboristoj aliflanke;
- 3) la gamon kaj la proprecojn de la produktataj varoj kaj servoj (lingva diferencigo de produkto ne esence lingva; lingvaj produktoj).
- 4) la dungopolitikon (identigo de la lingvaj bezonoj de la entrepreno laŭ la procezoj de tipoj 1, 2 kaj 3 skizitaj ĉi-supre; strategioj pri dungado kaj/aŭ de (re-)lokigo de laboristoj en la entrepreno laŭ iliaj kompetentoj pri fremdaj lingvoj/duaj lingvoj).

Tiuj diversaj sferoj de entreprenaj aktivecoj interrilatas, okazigantaj kompleksajn procezojn, pri kiuj oni rajtas supozi, ke ili respondas, almenaŭ je malproksima tempolimo, al logiko de ekonomia efikeco en la produktado kaj distribuado de varoj kaj servoj. Pro tio oni same povas skizi la proprecon de la ekzamenendaj procezoj. Tion proponas figuro 6, kie la koloraj sagoj simbolas jenajn rilatojn:

◇ Sagoj verdaj (hele aŭ malhele): rektaj efikoj de lingva diverseco (lingvaj atributoj de aktoroj kaj lingvaj proprecoj de celmerkatoj) sur la ekonomiaj procezoj (“Kion produkti? Kiel produkti? Kiel komuniki eksteren?”).


◇ flavaj sagoj: nerektaj efikoj de la lingva diverseco (lingvaj atributoj kaj lingvaj proprecoj de celmerkatoj) sur la ekonomiajn procezojn (nome la dunga politiko de entreprenoj).

◇ bluaj sagoj: interagadoj inter la ekonomiaj procezoj internaj de entreprenoj (“Kion produkti? Kiel produkti? Kiel komuniki eksteren?”).

◇ ruĝaj sagoj: efikoj de la decidoj de entrepreno, enkalkulante la ekonomiajn procezojn en produktado kaj distribuado (“Kion produkti? Kiel produkti? Kiel komuniki eksteren?”) sur ĝiajn bezonojn je personaro kaj ĝian dungan politikon.

Krome la violkoloraj sagoj koncernas la influon, kiun entreprenaj decidoj (nome pri la proprecoj de produktoj kaj pri la ekstera komunikado) povas efiki sur la lingvan dinamikon; ni vidos en la sekvanta ĉapitro, ke tie troviĝas centra dimensio, konsiderenda en politiko pri instruado de fremdaj lingvoj.

FIG. 6 : UZO KAJ VALORIGO DE LINGVAJ KOMPETENTOJ EN ENTREPRENOJ



Estas klare, ke la nun disponeblaj informbankoj tute ne ebligas ekplenumi la esploron kaj certe ne la mezuradon de la rilatoj petataj en figuro 6. Samtempe la neceso de strukturita esploro estas konfirmata per la rezultoj de empiriaj enketoj jam plenumitaj, ankaŭ en Francio. Fakte, oni rajtas pensi, ke la limoj de tiuj enketoj rilatas precize al la fakto, ke pro manko de teoria kadro, oni ne sciis kiuj informoj

kolektendas kaj kiuj demandoj starigendas. Ni trarigardos kelkajn el tiuj rezultoj en la sekva sekcio.

4.2 Enketoj ĉe entreprenoj

Oni povas distingi du orientiĝojn en la grandaj enketoj ĉe entreprenoj, celantajn klarigi iliajn lingvajn praktikojn. Unue, ekzistas tradicio enkutimigita en Kebekio (Bouchard, 1993, 2002 ; Vaillancourt, 1993, 1996), kiu pli freŝdate disvastiĝis en Katalunio, en Vaskio kaj en Kimrio (Eŭropa Komisiono [DG XXII], *s.i.d.*). Ĝi direktiĝas al la potencrilatoj inter lingvo relative dominata aŭ minacata (respektive la franca, la kataluna, la vaska kaj la kimra) kompare al dominanta lingvo (ĉi-kaze la angla aŭ la hispana).

Tiu tradicio tamen ne estas la plej trafa rilate al la demandoj diskutataj ĉi tie, en kiuj pli gravas scii kiujn kompetentojn pri fremdaj lingvoj utilas plibonigi, interalie depende de la bezonoj de la entreprenoj. Tial taŭgas memori alian orientiĝon, de aŭstralia deveno (Stanley, Ingram kaj Chittick, 1990 ; ALLC, 1994 ; Stanton kaj Lee, 1995). Tiuj studoj starigis jenan demandon: ĉu por Aŭstralio, enmigradejo, oportunas favori la konservadon de la kompetentoj de migrantoj pri iliaj respektivaj originaj lingvoj, se oni konsideras ke tiuj kompetentoj povas favori, por multaj varoj kaj servoj surmerkatingataj de aŭstraliaj entreprenoj, la aliron al fremdaj merkatoj? Tiuj aŭstraliaj studoj tamen ne rezultigas sufiĉe klarajn efikojn. La pridemanditaj entreprenestroj montras limigitan intereson pri lingvaj kompetentoj ekster la anglalingvaj. La esploro de dungofertoj, de 1980 ĝis 1992 montras tamen plimultiĝon de la nombro de postenoj, por kiuj lingvaj kompetentoj estas postulataj, interalie pri la japana kaj la ĉina (ALLC, 1994 : 114); tiu evoluo plifortigas la atendojn de la aŭstralia turisma sektoro, kiu antaŭvidis fortan kreskon de la bezono pri personaro alte lerta pri fremdlingvaj kompetentoj. Sendube duonvoje inter ambaŭ tiuj orientiĝoj troviĝas la freŝdataj enketoj en Francio kaj en Kebekio pri la lingvaj bezonoj de entreprenoj. La kunigo de ambaŭ tiuj tradicioj cetere montriĝas, kiam oni komparas studojn realigitajn en diversaj landoj (Sekretariejo pri lingva politiko, 2004; vidu ankaŭ Cerquiglini, 2004).

La specife francaj enketoj estas atentigitaj en Raporto je 2004 de *Délégation générale à la langue française et aux langues de France* (Ĝenerala delegitaro pri la franca lingvo kaj pri la lingvoj de Francio) [27] en kiu oni povas legi (p. 62), ke «*pluraj studoj estis konfiditaj de la ĝenerala delegitaro pri la franca lingvo kaj pri la lingvoj de Francio al teamoj de esploristoj. Temas ĉi tie pri*

27 Vidu [http://www.culture.gouv.fr/culture/dglf/rapport/2004/Rapport au parlement 2004.doc](http://www.culture.gouv.fr/culture/dglf/rapport/2004/Rapport%20au%20parlement%202004.doc)

“Centre de recherche pour l'étude et l'observation des conditions de vie” (Esplorcentro por studado kaj observado de vivkondiĉoj) (CREDOC), pri “Laboratoire de recherche en management” (Laboratorio de esploro pri estrado) de la universitato de Versailles-Saint Quentin en Yvelines, pri “Observatoire de la formation, de l'emploi et des métiers de la Chambre de commerce et d'industrie de Paris” (Observatorio de klerigo, de enpostenigo kaj de profesioj de la Ĉambrego pri komerco kaj industrio de Parizo), pri “Services des études de l'Agence française pour le développement international des entreprises” (Studoservoj de la franca agentejo por internacia disvolvo de entreprenoj) kaj pri “Forum francophone des affaires” (Franclingva Forumo pri negocoj). Sinjorino Catherine Tasca ankaŭ redaktis raporton pri tiu temo en julio 2003 ».

Tiuj diversaj enketoj kaj la analizoj rezultantaj el ili estas tre malsimilaj laŭ siaj metodaroj, siaj muestrograndoj kaj siaj reprezentecoj. Oni rajtas taksati altranga la ĝeneraligeblon de la kolektitaj informoj, en la kazo de studoj kun granda muestro (interalie tiu de “Observatoire de la Formation, de l'Emploi et des Métiers” ; vidu ĉi-sube), sed malgraŭ ĉio la reprezenteco ne estas certa, ĉar lapartopreno al la enketo estis libervola. Kontraŭe, la amplekso de alia enketo (Pigeyre et Crétien, 2003) estas tre limigita, ĉar ĝi baziĝis sur nur du entreprenoj.

Pluraj rezultoj de la studo realigita de OFEM (« Les pratiques linguistiques des entreprises travaillant à l'international » - Lingvaj praktikoj de internacie funkciantaj entreprenoj) [-piednoto 28-], estas rekte trafaj pri la demandoj, kiuj okupas nin ĉi tie. Tiu enketo celis 501 entreprenojn, telefone pridemanditajn en junio 2003. Ĝi estas riĉa je kvantaj valoroj indikantaj interalie, ke la angla estas la ĉefa lingvo parolata de la klientaro nefranclingva (89%), sekvata de la germana (44%), la hispana (36%), la itala (17%), la araba (6%), la ĉina (4%) kaj la japana (4%). La regado de la angla estas taksata sufiĉe grava, tiel ke triono de la enketitaj entreprenoj (interalie iuj el la plej grandaj) organizu aŭ financu klerigadon pri la angla. Ĉar proksimume 52% de la enketitaj entreprenoj realigas almenaŭ 50% de siaj vendosumoj ĉe nefranclingva klientaro, la lingvoj povas esti grava atuto por la disvolvado kaj mastrumado de la kontaktoj kun tiu klientaro. Entute 51% de la entreprenoj asertas ke la angla estas forta konkurenca avantaĝo.

Miascie tamen neniu el la kvar enketoj donas indikon pri la specifaj procezoj, per kiuj la fremdlingvaj kompetentoj estas uzataj kaj interpleksiĝas kun la procezoj vere ekonomiaj de produktado kaj distribuado de varoj kaj servoj [-piednoto 29-] – en la logiko skizita en figuro 6 de la antaŭa sekcio. Elirante el tiuj du tipoj da studoj, restas do malfacile fari pli ol agnoski la konstaton kaj eltiri el ĝi rekomendojn por politiko de instruado de fremdaj lingvoj.

28 Vidu <http://www.ofem.ccip.fr/documents/Linguistiques.pdf>.

29 Ni menciis, ke la aŭtoro de ĉi tiuj linioj ĉeestis la prezentadon de la rezultoj de tiuj kvar studoj dum kolokvo organizita la 23an de junio 2004 en "Chambre de Commerce et d'Industrie de Paris". Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko

Krom la enketoj kiuj emfazas la dimensiojn ekonomiajn kaj komercajn, oni same rimarkigu la ekziston de esploroj pri la aĉetado, fare de entreprenoj, de prilingvaj klerigadoj (Sabard, 1994) aŭ pri la etnografio de lingvaj praktikoj (Lussier, 2004; Lüdi kaj Heiniger, 2005). Iuj verkoj montras neatenditajn rezultojn, kiel tiuj de Cremer kaj Willes (1991, 1994), kiuj montras, ke la gravaj komercaj interŝanĝoj povas sukcese okazi sur la bazo de minimuma komunikado, tio signifas: inter partneroj disponantaj tre malgrandan komunan lingvokonon: tiu rezulto estu rilatigata al unu el tiuj de la studo de OFEM, laŭ kiu 76% de la prienketitaj entreprenoj ne konstatas lingvobaron por siaj eksportaĵoj. Oni tamen rajtas supozi, ke la ofteco de tiaj situacioj laŭgrade malaperos je malproksima templimo, proporcie al la relativa malpliigo de varoj kun malgranda teknologia enhavo, kaj al la kresko en ĉiuj internaciaj komercaj fluoj, de la kvanto de produktinformoj mezume bezonataj.

Konklude oni do rajtas diri, ke eĉ se ekzistas percepto tre disvastiĝinta, ke la angla lingvo havas fortan gravecon en la funkciado de grandaj entreprenoj kaj ke ĝi povas kontribui al ilia sukceso, oni ne scias multon en tiu kampo. Unue, la efiko de tia avantaĝo ĝenerale situas nivele de variabloj, kiaj la merkatoj, kiuj ne aŭtomate respondas al profitoj; due, oni ne konas la precizajn kaŭzojn, en terminoj de procezoj de produktado kaj distribuado, kiuj generas tiun avantaĝon; trie, plu ekzistas iu neklareco pri la efika utiligo kaj la vera neceso de diversaj kompetentoj pri fremda lingvo en la ĉiutaga profesia vivo.

ĈAPITRO 5

LINGVODINAMIKO.

5.1 Kial zorgi pri lingvodinamiko?

Lingvodinamiko konsistigas gravegan nivelon de analizo por ĉi tiu studo. Fakte, la decidoj alprenitaj pri instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj partoprenas en tiu dinamiko: instrui tiun aŭ alian lingvon helpas ĝian disvastigon kaj ĝian kulturan, politikan kaj socian legitimecon. Sekve, ĉi tiu disvastiĝo instigas plie al ĝia lernado, kaj la procezo estas plifortikigata de efiko de legitimado.³⁰ En kunteksto kiu ne povas plu esti strikte nacia sed nepre estas eŭropa aŭ internacia, oni krome konsideru la fakton, ke decidoj de aliaj ŝtatoj alfrontiĝas la saman problemon, kaj ke iliaj decidoj ankaŭ partoprenas en ĉi tiu dinamiko kaj kontribuas al influi ĝin. Resume, en politiko de instruado de fremdaj lingvoj la decidokriterioj dependas de niaj propraj decidoj kaj tiuj de aliaj, kaj oni ne kapablas decidi sen kompreni la mekanismojn de tiu dinamiko.

La termino "lingvodinamiko" povas referenci tre malsamajn procezojn, de la interna evoluado de lingvoj (ekzemple, la emo pli-malpli forta de lingvo akcepti neologismojn aŭ lingvopruntojn el aliaj lingvoj) ĝis la evoluado de la pozicio aŭ de la influo de unu lingvo

30. Bourdieu prave rimarkigas: «Ni povas konstati la jenajn faktojn: la angla lingvo dominas; en la eŭropaj instancoj ĝi trudiĝas pli kaj pli kiel iuspeca oficiala lingvo; la Francoj, al kroĉiĝante al siaj lingvaj privilegioj jurspecaj nervozigas siajn partnerojn kaj riskas obteni la malon de tio, kion ili serĉas. Tamen, mi opinias, ke tio ne signifas, ke oni devas definitive rezigni pri iu averto kontraŭ politiko, kiu strebas al agnosko de la situacio, *ĉar akcepti kiel fakto la dominon de la angla por eŭrope skale fari el ĝi iuspecan oficialan lingvon, povus rezultigi grandegan akcelan efikon.*» Bourdieu, 2001: 45; miaj kursivigoj).

kompare al aliaj. En ĉi tiu studo, la esprimo "lingvodinamiko" rilatas al tiu dua nivelo, klare "makronivelo": ĝi do celas la principe longedaŭrajn ŝanĝojn de kresko kaj malkresko de lingvoj kaj sekve, la respektivan pozicion de ĉiu lingvo rilate al ĉiuj aliaj.

La analizo de lingvodinamiko tamen prezentiĝas diversmaniere laŭ la speco de la koncernaj lingvoj. Tiel, la esploro de la malkresko, aŭ male, la revivigo de la regionaj aŭ minoritataj lingvoj jam produktis ampleksan literaturon, kiu jam liveris gravajn teoriajn kaj empiriajn rezultojn (vidu precipe Fishman, 1989, 199, 2001; Povus, 2001; Iannàcaro kaj Dell' Aquila, 2002); alivorte, oni jam disponas pri la ĉefaj elementoj de teorio de la lingvodinamiko aplikita al regionaj kaj minoritataj lingvoj.³¹ Oni povas tamen diri, ke tiukaze la problemo estas simpligita pro la ĉeesto de du karakterizaĵoj: unue, misproporcio inter la respektiva graveco (sur la niveloj lingvodemografia, socia, politika kaj ekonomia) de la koncernaj lingvoj; due, la malmulteco de partneroj: la regiona aŭ minoritata lingvo ĝenerale konkurencas aŭ rezistas kontraŭ pli grava lingvo (la franca en la kazo de la bretona; la angla por la kimra; la itala por la friula; la hispana por la vaska; ktp.)³²; la situacio estas iom pli komplika por la lingvoj de la translandlimaj naciaj minoritatoj (ekzemple, hungaraj minoritatoj en Rumanio aŭ Slovakio, svedaj en Finnlando, germanaj en Danio aŭ en Belgio, ktp).

Aliflanke, tiu simpleco - tute relativa - de la koncernaj procezoj ne troviĝas en la dinamiko de grandaj lingvoj: kio determinas la disvastiĝon dum diversaj periodoj de la historio de certaj lingvoj malprofite al aliaj? Kiuj faktoroj (politikaj, ekonomiaj, teknologiaj, aŭ aliaj) influas kaj kiel ili kombiniĝas? Kio klarigas ke tia disvastigo okazas je relative limigita regiona skalo (haŭsa, svahila, tagaloga), aŭ pli larĝa (araba, franca, hispana, latina), eĉ je tutmonda skalo (angla)? Ĉu ekzistas kialo diferencigi tiujn procezojn de disvastiĝado laŭ la kazo, ĉu ili trafas nur certajn sociajn kategoriojn (elitojn, ĉefe Eŭropajn, kaze de la franca inter la 18-a kaj la mezo de la 20-a jarcento) aŭ ĉu ili observeblas tra diversaj sociaj tavoloj (kiel pri la angla, precipe ekde la lasta kvarono de

31. La analizo de la malkresko aŭ de la revivigo de la regionaj aŭ minoritataj lingvoj tute ne bezonas tiajn biologiajn analogiojn, kiaj la metaforo pri la «morto de la lingvoj». Kvankam iu literaturo baziĝas sur tiuj analogioj - cetere same kiel iuj paroladoj pri la sorto de la latina, la franca, la angla ktp.-, utilaj analizoj estas male fiksitaj en vera teorio (sociologia, ekonomika aŭ alispeca) de la aganto. Oni do komprenu la uzon de tiaj nocioj kiel «pluvivo», «morto», «revivigo», ktp., kiel simplan lingvan oportunaĵon en tiuj studoj.

32. Reference al tiuj kuntekstaj aspektoj, kaj aparte por la «aŭtoktonaj» lingvoj, disvolviĝis la paradigmo de «la ekologio de la lingvoj»; vid. ekzemple Mühlhäusler (2000).

la 20a jarcento)? Ĉi tiuj demandoj frakasas la norman analizan kadron, kiu kontraŭas la naciajn indiĝenajn lingvojn (kun loka disvastiĝo kaj uzado ene de unu komunumo) al vehiklaj lingvoj (pli larĝe, eble internacie disvastiĝintaj kaj ĉiukaze interkomunumaj).³³

Tiu problemo de makrodinamiko de "grandaj" lingvoj (kontraŭe al la dinamiko de regionaj aŭ minoritataj lingvoj) estas la temo de relative disaj esplormanieroj en socilingvistiko kaj aplikata lingvistiko; la plimulto el ili, tamen, ne liveras ĝeneralan klarigon de la fenomeno. La malesto de tia ĝenerala teorio estas montrita de kelkaj aŭtoroj (Appel et Muysken, 1987). Kion oni ĝenerale renkontas, tio estas skizo de respondoj, ofte nur priskribaj, aŭ tro fiksitaj en iu specifa realaĵo por ebligi ĝeneraligon. Iuj aŭtoroj ŝajne esperas solvi la analizajn problemojn enmiksiĝante, sen plia formalaĵo, siajn proprajn valorjuĝojn kaj sen provo pravigi ilin per argumentado bazita sur konsideroj de publika bono - dum tiu ekzerco nepre necesas, se oni celas proponi politikojn pri lingvoj aŭ lingvinstruado.

Kompleta recenzo de la literaturo eliĝus la kadron de la nuna studo, sed utilas diri kelkajn vortojn pri ofte cititaj verkoj, kiam temas pri lingvodinamiko, eĉ se tio estus nur por distingi nin de ili.

Sur la internacia nivelo, unu el la ĉefaj demandoj estas kompreneble tiu de la disvastiĝo de la angla. Oni ofte citas du studojn pri tiu temo: la verkon de David Crystal titolitan *English as a Global Language* (Crystal, 1997) kaj la raporton redaktitan de David Graddol laŭ komisiono de British Council, *The Future of English?* (Graddol, 1997). La analizo de Crystal estas esence historia kaj priskriba, sed ĉe la kaŭza flanko, ĝi restas multe tro cirkleca. Fakte, lia plej forta konkludo estas, ke la disvastiĝo de la angla klariĝus per la fakto, ke tiu lingvo estus troviĝinta, multfoje, «at the right place at the right time» (Crystal, 1997: 110). Tia aserto, memkompreneble, simple alilokigas la

33. La diferenco inter la du malfacilaj konceptoj, nome inter la pritrakto de la dinamiko - unuflanke - de regionaj aŭ minoritataj lingvoj, kaj - aliflanke - de «gravaj» lingvoj, rememorigas pri la distingo farita de la teorio pri la internacia komerco en la analizo de la komercaj fluoj inter landoj, kaj plej ĝenerale, de la ekonomika analizo de merkatoj. Fakte la ofta hipotezo en la teorio de la internacia komerco pri la «malgranda malfermita ekonomio» nin tuj situas en relative simpla kazo, en kiu la «malgranda» partnero en la komerca interŝanĝo pro sia modesta graveco havas nenian influon al la kondiĉoj de la monda merkato, same kiel unu izolita konsumanto en merkato laŭ perfekta konkurenco havas nenian influon al la prezo de la varo kiu interŝanĝiĝas en ĝi. Male, la analizo de la komercaj rilatoj inter du «grandaj» landoj starigas novajn demandojn, ĉar la konduto de unu el la du partneroj modifos la nivelon de prezoj sur la monda merkato. Samspecaj motivoj kompleksigas la analizon de la dinamiko de la «gravaj» lingvoj.

34. Notu ke Graddol persone insistas pri la neceso de la demandosigno en tiu titolo.

problemon: kio igas la anglan regule troviĝi en la taŭga loko je la taŭga momento? Siaflanke Graddol esploris pli proksime la faktorojn ofte makroekonomiajn, kiuj sendube estas strukture ligitaj al la disvastiĝo de anglalingvaj praktikoj ekster la landoj tradicie anglalingvaj. Tamen el tio denove ne eliĝas ajna klarigo pri la disvastiĝo de la angla, kaj ankoraŭ malpli pri teorio de la lingvodinamiko.³⁵

Koncerne la francan, multaj studoj ofte menciitaj dum publikaj debatoj pri lingvoj - interalie kiam temas pri "kiujn lingvojn instrui" konsiderinte la Eŭropan kuntekston - emfazas la historian aŭ komparan lingvistikon (de ekz. Walter, 1994; Hagège, 1992), kaj aplikatan lingvistikon aŭ socilingvistikon (ekz. Calvet, 1993 1999 2002; Hagège, 2000). Tiuj bonvenaj verkoj proponas al ni fenomenologian enhavon, kaj ofte helpas malkovri diversajn mekanismojn de la lingvodinamiko.

Tamen, tiuj verkoj ne sufiĉas por la bezonata difino de politiko pri lingvinstruado laŭ la difino de ĉapitroj 1 kaj 2 de nuna raporto. Unue, tiuj verkoj ne entenas teorion pri lingvodinamiko, kiu povus ĝenerale identigi la kaŭzorilatojn. Alivorte, troveblas en tiuj verkoj, nek faktoroj kiuj klarigas tiun dinamikon laŭ integrita strukturo, nek sistema esplorado pri la naturo de la rilatoj, kiuj ekzistas inter ili, kaj kies interagado kaŭzas la kreskon de certaj lingvoj kaj la malkreskon de aliaj. Sekve, la malmultaj ĝeneralaj proponoj, kiuj rezultas el tiuj verkoj, estas refuteblaj (Pool, 1991-a). Plie, ili neniel konsistigas analizan kadron por vera lingva politiko, ĉar ili ne prezentas tiun kiel publika politiko, kaj tute ne penas identigi, taksu kaj kompari la respektivajn meritojn kaj malavantaĝojn de diversaj scenaroj. Sekve, la bazo sur kiu estas kunmetitaj diversaj proponoj por instruado de fremdaj lingvoj - en Francio aŭ aliloke - estas neeviteble mankhava.³⁶

Ekzistas ankaŭ en Francio, fronto de aktivaj esploroj pri la loko de la angla rilate la francan (Truchot, 2002). Kvankam la lingvodinamiko necese ĉeestas kiel kaŭzo aŭ kiel konsekvenco en tiuspecaj studoj, ĉi-tiuj lokiĝas en socilingvistika perspektivo kun etnografia metodologio, per kiu oni celas elmontri, kiamaniere la kompetentoj de la agantoj (faktaj aŭ atendataj) estas perceptataj kaj premiitaj, ekzemple en la profesia vivo, kaj tiele tiri el tio konsekvencojn pri la naturo kaj la nivelo de la

35. Je la momento, kiam estas skribataj tiuj linioj (aprilo 2005), Graddol estis poluranta iun ĝisdatigon, ankaŭ pro komisiono de British Council.

36. Iuj proponoj de Calvet (1993, 2002) estas kritikitaj en Grin (1997, 2005 respektive).

kompetentoj akirindaj far la aktoroj; la interagado inter la strategioj de la organizoj unuflanke, kaj la perceptoj de la agantoj koncerne la lingvojn aliflanke, ofte konsistigas la kernon de tiuj studoj. La konsekvencoj tireblaj el tiuj studoj por helpi la decidon orientiĝas do ĉefe al aspektoj, se ne pedagogiaj, almenaŭ direktitaj al kleriga aktiveco; tiuj konsideroj prilumas, sed ne finsolvas la ŝlosildemandojn de la lingvodinamiko.

Resume, la studoj kiuj baziĝas sur lingvosciencoj en la larĝa senco, ebligas scii nek kiel la lingvoinstruado influas la kreskon aŭ la malkreskon de la lingvoj, nek kiel tiuj procezoj povus aŭ devus influi la politikajn elektojn koncerne instruadon de fremdaj lingvoj.

Laste ni memorigu, ke la literaturo, kiu rilatas nur al edukadaj sciencoj apenaŭ pli informas nin pri tiu punkto - ĉefe ĉar tiuj ne estas ĝiaj ĉefaj zorgoj, sed anstataŭe tiuj, kiuj rilatas pri la aspektoj supre karakterizitaj (paragrafo 1.1) kiel *internaj*, alivorte pedagogiaj kaj didaktikaj temoj. En aliaj disciplinoj de sociologiaj sciencoj, ni povos trovi elementojn de respondo, precipe en du fakoj de specialiĝo: la lingvekonomiko (jam menciita en antaŭaj ĉapitroj de ĉi tiu studo) kaj la norma politika teorio; ili ambaŭ estas uzataj en la sekva sekcio.

5.2 Retefikoj kaj ilia konsidero

Retefikoj ekzistas rilate al iu ajn lingvo; ili tamen prezentas - ni jam vidis - neegalan gravecon depende de la konsiderata lingvo. Tial oni povas, kaze de regionaj aŭ minoritataj lingvoj, kontentiĝi per dinamikaj modeloj (laŭ la senco, ke ili eksplicite surscenigas pli ol unu periodon en la reprezentado de la konduto de la kunludantoj): la lingvaj elektoj faritaj de kunludanto i je la momento t modifas la kondiĉojn, kiuj validas je la momento $t+1$, kiam ili influos ne nur la elektojn de la kunludanto i , sed ankaŭ de aliaj agantoj j , k , l ktp. (Grin, 1992 [2002]).

Ekde la momento, kiam oni konsideras « grandajn » lingvojn, kiel la franca aŭ la angla, la konsiderado de tiuj retefikoj fariĝas nemalhavebla, eĉ se la analizmetodo permesas variojn. La problemo povas esti karakterizata jene: kiam individuo i lernas lingvon X , la rendimento de lia investo ne limiĝas al la uzo de tiu kompetento kaj al aliaj avantaĝoj (eventuale salajraj) kiuj profitas al la individuo i . Efektive, rezulte de tiu investo, la individuo i plilarĝigas la kvanton de la eventualaj parolantoj, kion profitas ĉiu persono j , k , l , ktp., kiu jam antaŭe parolis la

lingvon X. La valoro (aŭ ĉiukaze la uzebleco) de la lingvo X por ĉiuj tiuj personoj do kreskos, sen ke ili havis ajnan koston ĉe tiu profito, aŭ devis proponi iun ajn monan kompensaĵon al la individuo *i*. Tion la ekonomika teorio nomas « pozitiva ekstera efiko ». Temas pri kutima fenomeno, kiun oni ofte renkontas en fakoj, kia la publika ekonomiko aŭ la vivmedia ekonomiko. La neceso por ĝia apliko al kampo de la lingvoj ŝajnas evidenta, sed la demando estas nuntempe tute ne fintraktita.

Oni trovas en la literaturo pri lingvekonomiko kelkajn verkojn, kiuj esploras pli funde tiun fenomenon el ĝenerala teoria angulo. Tamen, se tiuj diversaj modeloj liveras utilajn pripensojn, la plimultaj ne proponas ĝeneralan vidpunkton, sur kiu povus firme apogi sin ia analizo de publika politiko.

Tiel, Dalmazzone proponas ĝeneralan enkondukon en la koncepton de ekstera efiko, indikante trian nivelon, kiu aldoniĝas al la du antaŭaj profitoj: ŝiaopinie, « “la disvastiĝo de iu komuna lingvo favoras la komercon, la disdividon de la scioj, kaj sekve la kreon kaj disvastigon de novigoj, ĝi faciligas la organizadon, la kunordigadon kaj la mastrumadon en la plimulto de la ekonomiaj kaj sociaj aktivecoj” » (Dalmazzone, 1998: 78). Tio ŝajnas plej saĝa rimarko, sed ne certas, ke ĝi konfirmiĝos ekzemple koncerne la komercajn fluojn. Efektive tiu aserto estas kontraŭdirita de unu el la tre maloftaj empiriaj studoj pri la temo (Noguer kaj Siscart, 2003), kiu male montras, ke posedo de komuna lingvo ne signife influas tiujn fluojn.

Diversaj aŭtoroj (precipe Carr, 1985) jam uzis la saman konceptilaron por proponi rekomendojn pri lingva politiko aŭ pri lingvinstrua politiko. Pli freŝdate, pere de pli teknika analizo, Church kaj King (1993) atingas sufiĉe similajn konkludojn: laŭmezure ke lingva diverseco okazigas transakcikostojn, precipe sed ne ekskluzive sur la internacia nivelo, la ekonomie plej bona solvo konsistas el redukto de tiuj transakciaj kostoj tiel ke oni favoras pere de subvencioj la lernadon de la « granda » lingvo far la parolantoj de la « malgranda » lingvo. Alidire, laŭ tiuj aŭtoroj la ĝeneraligita dulingveco estas neefika kaj ne devas esti kuraĝigata! Laŭ Church kaj King, la tiucela interveno de la ŝtato estas eĉ nemalhavebla, ĉar libera ludado de devigoj kaj instigoj povas montriĝi

37. Al Dalmazzone tamen mankas prudento, kiam ŝi plu skribas: «la lingva apartiĝo», kiam forestas iu "*lingua franca*", estas neakordigebla kun grava soci-ekonomia progreso [...]» (1998: 79). Se ne paroli pri la fakto, ke tiu aserto baziĝas sur la enspezo je loĝanto de diversaj landoj (aserto pri kiu Dalmazzone prikonsentas sampaĝe malgrandan fidindecon), ŝi tiel marĉandas kun tre multaj kontraŭaj ekzemploj kiuj forte malkredebligas tiun korelativon.

nesufiĉa por atingi kontentigan nivelon de lernado de la « granda » lingvo far la anoj de la « malgranda » lingvo.

Tamen la “Añila tendeno” de tiuj modeloj estas la relative malarĝa perspektivo, per kiu ili konsideras lingvojn kaj iliajn funkciojn. Esence, ili difinas lingvon nur kiel komunikilon kaj la komunikado ŝajne reduktiĝas al interŝanĝado de informoj. Tio kondukas al troa simpligo de la nocio - pli ĝenerala - de valoro de lingvo menciita en la 2-a ĉapitro, al la nekonsidero de la ekzisto de nekomercaj valoroj kaj al la preterlaso de ĉiuj distribuaj efikoj.

La studoj de Selten kaj Pool (1991, 1997) estas pli kompleksaj kaj esploras la strategiajn konsekvencojn, kiuj por la agantoj (interalie la lernantoj, kiuj devas elekti kiujn fremdajn lingvojn studi kaj ĝis kiu nivelo) dependas de la karakterizo de multaj retoj specifaj al la lingvo. Selten kaj Pool uzas la ludoteorion por esplori tiujn problemojn. Ni ne plue analizos tiujn studojn. Krom la fakto, ke tio postulus algebraĵojn, kiuj ege superus la kadron de tiu raporto, tiuj modeloj restas, miaopinie, malmulte uzeblaj en sia nuna stato, pro sia teoria karaktero. Grava laboro restas farota por rilatigi tiujn modelojn al la praktiko, kaj tiel pliigi ilian utilon por orienti la publikajn politikojn.

La lingvodinamiko estis antaŭ nelonge gastigata de la revuo "*Nature*", en artikolo de Abrams kaj Strogatz (2003). La esenca konkludo de tiu artikolo estas, ke ĝi prognozas la malstabilecon de dulingveco, kaj tiu prognozo ŝajnas konfirmata de la malkresko de lingvoj kiel la kimra, la skotgaela aŭ la keĉua. Tamen, ilia modelo estas samtempe tre meĥanikeca kaj tre makronivela, kio speguliĝas en la minimuma karakterizo (laŭ la vortoj de la aŭtoroj mem) de la konsideritaj motivigoj.³⁸ La daŭra ekzisto de komunumoj plejparte dulingvaj, kiel en Katalunio, Luksemburgio aŭ Andoro, dubigas pri la ĝusteco de ilia esplormaniero. Tamen du fizikistoj, Mira kaj Predes (2005), substrekis, ke tiu prognozo ankaŭ baziĝas sur la hipotezo, ke la lingvoj ege malsimilas. Aliflanke, se la koncernaj lingvoj estas similaj (kio estas la kazo en Galegio, kie loĝas la du aŭtoroj kaj kie la galegia kaj la kastilia grandskale kunvivas tra la plimulto de la socilingvaj "kampoj" de la ĉiutaga vivo), estas multe pli verŝajne, ke dulingveco konsistigas stabilan solvon. Tamen, malgraŭ sia eksplicita referenco al specifa kunteksto, la analizo de Mira kaj Paredes restas tre malproksima de vera teorio pri aganto vivanta en iu socia kaj politika kunteksto.

Laste, inter la studoj kiuj konsideras tiujn retefikojn, konvenas menciigi la lingvomodelon de De Swaan (2000). Tiu modelo estis specife alĝustigita por konsideri la dinamikon de lingvolernado

38. Ambaŭ aŭtoroj cetere estas rilatigitaj al universitata departemento pri teoria kaj praktika mekaniko.

en internacia kunteksto aplikebla al Eŭropo; tial ĝi akiris iun videblecon en la eŭropa debato pri lingvoj. Tial utilas konsideri ĝin kaj ekzameni, ĉu ĝi liveras al ni taŭgan analizon de lingvodinamiko.

Laŭ De Swaan, «lingvosistemo» konsistas el «konstelacioj» kiuj formas «galaksion». Komunikado inter grupoj parolantaj malsamajn lingvojn implicas hierarkian organizon: malgrandaj lingvoj organiziĝas ĉirkaŭ centra lingvo uzata por interkomunikado; parolantoj de iu centra lingvo siavice komunikas inter si pere de «supercentra» lingvo (kiun la aŭtoro identigas kiel la araba, la ĉina, la angla, la franca, la germana, la hindia, la japana, la malaja, la portugala, la rusa, la hispana kaj la svahila; 2000: 5). Laste, je la pinto de la sistemo troviĝas «hipercentra» lingvo, la angla. La avantaĝo de la analizo estas, ke ĝi hipotezas pri dinamiko de respektiva konverĝo al la centra lingvo, al la supercentra lingvo kaj al la hipercentra lingvo; tiu dinamiko baziĝas sur la mekanismo de «eksteraj efikoj» supre priskribita, kaj kiu estas redifinita per tio, kion De Swaan nomas la «Q-valoron». Tiu Q-valoron estas la aritmetika produkto de la *supereco* de iu lingvo (kiu estas indikilo de la grado, laŭ kiu ĝi estas sciata de la membroj de la komunumo, kiel denaska aŭ fremda lingvo) kaj de ĝia *centraleco*, kiu spegulas ĝian allogon inter la *plurlingvaj* membroj de la socio.³⁹

Supozu ke j estas la nombro de lingvoj kiuj ĉeestas en loĝantaro N . Se ni scias, ke ĉiu parolanto scipovas inter *unu* kaj s lingvojn, la nombro R de eblaj (kaj ekskluzivaj inter si) lingvaj repertuaroj, estas donita per $R = 2^s - 1$

Supozu repertuaron k de lingvoj, kiu entenas f_k individuojn (NdlT: ĝuste tiun kombinaĵon de lingvoj regas f_k individuoj); la aro de lingvoj aperantaj en tiu repertuaro estas notita h_k . Oni povas kalkuli p_A , la indicon de ofteco de lingvo A , kiel:

$$p_A = \sum_{k=1}^R \frac{f_k}{N} \quad \forall h_k \text{ tiel ke } A \in h_k.$$

Sammaniere, se la nombro de plurlingvanoj estas $M \leq N$, la indico de centraleco c_A estas donita per:

$$c_A = \sum_{l=1}^R \frac{f_l}{M}$$

kie la notacio uzita je la numeranto, f_l , malsamas al tiu, kiu estis farita en la antaŭa ekvacio por emfazi ke oni konsideras ĉi tie nur la repertuarojn de la plurlingvanoj.

³⁹ La notacio uzita de De Swaan en sia verko ofte estas malklara; oni penis ĉi tie reskribi lian raporton laŭ notacio pli travebla.

La *Q*-*valoro* de iu lingvo *A* esprimiĝas tiele: $Q_A = p_A \cdot c_A$. Tamen, kiel aliaj jam rimarkigis (interalie van Parijs, 2004a), tiu eleganta konstruaĵo kondukas al paradoksaj rezultoj. Pli precize, ni povas facile konstrui ekzemplojn, en kiuj iu tre domina lingvo malpli allogus eventualan lernanton ol malpli domina, nur pro tio ke la parolantoj de la domina lingvo estus malpli dulingvecemaj (kio malpliigas la valoron de la indico de *centraleco*, sur kiu baziĝas la analizo proponita de De Swaan). Finfine, la «“centraleco”» nur senutile komplikas la analizon, kaj verŝajnas, ke la nura «supereco», eventuale alĝustigita por ekhavi signifon, kiu preteriras nuran lingvodemografian sencon, estas pli decidiga instiganto en la lingvodinamiko.

Resume, la necesa konsidero de la eksteraj retefikoj ĝis nun ankoraŭ ne kondukis al kompleta kaj funkciiva analizo. Tamen, pro bezonoj de ĉi-studo, ni povas alpreni teorion de la lingvodinamiko, kiu - eĉ se ĝi ne eksplicite uzas la eksterajn retefikojn aŭ la ludoteorion (kaj evitas algebrajn formulojn, kiujn tia esplormaniero postulas) - sukcesas kapti la esencon de la konsiderataj mekanismoj. Ĝi ankaŭ evitas la nekoherencecon de la modelo de De Swaan. Tial ni uzos la modelon proponitan de van Parijs, kaj uzitan de li en pluraj verkoj (van Parijs 2001b, 2004a, 2004b). Ni tuj precizigu, ke la konkludoj pri publika politiko, kiujn van Parijs tiras el sia modelo, ŝajnas al ni eraraj (Grin, 2004c); aliflanke, la logiko de la lingvodinamiko estas tre efike prezentita en lia elegante simpla modelo.

5.3 Komunikado, utiligado kaj minimaksigo

La modelo de van Parijs situas ĉe la nivelo de individuaj agantoj. Ĝi atribuas al ili po du motivigojn koncerne la lernadon kaj respektive la utiligadon de fremdaj lingvoj.

Rilate la lernadon, van Parijs starigas hipotezon retroveblan ĉe preskaŭ ĉiuj aŭtoroj, kiuj eksplicite konsideras la fenomenon de eksteraj retefikoj: tio estas, ke la sociaj agantoj klopodas akiri utilajn lingvojn, kaj ke, ju pli granda estas la nombro da eventualaj parolantoj, kun kiuj iu lingvo ebligas interparoli, des pli tiu lingvo estas utila; tion van Parijs nomas «probability-sensitive learning». Ni nomu tiun principon: principo de la «uzebleco», por eviti ĉian konfuzon kun la koncepto de «utileco» renkontebla en ekonomika teorio.

La uzebleco dependas ne nur de la plej mekanisma lingvodemografio, ĉar ĝi estas dumaniere rafinebla sen fundamente modifi ĝian logikon. Unue, la kvalito de eventuala parolanto dependas de la kunteksto politika, ekonomia,

socia, kultura kaj geografia, en kiu la aganto vivas. Ekzemple, eĉ se la bengala havas mondscale multege pli da parolantoj ol la itala, la lernado de la itala povas resti, kadre de la modelo, pli utila al juna franco ol la lernado de la bengala, simple ĉar la probableco interparoli kun itallingvanoj estas pli granda. Tiu kvalifiko ne estas malgrava: ĝi dekomence memorigas al ni, ke en lingvodinamiko tro simplaj variabloj ne ĉiam taŭge servas al la analizo. Due, en konsiderata kunteksto, ĉiuj eventualaj interparolantoj ne same gravos: tion emfazas Selten, laŭ kiu tio, kion ni celas per lingvolernado, ne estas kruda komunikeblo sed *profitodona* komunikeblo (Selten, 1998: 175) - kio rekondukas nin proksimume al la unua hipotezo de la teorio pri la homa kapitalo. Ĉiukaze, ofte ekzistas korelativeco inter la profito donata de iu lingva kompetento kaj la nombro da personoj, kun kiuj ĝi ebligas komuniki; kaj ĉiukaze, kondiĉe ke tiu aranĝo ne fundamente modifus la logikon de la modelo, eblas tute konservi ĝian simplan version por la bezonoj de la analizo

La dua mekanismo, kiun uzas van Parijs, estas la principo, kiun li nomas la *minimaksigo*. Tiu termino estas ofte uzata en tute alia kunteksto, nome tiu de la teorioj de justeco, pri kiu van Parijs precize estas fakulo (vidu Arnsperger kaj van Parijs, 2003); ĉi-kaze temas pri la jena procezo. Ni supozu grupon konsistantan el n personoj, inter kiuj minimume $m \leq n$ havas malsamajn gepatrajn lingvojn. Ĉiuj tiuj personoj havas sian lingvan repertuaron (laŭ la signifo uzata de De Swaan; vidu la antaŭan paragrafon), kiu entenas, krom ilia gepatra lingvo, inter 0 kaj s fremdajn lingvojn. Tio konsistigas tion, kion ni povus nomi komunikada kunteksto⁴⁰. Estas tre verŝajne, ke ene de la grupo, en la repertuaro de la plimulto de la enstantaj personoj, ekzistas pli ol ununura lingvo, kiu estas aŭ gepatra aŭ fremda; tio principe malfermas plurajn paralelajn kanalojn de komunikado. Tamen, la efikeco en la komunikado igos la aliajn membrojn de la grupo elekti - ĉiuj ceteraĵoj restante egalaj - la lingvon, kies kompetento de la plej «“malforta”» el la partneroj estas la plej alta; alidirite, la grupanoj serĉos la lingvon, pri kiu la *minimuma* nivelo inter ĉiuj ĉeestantoj estas *maksimuma* - el kio venas la termino *minimaksigo* [NdIT], kiu resumas la ideon “maksimumigi la minimumon”.

Ni supozu, ke la lingvo kiu garantias tiun “minimaksigon” estas la lingvo X. Kio okazos, se unu aŭ pluraj personoj ene de la grupo tute ne kompetentas pri tiu lingvo? Laŭ la logiko de la modelo de van Parijs, la principo de “minimaksigo”

40. Van Parijs do uzas, same kiel pluraj aŭtoroj, probablecan formulmanieron por la komunikadaj konceptoj (Colomer, 1991, 1996): kio estas decidiga en tio estas la relativa probableco de la komunikadaj kunteksto, kiuj rezultus de la elekto el aleatora sampla de 2, 3, 4, ..., n personoj el certa populacio.

NdIT: la franca termino elpensita de van Parijs estas *maximin* el *maximum des minima* (maksimumo de la minimumoj).

“ tamen trudiĝos, se ne al la tuta grupo, almenaŭ al ĉiu granda subgrupo ene de tiu grupo: sufiĉas, ke la lingvo *X* arigas *pli multe* da partoprenantoj ol iu ajn alia lingvo *Y*, por esti elektata: tiukaze ĉiuj parolantoj flanklasitaj pro sia nekompreneo de la lingvo *X*, partoprenos al la grupo pere de posta interpretado fare de iuj grupanoj scipovantaj la lingvon *X*. Denove tiu mekanismo povas alĝustiĝi per iuj aranĝoj: iu lingvo *X*, kiu garantias la minimaksigon, sed aliflanke socie malakceptata, povos esti anstataŭigata per lingvo *Z* malpli «inkluziviga»; sed eĉ kun tiaj aranĝoj la mekanismo de disvastiĝo, kiun ĝi enkondukas, postrestos kaj tio estas, kio gravas, ĉefe en sia *interrilato* kun la principo de lingvoj «utilaj» por la komunikado.

Efektive, la fakto ke iu lingvo *X* garantias la minimaksigon pligrandigas la nombron da eblaj parolantoj, kun kiuj oni povos ĝin uzi: tie kuŝas forta instigo lerni la lingvon *X*. Sed se konsekvence, ju pli da personoj lernas la lingvon *X*, des pli ofte (pli formale: en tiom pli oftaj komunikadaj kuntekstoj) ĝi troviĝos en taŭga situacio por garantii tiun faman minimaksigon. Ekde tiam la verŝajneco ke ĝi estos alprenata kiel komunikadlingvo ene de multlingva grupo pligrandiĝas, kio por aliaj personoj plifortigas la avantaĝon lerni ĝin. La interagado inter la principoj de la minimaksigo kaj de la uzebleco kreas do ege fortan dinamikon de disvastiĝo de la lingvo *X*. La forto de tiu dinamiko povas nur pligrandiĝi pro la mil kaj unu formoj de la tutmondiĝo: ĉi-tiu multobligas la multlingvajn komunikadajn kuntekstojn, en kiuj la premoj por trovi efikan formon de komunikado estos konstante kreskantaj.

La modelo de van Parijs do proponas al ni, laŭ du simplaj ideoj, koheran kaj intuician teorion de la lingvodinamiko. Sendube eblas diversmaniere aranĝi kaj kompliki lian modelon, ĉerpante el analizoj proponitaj en la literaturo, foje dum pluraj jaroj.

Tiele, koncerne la *motivigojn*, eblas:

- ◊ anstataŭigi la uzeblecon per la esperataj rendimentoj, laŭ la logiko de la homa kapitalo (vidu paragrafon 3.2);
- ◊ enkalkuli, laŭ la rezonado klarigita en la 3-a ĉapitro, la “nemerkatajn” valorojn (vidu paragrafon 3.3);
- ◊ konsideri, laŭ la ekzemplo de iuj aŭtoroj inspiritaj de la teorio de raciaj elektoj aŭ de la ludoteorio, la pli malpli altajn kostojn de la lernado de diversaj lingvoj. Kvankam tiuj aŭtoroj konsideras nur la kostodiferencojn kaŭzitaĵojn de la diferencoj pro la denaskaj kompetentoj de la lernantoj, ili ankaŭ povas deveni de la lingvoj mem, aŭ de la malsimileco inter la gepatra lingvo de la lernanto kaj la cellingvo (Piron, 1994);

◇ « korekti » , pli malpli radikale, la nocion de uzebleco, per konsidero de diversaj simbolaj elementoj, kiaj la socia prestiĝo de la diversaj koncernaj lingvoj;

◇ meti la motivigojn en kuntekston per ilia relokigo en iun kulturen, politikan kaj socian kadron, kiu malfaciligas iujn opciojn kaj plialirebligas aliajn.

Kvankam ekzistas malpli multe da eblaj adaptoj rilate la “*minimaksigon*, la aplikado de tiu principo ankaŭ ebligas variojn. Efektive eblas:

◇ eksterlasi iujn lingvojn pro motivoj de politika aŭ kultura neakceptebla.

◇ prikonsenti pri la ebleco uzi, almenaŭ en iuj kunteksto kaj/aŭ sur iuj kampoj [- piednoto 41 -], alternadon de kodigo (« code switching »), do uzi plurajn lingvojn, kio kondukas al pli malpli fortaj devojiĝoj de minimaksigo; eblas kuraĝigi tiun strategion per multlingva interagado, en kiu diversaj partoprenantoj, dum ili esprimas sin en de si bone regata lingvo (gepatra aŭ fremda), posedas bonajn kompetentojn por kompreni aliajn lingvojn uzatajn de aliaj parolantoj, kiam estas ties vico esprimi ĝi.

◇ anstataŭigi la version strikte probablecan de komunikadaj kunteksto per analiza esplormaniero, kiu difinas kuntekstojn pli malpli adekvatajn por iu aro de agantoj (ekzemple “«la francoj»»), konsidere la politikan, ekonomian, socian, kulturen kaj geografian kadron en kiu ili vivas.

Ĉiukaze, la mekanismoj ellaboritaj en la modelo de van Parijs restas fundamente adekvataj eĉ kun tiuj diversaj adaptoj. El tio sekvas zorgiga konkludo: tiu estas, ke la lingvodinamiko povas nur rezultigi konverĝadon al hegemonio de ununura lingvo. Eĉ se tiu-ĉi ne necese havus la destinon elpuŝi ĉiujn aliajn lingvojn kiel unuajn, ĝi tamen superregus kiel internacia lingvo. [- piednoto 42 -] Kiuj estas la konsekvencoj? Tia estas la demando pritraktota en sekva paragrafo.

41. «Kampo» estas socilingvistika koncepto difinita kiel «grupo de sociaj situacioj tipe dominataj de komuna kondukregularo» (Fishman, 1977: 70).

42. Ni notu cetere, ke la analizoj de Church kaj King kaj de De Swaan, priskribitaj en la antaŭa paragrafo, alvenas pli-malpli al la samaj konkludoj; male, tiuj de Selten kaj Pool malproksimiĝas de ili; sed tiuj baziĝas sur pli kompleksaj analizoj klare malpli konataj inter esplorantoj, politikistoj kaj la publiko.

5.4. Lingvodinamiko kaj mastrumado de diverseco.

La interesoj multe superas la sciencajn demandojn, ĉar de ĝiaj malsamaj vidpunktoj devenas rekomendoj pri publika politiko, kaj ĉirilate ŝajnas al ni necese distingi nin de van Parijs. Tiom konvinka estas lia analizo de la lingvodinamiko, tiom logike kontraŭdireblaj estas liaj rekomendoj por la lingva politiko kaj la politiko pri lingvoinstruado.

Efektive, van Parijs eltiras el sia modelo konkludon, kiun, iom simpligita, oni povas resumi jene: «Ni ĉirkaŭbraku la tutanglan !». La amaskomunikila distrumetado de la penso de van Parijs [- piednoto 43 -], la obstineco de iuj periodaĵoj troigi la aferon [- piednoto 44 -], ĝis la entuziasmo, per kiu la Raporto de la *Komisiono de la nacia debato pri la estonteco de la Instrusistemo* rekomendas la devigan instruadon de la «angla de internacia komunikado», ĉio tio nutras komprenon tre ĝeneralan - sed falsan - ke la situacio ja estas sufiĉe klara kaj ke la afero estas solvita.

Antaŭ ol daŭrigi la diskuton, necesas ripeti evidentajn: ne kulpas la angla lingvo, sed la lingva hegemonio, kiu ajn lingvo profitas tiun hegemonion. Tia lingva hegemonio, kian van Parijs prognozas, estus bedaŭrinda solvo; se tiu lingva hegemonio devus okazi (kiel tio jam okazas) favore al la angla, tio estus tre malbona afero por Francio - same, cetere, kiel por ĉiuj neanglalingvaj ŝtatoj de Eŭropa Unio, kaj eĉ trans la Uniaj landlimoj. Kial? Ĉar tia solvo rezultigas plej maljustan redistribuon laŭ jenaj kvin aspektoj. Ili estas difinitaj pri la angla, sed ili kompreneble similas por ĉiu ajn hegemonia lingvo:

1) pozicio de kvazaŭ-monopolo sur la merkatoj de tradukado kaj interpretado al la angla, de redaktado de tekstoj en la angla, de

43 Vidu ekzemple la Mondo, Februaro 17 2004 p. 6.

44. Vidu ekzemple la plumpan triumfemon de la *Financial Times* («Mil taŭgaj kialoj fari la anglan universala lingvo», reprenitan en "*le Courier International*" n° 430, 28-an de januaro - 3-an de februaro 1999, p. 49-a), aŭ de *The Economist* («The triumph of English. A world empire by other means», 22-an de decembro 2001; «Sharp tongues. The Nordics' pragmatic choice is English», 14-an de junio 2003; «After Babel, a new common tongue», 7-an de aŭgusto 2004, pp. 23-24). sed la medalo sendube iru al *Sunday Times* de Londono de la 10-a de julio 1994: «The way of salvation for the french language is for english to be taught as vigorously as possible as the second language in all its schools [...] Only when the french recognize the dominance of Anglo-American English as the universal language in a shrinking world can they effectively defend their own distinctive culture [...] Britain must press ahead with the propagation of English and the British values which stand behind it» (citita de Phillipson, 2003: 150).

- produktado de pedagogia materialo por instruado de la angla, kaj de instruado de tiu lingvo;
- 2) la ŝparo de tempo kaj de mono en la internacia komunikado, ĉar ĉiuj nedenaskaj parolantoj penas esprimiĝi en la angla kaj konsentas akcepti mesaĝojn dissenditajn en tiu lingvo;
 - 3) la ŝparo de tempo kaj mono por la anglalingvanoj, pro la fakto ke ili ne plu multe penas por lerni aliajn lingvojn;
 - 4) la rendimento de investado en aliajn formojn de homa kapitalo de la monrimedoj, kiujn la anglalingvanoj ne plu bezonas investi en la lernadon de fremdaj lingvoj;
 - 5) la domina pozicio de anglalingvanoj en ĉiu situacio de intertraktado, de konkurenco aŭ de konflikto disvolviĝanta en la angla.

La ekzisto mem de tiuj distribuaj efikoj estas malmulte konata; necesas diri ke la esploroj, kiuj atentigas pri ili (jam de longe, iuj efikoj fakte estas jam menciitaj en la franca, vidu ekzemple Carr, 1985), restis relative konfidencaj. Ĝis nun ili ne estis la celo de detala taksado (Grin, 2004a); sed la antaŭtaksadoj faritaj en la ĉapitro 6 indikas, ke tiuj sumoj atingas miliardojn da eŭroj jare. Sur ĉiu alia kampo de la politiko, tiomaj transpagoj estus tuj publike malaprobataj kiel neakcepteblaj.

Tiu konstato starigas du demandojn: la unua estas, kial - spite al la evidenta maljusteco de tia redistribuiĝo - la plimulto de la ŝtatoj kaj la ĝenerala popolopinio ŝajnas akcepti ĝin kun tiom da indiferenteco. Tio estas des pli miriga, ĉar ĝi nur entenas ŝajnigan efikecon, kiel ni pli detale vidos en la sekva ĉapitro; alidire, la lingva hegemonio estas neefika koncerne la atribudadon de rimedoj, kaj maljusta koncerne la distribuadon de rimedoj. Kial, malgraŭ ĉio tio, la plimulto de la popolopinioj kaj de la decidantaro ŝajnas tiom konsentemaj, estas demando kiun ĝis nun oni ankoraŭ ne solvis (Phillipson, 2003) kaj eble tio dependas multe pli de socia psikologio ol de politika analizo.

La dua demando estas jena: ĉu la lingvodinamiko, kiu estas priskribita en pluraj modeloj, inter kiuj tiu de van Parijs, estas neevitebla? Jes sendube, *ene de la limoj de la analizo, kiel ĝi estas formulita*: la potenco de la kunagantaj mekanismoj pri uzebleco kaj pri minimaksigo estas konsiderinda. Sed eblas - eĉ nepras - rekonsideri la nevortigitajn hipotezojn: kiel ni rimarkigis komence de tiu ĉapitro, la decidoj alprenitaj pri lingva politiko kaj pri lingvinstrua politiko influas la kadron, en kiu tiuj decidoj estas alprenitaj. La lingvodinamiko laŭ la modelo de van Parijs efektive baziĝas sur la hipotezo, ke la aŭtoritatuloj kaj la grandega plimulto de la civitanoj (nunstate, pli ol 85% de la eŭropaj civitanoj el la 25 ŝtatoj; vidu

Aneksan 1) restas definitive blindaj al la malprofitoj kaŭzataj pro la «tutangla» scenaro. Nu, ekzistas alternativoj, sed ili estas konsidereblaj nur kondiĉe ke la ŝtatoj kunordigu siajn agadojn. Sen tia kunordigado la afero estas efektive finkonsentita. Sed la kunordigado inter ŝtatoj povas celi komunikadajn kuntekstojn, dum samtempe oni plene kunkalkulas la interagantajn mekanismojn de uzebleco kaj de minimaksigo, (Grin, 1999c); kaj sur la eŭropa nivelo, la ŝtatoj ja disponas pri efikaj manovriroj, kondiĉe ke ili bonvolas uzi ilin. Mais la coordination entre États, tout en prenant pleinement acte des mécanismes conjoints de l'utilisabilité et du maximin, peut viser les contextes communicationnels (Grin, 1999c); et sur le plan européen, les États disposent, pour autant qu'ils veulent bien s'en servir, de leviers efficaces.

Unue, eblas *reglamenti la laborlingvojn de la Unio*. La oficialaj lingvoj restu - minimume - la nunaj 21 oficialaj lingvoj, kaj preferinde inkluzivu pli multajn regionajn kaj minoritatajn lingvojn. [- piednoto 45 -] La motivo estas simpla: la dispozicioj alprenitaj de eŭropaj instancoj, kiam ili koncernas civitanojn, devas esti kompreneblaj en la gepatra lingvo de ĉi-tiuj (Podesta, 2001; Assemblée nationale, 2003; Gazzola, 2005a). Kiel oni povas facile demonstri (vidu Aneksaĵon 2), eĉ la reĝimo de kompleta multlingvismo (tia kia ĝi devus teorie aplikiĝi al Eŭropa Parlamento) [- piednoto 46 -] havas tolereblan koston; diversaj solvoj, kiuj uzas relaksan interpretadon (Gazzola, 2005b), ebligas malpliigi la kostojn de institucia multlingvismo. Ilia ĉefa malavantaĝo estas do ne tiu de kosto, sed tiu de malefikeco kaj de komplekseco. En tia situacio, nenio devigas la ŝtatojn submetiĝi al la ordono - tute kontraŭa al la propraj interesoj - alpreni la anglan kiel ununuran laborlingvon. Eĉ se ni flankenŝovas kelkajn pli-malpli neseriozajn proponojn [- piednoto 47 -], la elekto kaj la uzado de tiuj laborlingvoj povas okazi en diversaj manieroj. Ni pritraktos ankoraŭ diversajn scenarojn en la sekva ĉapitro.

Due, la ŝtatoj povas, almenaŭ je eŭropa nivelo kaj necesas rediri, nur se ili kunagos, *favori tiujn multlingvajn komunikadajn kuntekstojn*, kiuj foje malpermesas la anglan kiel neeviteblan rezulton de la procezo de minimaksigo, kompensante la fakton ke, sen interveno, praktike ĉiam, ĉiuj aliaj lingvoj estas flankenŝovitaj sekve de tiu procezo de minimaksigo. Necesas tiucele tiri praktikajn konsekvencojn el la laŭprincipaj deklaroj pri la beleco de multlingveco, por doni al ĝi iom da enhavo.

Ĉar en demokratiaj komunumoj la prilingva kondutado de agantoj ne devas, aŭ ĉiukaze ne povas esti trudita,

45. Ni memorigu, ke la irlanda lingvo, kiu estis nur « lingvo de traktato » (ankaŭ utiligebla antaŭ la Eŭropa Kortumo) ĝuas tutan oficialecon depost la printempo de 2005;

46. Estas escepto por la malta lingvo post la rezigno - far la Malta registaro okaze de ties aniĝo en Eŭropan Union - pri la agnosko de la malta kiel oficiala kaj labora lingvo.

47. Interalie tiu de la dana delegitaro, kiu estus proponinta, ke ĉiuj reprezentantoj de la membro-ŝtatoj rajtos sin esprimi anglalingve, kondiĉe ke la reprezentantoj de Britio (ni ne scias tion, kio estis dirita pri Irlando) sin esprimu franclingve (van Els, 2001: 325).

tiuj kunteksto povas esti favorataj precipe pere de la legitimado de neanglaj lingvoj. La dipozicioj specife alprenendaj tiucele devas minimume enteni la konservadon de la rajto de ŝtatoj postuli la uzadon de sia(j) oficiala(j) lingvo(j) por la etikedado de varoj kaj por la informado pri la konsisto de la varoj, pri ties uznoticoj kaj pri ties sekurecprekriboj, senkonsiere al la deveno de la varo, eĉ se de ene de la Unio (Nic Shuibhne, 2004b). La ŝtatoj devas do alpreni regulojn, verŝajne je la konstitucia nivelo, kiuj ebligu definitive refuti la asertojn, laŭ kiuj la postulo pri etikedado en nacia lingvo estas protektisma malhelpo kontraŭ la libera komercado (Feld, 1998; Jones, 2000).

La lingvaj normoj, kiuj aplikiĝas al la funkciado de la Komisiono, ankaŭ povas esti enreglamentigitaj kaj prezentas certan valoron, ju pli ili koncernas komunikadajn kuntekstojn, en kiuj civitanoj troviĝas: certaj dokumentoj kun oficiala karaktero (sed por kiuj kompleta multlingvismo jam ne plu estas devigita kaj ankoraŭ malpli aplikata, kiel por la dungofertoj de la Komisiono) povus tiel esti eldonitaj en malsamaj lingvoj ĉiujare denove. Gravus, ke tiu principo de laŭvicigo de lingvoj regule ekskluzivu la dominajn lingvojn, komence per la angla. Tio kondukus al adaptita formo de la ĉiujara laŭvicigo inter lingvaj grupoj uzata de Sud-Afriko por mastrumi siajn dek unu oficialajn lingvojn (Heugh, 2003) [- piednoto 48 -]. Konsekvence la ofertoj devus esti redaktitaj en unu el la koncernaj lingvoj, kiuj, laŭ la jaroj, ne devige entenus la anglan nek cetera la francan.

Iuj tuj objetos, ke tiuj proponoj malhelpas la internacian komunikadon ĝenerale, ke ili plikostigas la funkciadon de la eŭropaj instancoj kaj ke ili estas ekonomie neefikaj. Sed tio estus konsideri nur unu aspekton de la problemo. Fakte la kosto de komunikado komencas ne nur je la momento de interŝanĝo mem; ĝi entenas ankaŭ diversajn aliajn kostojn, inter kiuj estas tiuj listigitaj komence de la paragrafo. Unu el ili estas la kosto de akirado de lingvaj kompetentoj necesaj je la momento de interŝanĝo. La instruado de fremdaj lingvoj estas do rekte koncernita.

Tio kondukas nin al la tria manovrilo: eblas utiligi la instruadon de fremdaj lingvoj por bridi la lingvan hegemonion. Du strategioj estas konsidereblaj.

La unua kalkulas je la fakto, ke la realaj komunikadaj kunteksto ĉiukaze estas tre malsamaj kaj ke ekzistas pluraj, interalie en la

48 Vidu ankaŭ: http://www.dac.gov.za/about_us/cd_nat_language/language_policy/Language%20Policy%20and%20Plan%20for%20South%20Africa.htm#principles .

duopaj rilatoj, en kiuj la lingvo de minimaksigo ne estas necese la angla. Tio instigas plifortigi la instruadon - apud tiu de la angla - de lingvoj de gravaj ekonomiaj kaj kulturaj partneroj - kaze de Francio, precipe de la germana, la hispana kaj la itala. Vario de tiu strategio, subtenata de Françoise Ploquin⁴⁹, estas kuraĝigi formon enfokusigitan al plurlingveco kaj strukturitan ĉirkaŭ la lingvaj familioj ekzistantaj ene de Eŭropo (la latinaj lingvoj, la ĝermanaj lingvoj, kaj la slavaj lingvoj). Specife emfazinda estus la disvolviĝo de pasiva komprenado de la lingvoj kiuj apartenas al la sama lingva familio kiel la gepatra lingvo de la lernanto. Tiam, kaze de kunveno inter latinlingvaj parolantoj (la franca, itala, hispana kaj portugala), ĉiu povus esprimiĝi en sia lingvo kun ĉia facileco kaj fleksebleco tiel eblaj, kaj dume ĉiu estus komprenata de la aliaj; la sama principo validus por la ĝermanaj lingvoj kaj la slavaj lingvoj; la koncepto aliflanke mutas pri tio, kio okazus kun aliaj oficialaj lingvoj ene de Eŭropa Unio⁵⁰, sen paroli pri ĝiaj konsekvencoj por la parolantoj de regionaj aŭ minoritataj lingvoj.

Kvankam tia strategio povus kontribui al daŭrigado de la diverseco, ne certas, ke ĝi sufiĉus por garantii ĝin, ĉar nenio montras, ke la nombro da okazoj de kontakto ene de sama lingva familio kreskos kompare al la nombro da okazoj de kontakto inter personoj de malsamaj lingvaj familioj. Tute male, la intermiksiĝo de lingvoj kaj de kulturoj emos krei pli da novaj malsamaj lingvaj kombinaĵoj, kiujn ĉiu renkontos kaj tiam denove la angla estos plej ofte la lingvo, kiu certigas minimaksigon. Se tio konfirmiĝas en Bruselaj kontaktoj, kial hispanoj penus por lerni la francan, aŭ francoj por lerni la hispanan, dum la angla povas tute facile solvi la problemon? Sola, tiu «orientita» plurlingveco havas do malmulte da ŝancoj bremsi la dinamikon de la «tutangla» scenaro aŭ limigi la maljustan redistribuon, kiun ni menciis. Ni tamen vidos, en la sekva ĉapitro, ke eblas serĉi tiudirekten aranĝon por efektiviĝi «plurlingvisman» politikon, kiu garantias kompletan interkomprenon sen postuli la lernadon far ĉiuj de tro granda nombro da fremdaj lingvoj; tamen tiu strategio ne povas ekzisti sen akompanaj aranĝoj, kiuj preventas devojiĝon al lingva hegemonio ekzemple favore al la angla.

49 *Le Monde Diplomatique*, Januaro 2005 pp. 22-23.

50. Temas interalie pri:

a) ene de la hindeŭropa lingva familio, la litva kaj la litova (balt-slava grupo), la greka (izolita) kaj la irlanda (kelta);
 b) inter la ne hindeŭropaj lingvoj, la finna, la estona kaj la hungara (finn-ugra familio, do ne ano de la familio de la lingvoj hindeŭropaj), kaj la malta (semida familio) (vid. ekzemple Kersaudy, 2001).

Pro tio necesas rememorigi la ekziston de tria strategio, nome la investadon, je longedaŭra tempolimo kaj nepre kunordigotan inter la membro-ŝtatoj de la Unio, en la instruadon de Esperanto. Tiu-ĉi raporto ne celas ĝisabsolute defendi tiun opcion, ĉar oni scias ke ĝi ofte okazigas pasiajn reagojn aŭ ke ĝi estas tuj forĵetita sen ia ajn argumento aŭ surbaze de argumentoj, kiuj nur baziĝas sur miriga ignoro (Piron, 1994, 2002). Tamen, kiel ni vidos en la 6a ĉapitro, tio estas sendube la plej bona solvo, escepte se oni povas garantii la stabilecon de iu scenaro ververe multlingva, kaze de kio multlingveco estas sendube preferinda: ni ja povas opinii, ke por multaj eŭropanoj estas ja la multlingveco, kiu esprimas plej bone la kolektivan identecon de Eŭropo; tiun senton ni komparu kun la ideo - kiu preteriras spritaĵon - ke la lingvo de Eŭropo estas la tradukado.⁵¹ Necesas tamen rememorigi evidentecon: la uzo de esperanto unubate forigas ĉiujn problemojn pri egalrajteco supre menciitajn; kaj la lernado de tiu lingvo estas ege malpli kosta (minimume 1 je 5; iuj asertas 1 je 10) ol la lernado de la angla. Do la uzo de esperanto evidente profitigus pli ol 85%n de la eŭropaj civitanoj, precipe post la plilarĝiĝo okazinta en 2004.⁵² Konsidere la reputacion de eksmodeco kunportatan de esperanto, tiu lasta konkludo povas surprizi, precipe kadre de esploro kiu referencas ekonomiajn konceptojn; ni tamen atentigos, ke inter la advokatoj de tiu solvo troviĝas Nobel-premiito pri ekonomio, Reinhard Selten (vid. Selten, 1998). Tamen, tia rekomendo havus nuntempe nenian politikan estontecon, kiuj ajn estus la argumentoj prezentitaj por apogi ĝin. Tial ni taksos ne nur tri scenarojn (ĉapitro 6-a), sed ankaŭ du malsamajn strategiojn (ĉapitro 7a) diferencigante strategion aplikeblan je longedaŭra tempolimo, kaj strategion por mallongedaŭra tempolimo. Nenio malpermesas recizigi kaj pludividi la tri scenarojn dum plidaŭrigo de tiu ĉi studo kaj fari mozaikon, kombinante ilin kadre de pli detaligita strategio.

51. Aliaj proponis, ke oni alprenu la latinan kiel "*lingua franca*"-n (Sturm, 2002). Laŭ analiza vidpunkto, tiu solvo proksimiĝas al la solvo «Esperanto», krom tio, ke ĝi estus pli multekosta pro la malfacileco de la latina rilate Esperanton, kaj malpli justa, ĉar ĝi klare privilegias la personojn kies gepatra lingvo estas latinida lingvo.

52 Vidu noton 74.

ĈAPITRO 6

TRI SCENARIOJ

6.1 La principo de komparado inter scenaroj

Ĉi ĉapitro estas dediĉita al cifera komparado de diversaj scenaroj. La komparmaniero tamen ne eliras el la diversaj eblaj politikoj pri fremdlingvoinstruado. Male, ĝi eliras el la prikonsiderindaj lingvaj situacioj, kiuj estas, laŭ logiko de lingva politiko, la veraj objektoj por elekto de publika politiko. Elirante de tiuj lingvaj situacioj, oni kapablas determini, kiuj instrupolitikoj necesas por kontribui al ties konkretiĝo. La konservita maniero do devenas el analizo de politikoj en plej ĝenerala senco, kaj referencas en plej ĝenerala senco al la nocio de ekstera efikeco, kiel ĝi estis skizita en la unua ĉapitro.

Al ĉiu lingva situacio oni atribuos scenaron kaj por ĉiu el ili oni provos identigi la kostojn, profitojn kaj transpagojn, por dedukti ĝeneralan bilancon el ili. Nepras substreki, ke la ciferoj utiligitaj en ĉi-ĉapitro donas nur proksimumajn kvantojn. Ili ne havas alian funkcion ol tre krude identigi la koncernajn sumojn kaj ili estu taksitaj multe pli detale, se oni deziras pliprofundigi la analizon ĉi tie prezentita. Nune, tamen tiuj proksimumaj kvantoj ebligas — miascie je la unua fojo — komparon de tiuj scenaroj inter si, laŭ logiko de pripolitika analizo.

La kompara ekzerco necesigas kuntekston, ĉar estas nur en funkcio de ĝi, ke proksimumaj sumoj estas difineblaj. Oni elektis ĉi-kaze Eŭropan Union kiel kuntekston; tamen en posta fazo de la esploro la taksado ankaŭ povus — eble devus — esti ellaborata kun referenco al tutmonda kunteksto.

Kiel paragrafo 1.1 indikis, ĉi-studo ne pritraktas la dimensiojn kulturajn, sociajn kaj politikajn, pri kiuj temas plej multaj kontribuoj en debato pri

lingvoj en Eŭropo (vidu sekcion 1.1 kaj referencojn donitajn en ĉi-paragrafo). Kompreneble, tiuj dimensioj tamen estas tute trafaj. Ili povas do esti kombinitaj kun la rezultoj prezentitaj ĉi tie por generi pli kompletan kaj pli precizan bazon por decidi.

La komparo inter la diversaj scenaroj baziĝas sur jenaj elementoj:

- 1) la difino de lingva situacio, reference al la eŭropa kunteksto;
- 2) la identigo de la profitoj, nome pri interkompreniĝo, rilatitaj al ĉiu situacio;
- 3) tre simpligita difino de la gvidlinioj de instrupolitiko de fremdaj lingvoj, kiun ĉiu situacio supozigas;
- 4) la kostoj por la eduksistemo, rilate al tiuj instrupolitiko;
- 5) la transpagoj okazigataj en ĉiu lingva situacio, kun distingo de, konforme al la analizo de la antaŭa ĉapitro: (i) la privilegiitaj merkatoj; (ii) la ekonomio de peno en la komunikado; (iii) la ekonomio de peno en la instruado de fremdaj lingvoj; (iv) la rendimentoj de la ekonomio realigita en tiu instruado. Kontraŭe, miascie ne ekzistas rimedo por taksii, eĉ maldetale, la efikon de pravigo (do pri la maljusta pozicio de supereco en situacioj de intertraktado kaj de konflikto) kiu, laŭ la lingvaj situacioj, povus esti atribuita al la parolantoj de privilegiita(j) lingvo(j). Atendante ke solvo estu trovebla por tiu delikata problemo, la efiko de pravigo (aliloke nomata « efiko retora » vidu Grin, 2004a) estas supozata inkluzivita en la sociaj kaj kulturaj dimensioj cititaj ĉi-supre. Malgraŭ tio ĝi devas konservi decidigan gravecon en ĉiu taksado.

Do nunstate ok specoj de baza informo devas esti atribuitaj al ĉiu scenaro. Iuj inter ili meritas ĉi tie komentariojn enkonduke al la fakta taksado.

6.2 La lingvaj situacioj

Dum la ekzamenado ni pritraktos tri lingvajn situaciojn, al kiuj estos atribuitaj tri bazaj scenaroj: la “tutangla”, la “multlingvisma” kaj la “Esperanta” scenaroj. En dua fazo oni povas ankoraŭ rafini ĉiun el tiuj scenaroj kaj konsideri kombinon inter ili.

La “tutangla” scenaro respondas al tio, kion la modeloj de Pool (1996) kaj Grin (1994a) nomas la modelo “monarka” (Vidu Aldonaĵon A2): unu lingvo trudas sin kiel sola oficiala lingvo kaj laborlingvo de Eŭropa Unio; ĝi iĝas la lingvo de internacia komunikado je niveloj komerca, scienca kaj kultura; kaj

ĝi ankaŭ iĝas la lingvo kiu allogas sociajn aktivulojn dum privata interago kun personoj de alia gepatra lingvo. Tio estas pli malpli la *prognozata* modelo de Van Parijs, De Swaan, aŭ Abrams kaj Strogatz, kies analizoj estis prezentitaj en la antaŭa ĉapitro. Estas krome tiu modelo, kiun *rekomendas* aŭtoroj kiel Van Parijs kaj, implicite, la sufiĉe multnombraj aktivuloj sciencaj kaj politikaj, kiuj parolas pri multlingvismo kies celo estas enkadrigi, reteni aŭ kompletigi la anglan: sed ĉar ili ne provizas ŝirmilon por kontraŭstari la kunan logikon de uzebleco kaj minimaksigo, iliaj rekomendoj kondukas, je longa daŭro, al la “tutangla” scenaro.

“Multlingvismo” estas lingva reĝimo, kiu supozigas, ke internacia komunikado estas organizita tiel, ke ĝi *efektive* okazas en pluraj lingvoj.⁵³ Ĝi devas estu karakterizata ne nur je nivelo de la instancoj de Eŭropa Unio (tiukaze povus temi pri la modelo “oligarkia” aŭ “panarkia”, eventuale “teknokrata” aŭ “triole relaksa” ĉe Pool (1996) aŭ Grin (1994a); *vidu* Aldonaĵon A2), sed ankaŭ je la nivelo de la ĉiutaga komunikado inter eŭropanoj. Kiel ni vidis en sekcio 5.3, la dinamiko de uzebleco kaj de minimaksigo estas tiel forta, ke multlingva funkciado estas esperebla nur kun provizo de helpa flankregularo, el kiu kelkaj dispozicioj estos skizitaj en paragrafo 7.2. Mi ĉi tie ne pli detale preparolos la difinon de tiaj dispozicioj, sed gravas substreki, ke estas pro tiuj dispozicioj, ke la “multlingva” situacio, ĉi tie menciita, distingas sin de la “plurlingvismo” aŭ “multlingvismo” kiujn eŭropaj oficialuloj daŭre invokas. Ĝi ankaŭ diferenciĝas de la multlingvismo sen ŝirmilo, kiun rekomendas multaj aŭtoroj, sen konsciiĝi, ke manke de tiaj ŝirmiloj, ĝi estas fundamente malstabila kaj nepre estos anstataŭigita de la “tutangla” pro la kunagada dinamiko de uzebleco kaj minimaksimigo.

La multlingvismo, pri kiu temas ĉi tie, celas esti stabila. Substrekendas, ke la multlingvismo, pri kiu temas en scenaro 2 *ne necese* respondas al la proponoj (esence “oligarkiaj”) defenditaj de Ginsburgh kaj Weber (2003) aŭ Fidrmuc kaj Ginsburgh (2004). Fakte ilia analizo, kiu traktas nur

53 La literaturo parolas jen pri « plurlingvismo », jen pri « multlingvismo ». Depende de la aŭtoroj la distingo inter la du terminoj ne estas la sama. Laŭ iuj « multlingvismo » signifas ĝeneralan nocion de diverseco de la lingvoj, sen identigo de la lingvoj, kiuj estigas tiun diversecon, dum « plurlingvismo » supozigas nombreblan diversecon, tio estas, ke la nombro da ĉeestaj lingvoj estas specifita. Laŭ aliaj aŭtoroj plurlingvismo estas individua kompetento, dum multlingvismo montras la diversecon de ĉeestaj lingvoj en la sociala spaco. Por la bezonoj de ĉi-studo oni uzos la lastan difinon, tiel ke la scenaro 2 nomiĝos « multlingvisma »; estas tamen klare, ke ĝia efektivigo postulos la plurlingvismon de la individuoj, rezerve de ĉiea kaj malmultekosta oferto pri traduko- kaj interpretado-servoj.

la laborlingvojn en Eŭropa Unio, apenaŭ konsideras la demando pri la lingva situacio, kaj do ne povas esti konsiderata kiel kompleta esplormaniero rilate la takson de politikoj. Aliflanke ankaŭ substrekendas, ke, kvankam estu proponitaj certaj garantioj rilate interkomunikadon, sen tiucele supozi lernadon far ĉiuj de tre granda nombro da fremdaj lingvoj, la *praktika* efektivigo de la scenaro “multlingvisma” supozigas, ke certaj lingvoj profitas el privilegian statuson. Tio proksimigas la praktikan multlingvismon al oligarkia sistemo (kontraste al la teoria multlingvismo). Donite ke la praktika efektivigo de tiu scenaro realigeblas laŭ multegaj diversaj manieroj (laŭ la konsideritaj hipotezoj pri la nombro da lingvoj profitantaj de tiu speciala statuso kaj pri la nombro da fremdaj lingvoj, kiujn la eŭropaj civitanoj estos supozataj lerni), ni atentigas en ĉi-studo pri speciala realigo de multlingvismo, kiu privilegias tri lingvojn el 20 (aŭ 21; vidu noton n° 54); oni trovos en sekvantaj paragrafoj pliajn detalojn pri la preciza enhavo de la multlingvismo, por kiu komparoj estas ellaboritaj.

La solvo “Esperanta” respondas al la reĝimo “sinarkia” (vidu Aldonaĵon A2). Unuavide oni povus pensi, ke temas nur pri anstataŭigo de la angla per Esperanto kaj ke temas pri “tutesperanta” anstataŭ “tutangla”. Malgraŭ tiu supraĵa simileco la diferencoj inter ambaŭ lingvaj situacioj estas amplekseĝaj. Unue, kiel oni jam rimarkigis en la sekcio 5.4, uzado de Esperanto tuj forigas ĉiujn maljustajn transpagojn okazigitajn de la “tutangla”; tio aplikiĝas same al la “efiko de legitimado” aŭ “efiko retora”, pri kies kvantigo mi ĉi tie rezignas; la simbola graveco de tiu efiko, ni ripetu, restas gravega. Ni havos okazon plutrakti ĝin en sekvanta sekcio. Due, la lernado de Esperanto estas konsiderinde pli rapida ol tiu de ajna alia lingvo kaj, diversgrade, tiu supereco evidentiĝas sendepende de la gepatra lingvo de la lernanto. Ĝi estas eble pli evidenta por personoj, kies gepatra lingvo estas latinida, sed ĝi ekzistas ankaŭ por tiuj, kies gepatra lingvo estas ĝermana aŭ slava, eĉ ne hindeŭropa, malgraŭ vortaro kun esence hindeŭropa origino (Piron, 1994; Flochon, 2000). Trie, ĉar Esperanto estas nenies lingvo kaj, pro tio, povas facile iĝi ĉies lingvo (Mullarney, 1999), ĝia disvastiĝo estas malpli minaca por la aktualaj Eŭropaj lingvoj ol estas la disvastiĝo de la angla.

6.3 La profitoj

Kiel ni konstatis en ĉapitro 2, la profitoj atribuitaj al diversaj lingvaj situacioj estas tiel variaj, ke oni vane provus priskribi ilin komplete; samtempe estas absolute necese, ke ili ne limiĝas nur al interkompreniĝo. Tion dirite, la eblo por ĉiu eŭropano

komuniki kun ĉiuj aliaj, estas sendube la plej ofte citita el la esperataj profitoj, kaj ni emfazos ĝin antaŭ ol plivastigi la kampon. La sumo de la komunikadaj profitoj estas evidente identa por la scenaroj 1 kaj 3, en kiuj la interkompreniĝo okazas respektive en la angla kaj en Esperanto; la situacio estas pli kompleksa kaze de scenaro 2, kaj la multlingvismo, kiun ĝi supozigas, devas esti detaligita. Fakte, se ĉiu eŭropano lernas fremdlingvon, sen konverĝi en tio al la sama lingvo, la rekta komunikado inter du personoj hazarde prenitaj ne estas garantiĝebla. Ĝi povas nur okazi, se ĉiu lernas grandegan nombron da lingvoj. Pli precize, se oni volas certigi, ke du hazarde prenitaj eŭropanoj kun malsama gepatra lingvo povu ĉiam komuniki sen interpretisto, la nombro da lingvoj, kiujn ĉiu devas lerni (supozante, ke ĉiu same penas) estas dek.⁵⁴ En situacio kun N lingvoj, tiu nombro egalas $N/2$ se N estas para kaj $(N-1)/2$ se N estas malpara. En la lasta kazo la du interparolantoj havos almenaŭ unu lingvon komunan, sed en la kazo, kie N estas para, ili nepre havos du lingvojn komunajn.

Nu, la garantio, ke ĉiu dupersona grupo ĉiam disponas pri komuna lingvo, ne estas sufiĉa atingiĝo kaj ne ebligas la interkompreniĝon de la speco kiu interesas nin ĉi tie: anstataŭe gravas eltrovi, kiel pli grandaj grupoj (eĉ la tuto de la loĝantoj de membroŝtatoj) povas interkomuniki, ĉu en buŝa interago, ĉu uzante certajn skribajn mediojn. Estas tiu postulema versio de la komunikado, kiun ni ĉi tie nomos "*interkompreniĝo*".

Fakte la nombro da lingvoj lernendaj por garantii la interkompreniĝon kreskas laŭ la amplekso de la grupo (en terminoj de la nombro de malsamaj gepatraj lingvoj tie reprezentataj), se oni ne enkondukas plian hipotezon pri eventuala kompromiso inter individuoj koncerne la fremdajn lingvojn, kiujn ili lernas. Tiel, en situacio kun N lingvoj por tuta populacio de M individuoj la nombro da lingvoj, kiujn ĉiu partoprenanto scipovu (inkluzive la gepatran lingvon) por ke ĉiu grupo kun Z partoprenantoj hazarde prenitaj ($Z=1, \dots, M$) havu almenaŭ unu komunan lingvon egalas al

$$\lfloor (Z-1)/Z \rfloor * N + 1 \quad \forall Z < N + 1$$

rondigita malsupren. Por ĉiu $Z \geq N + 1$ oni restos ĉe N lingvoj, ĉar evidente interkompreniĝo ne motivigus lerni plian.

⁵⁴ Oni supozis ĉi tie, ke $N=20$, kvankam la nombro da oficialaj lingvoj baldaŭ transiros al 21, pro alkalkulo de la irlanda, kiu obtenos je la 1a januaro 2007, la saman statuson de oficialeco kiel la 20 aliaj naciaj lingvoj (*Oficiala ĵurnalo de Eŭropa Unio*, L 156 de la 18a de junio 2005, je paĝoj 3-4). Oni do akceptis ĉi tie, ke ĉiuj personoj kun gepatra lingvo irlanda plu lernos la anglan je la sama aĝo kaj aktivante la samajn procezojn scipovajn, kiel la personoj kun gepatra lingvo angla.

En Eŭropo, kies membroŝtatoj enkalkulas ekde nun 21 lingvojn ⁵⁵, multlingva komunikado ne plu povas resti pure hazarda, kaj konvenas nun precizigi, kion la scenaro de multlingvismo kovras, por ebligi komparon al la du aliaj scenaroj.

En la cetero de ĉi diskuto oni do difinas “plurlingvismon” kiel specifan formon de la modelo « 1+2 » rekomendita ambaŭ de Eŭropa Unio kaj de Eŭropa Konsilio: ĉiu eŭropa enloĝanto devus regi du lingvojn krom sia propra gepatra lingvo. Tamen, ĉi tiu “modelo” estas ofte komprenita kiel enhavanta unu fremdlingvon de larĝa komunikado, nome la anglan kaj aldone la ĉefan lingvon de najbara ŝtato. En ĉi-raporto ni difinas la triopon da lingvoj iom alie. Fakte, eĉ se temas nur pri certigo de la interkompreniĝado de ĉiu subgrupo de *du* loĝantoj hazarde prenitaj, nepras ke la repertuaro de ĉiu eŭropano enhavu almenaŭ du lingvojn elektitajn *el donita subgrupo de tri lingvoj*. Laŭ la supra rezonado tio do samas al doni privilegian statuson al certaj lingvoj, kaj ĉi tie por la bezonoj de la studo, oni toleru ke temas pri la angla, la franca kaj la germana.

La plurlingvismo ne estas do scenaro perfekte egalrajta: fakte, eĉ se oni akceptas, ke ĉiu eŭropano lernas du fremdajn lingvojn, oni povos distingi du situaciojn: por personoj kun gepatra lingvo angla, franca aŭ germana sufiĉas ke *unu* el tiuj du fremdaj lingvoj estu elektata el tiu grupo de tri lingvoj, sed la dua fremdlingvo povas perfekte esti alia — ekzemple la itala, la japana aŭ la kimra. Kontraŭe por persono kun gepatra lingvo estona aŭ portugala la dua fremda lingvo devas veni el la triopo angla-franca-germana. Ĉiu alia lingvo (denove, ĉu temas pri la itala, la japana aŭ la kimra) devus esti lernata nur kiel *tria* fremdlingvo. Tiu malsimetrio havas konsekvencojn por la komparo de la scenaroj kaj ni denove pritraktos ĝin poste en ĉi-ĉapitro.

Tamen gravas noti, ke eĉ tiu limigo ne certigas la interkompreniĝon supre difinitan, (kondiĉo necesa, por povi aserti, ke plurlingvismo garantias samajn oportunecon pri interkomprenado, kiel la “tutangla” scenaro aŭ Esperanto). Fakte, se la plurlingvismo, pri kiu temas ĉi tie, efektive diferencigu de lingva hegemonio, tio supozigas, ke la membroŝtatoj estos alprenintaj verajn

55 Tamen, dum transira periodo de 30 monatoj, ekde la 1a de majo 2004, esceptaj reguloj, kiuj povus esti plidaŭrigataj dum maksimume unu jaron, aplikigis al la malta lingvo. Tiu ĉi, kvankam oficiala, ne estos sisteme uzata de la instancoj de la Unio, antaŭ kiam la tradukistoj kaj interpretistoj pri la malta estos formitaj en sufiĉa nombro (Oficiala ĵurnalo de Eŭropa Unio, L 169 de la 1a de majo 2004, je paĝoj 1-2).

kuraĝigajn aranĝojn favore al uzado de pluraj lingvoj. Se tiuj aranĝoj ne estas efikaj, oni revenos al la scenaro “tutangla”; sed se ili efikas, oni povas atendi, kvazaŭ laŭdifine, ke la eŭropaj civitanoj, kies gepatra lingvo estas nek la angla, nek la franca, nek la germana, lernos du el tiuj lingvoj en proksimume samaj proporcioj. En longa daŭro la eŭropanoj (krom tiuj, kies lingvo estas la angla, la franca aŭ la germana) dividiĝos en tri grandajn grupojn: tiuj, kies lingva repertuaro inkludas kiel fremdajn lingvojn la anglan kaj la francan (« AF »), la francan kaj la germanan (« FG ») kaj la anglan kaj la germanan (« AG »).

Kiun interkompreniĝon ni tiam povas esperi? Por simpligi la kalkuladon, ni akceptu, ke la franclingvanoj, la anglalingvanoj kaj la germanlingvanoj lernas la lingvojn unu de la alia tiamaniere ke la kompetentoj dividiĝas en tri *proksimume* egalaj trionoj; tio supozigas ankaŭ, ke la franclingvanoj, anglalingvanoj kaj germanlingvanoj, povantaj elekti sian duan fremdlingvon, elektas alian lingvon — kiu povos same bone esti la hispana, la japana aŭ la kimra. Ni akceptos ankaŭ, ke ĉiuj eŭropanoj estas trilingvaj (en apliko de la modelo « 1+2 ») tamen ne kvarlingvaj. En tia kazo, se oni certas, ke ĉiu paro da eŭropanoj hazarde prenitaj, ĉiam havos almenaŭ unu komunan lingvon, oni ankaŭ certas, ke en ĉiu aleatora grupo enhavanta du trionojn de la eŭropanoj plus unu, ne eblas, ke ekzistas lingvo konata de *ĉiuj* membroj de tiu grupo; kia ajn estu la elektita lingvo (la angla, franca aŭ germana), almenaŭ unu partoprenanto estos flanklasita.

Ĝenerale (kaj kun ĉiuj simpligantaj kondiĉoj ĉi tie akceptitaj) la probableco P , ke neniu partoprenanto estos forlasita en totala populacio de M individuoj, el kiuj oni prenas grupojn de amplekso Z , reprezentiga per:

$$P(Z, M) = 3 * \frac{C_Z^{2M/3}}{C_Z^M} - 3 * \frac{C_Z^{M/3}}{C_Z^M} = 3 * \frac{(C_Z^{2M/3} - C_Z^{M/3})}{C_Z^M} \quad \forall Z \leq M/3$$

kie la esprimo C_k^n , kiu difinas la nombron da kombinaĵoj sen ripetoj de k elementoj hazarde prenitaj el

$$n, \text{ egalas al } \binom{n}{k} = \frac{n!}{k!(n-k)!}$$

Laŭ kalkulo de probableco tiu taksado validas por altaj valoroj de M . Sed ekde kiam M estas alta, ĝi ne plu gravas: kiu ajn estu la grandeco de la populacio, el kiu oni prenas la subgrupojn de interkomunikantoj, la valoro de tiu probableco rapide malpliĝas laŭ kreskanta Z , tio estas la nombro da partoprenantoj en la interparolo. Tiel, la probableco, ke simpla triopo, hazarde prenita inter 10.000 personoj, havas komunan lingvon estas proksimume 77,8%, kaj ekde kiam temas pri grupo de 20 personoj, tiu probableco falas al 0,09%.

Efektive kunveno de dudek personoj, eĉ se prenitaj el subgrupo de populacio mem difinita surbaze de vera probableco de interagado tia, kia povas rezulti el iu profesia kunteksto, ofte okazas, kaj la modelo «1+2» tie ne garantias interkompreniĝon.

Ni prenu la ekzemplon de la 32 158 permanentaj kaj portempaj oficistoj aktivaj en 2003 en la kvin eŭropaj institucioj (Parlamento, Konsilio, Komisiono, Kortumo kaj Revizora Kortumo)⁵⁷. La probableco, ke la uzo de unu el la tri lingvoj de la triopo angla-franca-germana ne ekskluzivos unu elinter la aŭskultantaro de 20 oficistoj estas tre malalta, ĉar laŭ la ĉi-supra formulo, ankaŭ tiu estas malpli ol 0,1%. Alidire, estas kvazaŭ certe, ke almenaŭ unu partoprenanto havas lingvorepertuaron, kiu, kvankam perfekte konforma al la modelo « 1+2 » kaj kiu krome enhavas du el la tri lingvoj de privilegiita «triopo », ne enhavas la lingvon elektitan por tiu kunveno.⁵⁷

Plurlingvismo sub la formo de modelo « 1+2 » do ne liveras la samajn garantiojn kiel aliaj scenaroj, nivele de la komunikado. Estas penseblaj diversaj alternativoj, kiuj donas ĉiujn garantiojn pri interkompreniĝo: unue, la transiro al modelo de speco « 1+3 », se la tri fremdaj lingvoj venis el la « triopo » —, kio tamen supozigas konsiderindan investadon en la instruadon de fremdaj lingvoj; due, la malpliigo de la nombro de privilegiitaj lingvoj de tri al du — kio, laŭ ĉiu probableco, ne estus politike defendebla; trie, la transiro al modelo, en kiu oni lernas unu fremdan lingvon de la triopo, kaj akiras altajn *komprenkompetentojn* en la du aliaj lingvoj. En la limoj de ĉi-raporto, ni ne plu studos tiujn tri alternativojn, tamen substrekante, ke laŭ la graveco akordigita al la celo de interkompreniĝo, povas esti necese studi ilin pli detale.

Tamen, eĉ kun ĝiaj limigoj oni rajtas konsideri, ke la efektivaj profitoj de plurlingvismo en ĝia formo « 1+2 » estas pli altaj ol tio, kion sugestas la ekzemploj supre ciferitaj. Fakte, en la realo la renkontiĝoj kaj interparoloj ne estas pure aleatoraj; la geografia proksimeco kaj la ligoj historiaj kaj komercaj, ĉiuj estas faktoroj, kiuj igas iujn renkontiĝojn pli oftaj ol aliaj. Do, eĉ se la interkompreniĝo ne estas sisteme garantiebla, la modelo «1+2» kontribuas certe al tio, ke ĝi estas sufiĉe ofta interne de iuj kunteksto (geografiaj, profesiaj aŭ aliaj). Se la malesto de rekta komunikado estas pli probabla por subgrupoj, kiuj mem estas neprobablaj, tio ne sufiĉas por malvalidigi tian version de la plurlingva scenaro, des pli ke oni povas ankaŭ helpiĝi per

56 *Oficiala ĵurnalo de Eŭropa Unio*, L 58 de la 28a de februaro 2003, je paĝo 109).

57 La ebleco, ke la grupo de 20 personoj hazarde prenitaj el la 32.000 oficistoj, enhavas subgrupojn de 2 ĝis 20 individuoj kun la sama gepatra lingvo, ne modifas tiun taksadon.

tradukado kaj interpretado. Tradukado kaj interpretado konservas do, en ĉi-scenaro, unuarangan gravecon, ĉar ili venas kompensi la komunikadajn maleblojn, kiujn oni ĵus menciis, kaj precipe garantii al ĉiu civitano la aliron al iuj tekstoj.

Do, enkalkulante la avantaĝojn proprajn al multlingvismo (*vidu* ĉi-postan paragrafon) kaj la eblon daŭre liveri tradukajn kaj interpretajn servojn *inter la tri lingvoj de la triopo*, tiu manko rilata al rekta komunikado en ĉiuj situacioj ne estas ĉefa. Pro tio ni daŭrigas la rezonadon supozante, ke la netaj profitoj de la tri scenaroj estas kompareblaj, por emfazi la diferencojn inter la kostoj.

Fakte, alia ĉi tie substrekenda punkto estas, ke tio, kio diferencigas la scenarojn “tutanglan” de la multlingvismo aŭ de Esperanto, estas, ke laŭ la scenaro sekvata oni evidente ne konstruas la saman Eŭropon. La multlingva scenaro estas tiu, kiu *apriorie* plej bone respegulas la idealon de protekto de la eŭropa lingva diverseco, ĉar ĝi garantias (*pere de kelkaj adaptoj, al kiuj ni revenos poste*) daŭran uzon de pluraj lingvoj kaj ĉiutagan konfrontadon de ĉiu kun la diverseco de la lingvoj kaj kulturoj; laŭ tiu scenaro neniu, eĉ denaske anglalingva, franclingva aŭ germanlingva, povos elteni unulingvecon. La scenaro “Esperanto” tiurilate venas kiel la dua, ĉar pro la fakto mem de sia neaparteno al ajna lingva aŭ kultura sfero, ĝi lasas pli da libereco al la esprimado de ĉiuj sferoj, kaj tion egalrajte. La “tutangla” alvenus kiel tria, ĉar ĝia disvastigo ne evitas forte premi la aliajn lingvojn, eble malprofite al ilia kreiveco scienca (Durand, 2001) aŭ intelekta.⁵⁸

Ĉiuj tiuj konsideroj tamen apartenas, kiel dirite supre, al dimensioj nekomercaj de la lingvaj situacioj. Eĉ se ni povis, en ĉapitro 2, skizi manieron por povi alproksimiĝi al tiuj valoroj, la plena manko je informoj malebligas al ni inkluzivi ilin en nia identigo de la profitoj de diversaj scenaroj.

6.4 Instruaj politikoj kaj iliaj kostoj

Por la tri konsideritaj scenaroj oni supozos, ke Francio instruas du fremdajn lingvojn: en la unua scenaro la anglan kaj lingvon K ; en la dua scenaro lingvon J kaj lingvon K (la unua el tiuj du lingvoj devige estu la angla aŭ

58 Tiurilate Bourdieu (Bourdieu kaj aliaj, 2001: 46 ss.) observas: « Kiam oni parolas lingvojn, simple dirite, ĉiam ankaŭ temas pri io alia. La lingvo estas ne nur ilo de komunikado [...] La simbolaj sistemoj estas ne nur simplaj iloj por esprimi la realon, sed ili kontribuas al la konstruo de la realo [...] Kaj indas pripensi [...] por vidi ĉu kaj kiel eblas akcepti la uzon de la angla sen risko de angliigi siajn mensajn strukturojn, sen cerblavado per lingvaj rutinoj».

la germana, se, kiel ni hipotezis, la multlingvismo favoras la triopon angla-franca-germana); en la tria scenaro Esperanton kaj lingvon *K* (la lingvo *K* povus esti la angla, sed sen ajna kuraĝigo rilate al iu alia lingvo proponita de la eduka sistemo).

Por simpligi la ekzamenon, oni supozos ke la unua kaj la dua fremdaj lingvoj estas inkluzivitaj en la samaj studoprogramoj kaj por la samaj jaroj de la lerneja kurso kiel nun, kaj ke ili disponas pri la saman nombron de lecionhoroj kiel nun. Ne malpli grave, la pedagogiaj celoj asignitaj al la instruado de la unua kaj de la dua fremdlingvo estos supozataj relative similaj en la diversaj scenaroj kaj proksimume egalaj al tiuj kiel nun. Nenio malebligas en posta pli detala analizo nuligi tiun hipotezon. Oni tiel povos esti pli postulemaj almenaŭ pri la unua fremdlingvo, kaj konsekvence adapti la respondan taksadon de la kostoj, kiom tia reformo postulus altigon de la provizado je rimedoj,

Miascie ne ekzistas lerneja librotenado laŭ fako en Francio, cetere ankaŭ ne en aliaj landoj. Kaze de Svislando, la mezurado de la sociaj rendimentoj de la instruado de lingvoj necesigis ellabori aron da konjektoj. Tia ekzerco estas des pli kompleksa, ĉar la lando havas kvar oficialajn kaj naciajn lingvojn, uzatajn en la publika instruado laŭ la principo de teritorieco. Krome, pro sia federala strukturo, Svislando havas ne malpli ol 26 apartajn instrusistemojn kun malsimilaj programoj, inkluzive pri instruado de lingvoj. Ĉar tri kantonoj estas dulingvaj kaj unu trilingva, ekzistas principe tuta trideko da malsimilaj studoplanoj, por kiuj oni devas ellaboti tiajn taksadojn (Grin kaj Sfreddo, 1997).

Pro la centraligita propreco de la franca eduksistemo, tiaj taksadoj eble estas relative facilaj, sed por la nuna studo, ni kontentiĝos per proksimumaj valoroj, kies kunmetado estas detaligita pli sube, reference al la « transpago » okazigita de la ŝparo de penado, kiun certaj ŝtatoj povas realigi, depende de la konsiderita scenaro, en la instruado de fremdaj lingvoj. Ni prenos Francion kiel referencon por taksati kiagrade Britio devias de ĝi, ekirante de ciferoj, kiuj aplikiiĝas al Anglio kaj al Kimrio. Fakte, pro la strukturo de la instruaj sistemoj en Britio, la komparpunkto ne respondas striktasence al Britio kiel membroŝtato. La baza principo estas tiu de simpla regulo de proporcio: oni taksu la relativan parton de la fremdaj lingvoj λ en la horaro por diversaj lernojaroj aŭ instruniveletoj; oni multipliku ĝin per la responda mezuma elspezo je lernanto (MEL);

tiu cifero estas poste multiplikata per la totala nombro da lernantoj en la sistemo *NLS*, por obteni la entutan koston de la instruado de fremdaj lingvoj *KFLi* en ĉiu scenaro *i*. Dividante *KFLi* per la nombro da enloĝantoj *POP*, oni obtenas la entutan elspezon por la instruado de fremdaj lingvoj *je enloĝanto*, nombro kiu estas komparebla inter landoj por ĉiu scenaro.

La scenaroj 1 kaj 2 do kostas la samon, tio estas $KLF_1 = KLF_2$. La scenaro 3, kontraŭe, kostas malpli, ĉar la atingo de certa nivelo de kompetento en Esperanto estas klare pli rapida ol por ĉiu alia lingvo, kaj tiurilate la literaturo estas unuanima. Tiel Flochon (2000:109) notas, ke «*La Instituto pri kibernetika pedagogio de Paderborn (Germanio) komparis la lernodaŭrojn de pluraj grupoj da lernantoj franclingvaj je bakalaŭra nivelo, por atingi nivelon nomitan 'norma' kaj kompareblan en kvar malsimilaj lingvoj: Esperanto, la angla, la germana kaj la itala. La rezultoj estas jenaj: por atingi tiun nivelon, 2000 studhoroj de germana lingvo rezultigis lingvan nivelon ekvivalentan al 1500 studhoroj de angla lingvo, 1000 studhoroj de itala kaj... 150 studhoroj de Esperanto. Sen komentoj*»

Aliaj sporadaj taksaĵoj dismetitaj en la literaturo konfirmas la pli rapidan atingon de kompetentoj en la celita lingvo por Esperanto ol por ĉiuj aliaj lingvoj, kun kiuj la komparo estis farita (ministerio de la publika instruado [Italio], 1955) same kiel la propedeŭtikajn avantaĝojn de la lingvo (Corsetti kaj La Torre, 1995). En tio, kio sekvas, mi decidis esti plej prudenta, elektante proporciojn de unu je tri. Tiele la necesa investado por certigi al la francaj lernantoj donitan nivelon de kompetento en Esperanto reprezentas trionon de tiu necesa por ke ili atingu similan nivelon en ajna alia lingvo.⁵⁹

La ŝparo de peno pro la transiro al Esperanto influas la unuan fremdlingvon, al kiu (en la franca sistemo, ĉi tie prenata kiel referenco) oni dediĉas proksimume tri kvaronojn de la entuta elspezo pri instruado de fremdaj lingvoj (vidu Aldonaĵon A3). La aplikado de la proporcio 1/3 inter Esperanto kaj la unua fremdlingvo nun lernata (kiu ajn ĝi estas) supozigas do, ke la totala fakturo de la lingvinstruado iĝus:

$$CLE_3 = \left(\left[\frac{1}{3} * \frac{3}{4} \right] + \frac{1}{4} \right) * CLE_1 = 0,5 CLE_1$$

Alivorte, ĝi duoniĝus. Kompreneble oni ankaŭ estus povinta preni alian vojon kaj supozi koston precize identan en la tri scenaroj; sed tiam la nivelo de kompetento atingita en Esperanto, necese kaj

59 La studo de artefaritaj planlingvoj kiel solvo al la problemoj de internacia komunikado estas objekto de la interlingvistiko, kies tradicio retroiras al Comenius, Descartes et Leibniz. Por ĝenerala enkonduko en la scienca literaturo pri la kampo, vidu Blanke (2003).

strikte superos tiun atingitan en la aliaj lingvoj, inkluzive de la lingvo nuntempe elektita kiel unua fremdlingvo.⁶⁰

6.5 Taksado de la transpagoj

Privilegiitaj merkatoj

La lingva hegemonio okazigas, mi jam diris, diversajn formojn de redistribuo favore al la parolantoj de la hegemonia lingvo same kiel al la ŝtatoj, de kiuj ĝi estas la lingvo plej uzata aŭ oficiala – aŭ unu el la oficialaj. Tiu privilegio rezultas el la sekvantaj efikoj: la parolantoj de la domina lingvo profitas avantaĝon pro la vendo de diversaj servoj (instruado de la domina lingvo; tradukado kaj interpretado en tiun ĉi; eldonado kaj kontrolado de tekstoj en tiu lingvo; liverado en fremdlandojn de pedagogia materialo por ties instruado).

Miascie, ekzistas nur proksimumaj valoroj pri tiu efiko kaze de la angla, kaj tio nur por Britio. La retejo de British Council indikas ĉi-rilate, ke la « English language products » (sendube komprenendaj kiel la produktoj ligitaj al la angla lingvo, do kategorio pli vasta ol la produktoj en la angla lingvo) valoras proksimume 800 milionojn da pundoj jare; ĉirkaŭ 700.000 personoj jare vizitas Brition por lerni la anglan kaj tie elspezas sumon taksitan je 700 milionoj da pundoj (tio estas meza elspezo de £ 1.000 je persono).⁶¹ La retejo de British Council ne donas detalojn pri la metodologio de taksado. La dua cifero baziĝas sur la informoj de 1998 sed nenio estas dirita pri la periodo dum kiu validis la unua. Ĉar tiuj informoj estis disponeblaj en 2001, ni ĉi tie akceptu, simpligante, ke tiuj sumoj validas por tiu jaro. Ĉar inter 2001 kaj 2004, la nominala MEP (Malneta Enlanda Produtaro) en Britio kreskis je 16,7%⁶² kaj supozante, ke ĝi estas identa en ĉiuj sektoroj, tiu miliardo kaj duono da pundoj atingis 1,75 miliardojn da pundoj en 2004, kio egalas al proksimume 2,59 miliardoj da eŭroj, ĉi tie rondigitaj al 2,5 miliardoj da eŭroj, por eviti ĉiun eraron, kiun povus kaŭzi la utiligo de tro malfavora valorkurzo de la pundo.⁶³

60 Vidu Haszpra (2004) por kalkuloj bazitaj sur la horvaloro de la laboro. Komparante la fiskan ŝarĝon je kapo, kiu rezultas el ĝeneraligita instrua politiko pri fremdlingvo, Haszpra obtenas proporcion de 1 al 10 laŭ la kazo ĉu temas pri Esperanto, ĉu pri la angla. En scenaro kun du fremdaj lingvoj (Esperanto kaj dua fremdlingvo aŭ *du* naturaj lingvoj, el kiuj verŝajne unuavice la angla), li fine trovas fiskan ŝarĝon je kapo de 312 eŭroj jare kaj de 925 eŭroj respektive, kio rimarkinde konverĝas kun niaj propraj rezultoj.

61 Vidu <http://www.britishcouncil.org/english/engfaqs.htm#econben>

62 Fonto: <http://www.statistics.gov.uk>.

63 Nepras insisti pri la fakto, ke tiuj taksadoj certe estas sub la realo. Tiele, *British Council* indikas, ke la brita ekonomio enspezas ĉiujare 11 miliardojn da pundoj el la internacia merkato de edukado. Estas tre probable, ke tiu sumo estus konsiderinde malpli alta, se la angla ne profitus de privilegiita pozicio. Vidu ĉe www.britishcouncil.org/mediacentre/apr04/vision_2020_press_notice.doc.

Tamen ni ne forgesu, ke eĉ sen dominado de la angla lingvo, iu kvanto da varoj kaj servoj ligitaj al tiu lingvo ja estus vendita. Estas do parto de tiu sumo de 2,5 miliardoj da eŭroj, kiu ĉi tie estu konsiderata. Ni retenos proporcion de 75%, bazitan sur la fakto diskutota pli detale poste, ke la trorepresentado de tradukado kaj interpretado el kaj al la angla en la eŭropa merkato estas proksimuma al tiu rilatumo. Do la “privilegiitaj merkatoj” valoras, en la intence prudenta taksado ĉi tie retenita, 1,875 miliardojn da eŭroj jare.

Indas tamen konfronti tiun ciferon kun la 13 miliardoj da eŭroj, kiujn «enspezigas» ĉiun jaron la angla lingvo al la ŝtato, laŭ la brita registaro (citita de Phillipson, 2003: 77)⁶⁴. Malgraŭ la diferenco, kiu aperas unuavide, tiu lasta sumo estas akordigebla kun la 2,5 miliardoj da eŭroj per simpla argumento: tio estas, ke la elspezo okazigas neĝbulan efikon, nomatan obliganta efiko, de la sama speco kiel tiuj, kiujn oni enkalkulas ekzemple por taksi la tutan ekonomian efikon de infrastruktura projekto. Ĉar la praktika valoro de tiaj obligantoj ofte situas ĉirkaŭ 2,5 ĝis 3, estas probable, ke la sumo de 13 miliardoj da eŭroj menciitaj de Phillipson estas la produto de obliganto kun norma valoro kaj dekomenca sumo *superanta* la 2,5 miliardojn da eŭroj indikitajn de British Council; tiu takso de British Council estas do, laŭ ĉiu probableco, malpli alta ol la totalo de la rektaj elspezoj. Do, kiuj ajn estas la precizaj sumoj, ili estas multiplikendaj per obliganto.

Indas ankaŭ konsideri la ciferon de 13 miliardoj da eŭroj, kiun raportas Phillipson, publikigitan en la oficiala registara retejo kaj troveblan en 2001. Akceptante, pro manko de aldonita informo, ke ĝi estis notita en aktualaj eŭroj, estas prudente supozi, ke dum la lastaj kvar jaroj, la procento de nominala kresko de la sektoro ne estis malplia ol tiu de la tuta brita ekonomio. Konsiderante kreskon de 16,7% de la nominala MEP en Britio, inter 2001 kaj 2004, oni alvenas al sumo proksimuma al 15,2 miliardoj da eŭroj. Pro manko de informoj pri la uzitaj taksadaj metodoj de la brita registara fonto citita de Phillipson, ni prudente rondigu la sumon al 15 miliardoj da eŭroj.⁶⁵ Parto de la mendo de varoj kaj servoj direktita al Britio venas el ne-eŭropaj landoj (kvankam tiuj povus pli volonte turni sin al Usono); estas do logike preferi proksimumajn

64 Nuntempe, la interreta paĝaro de la brita registaro, menciita de Phillipson (2003) kiel fonto de tiu cifero, ne plu estas alirebla; do ne eblis kontroli, kiu metodo estis uzata por alveni al tiu sumo, nek al kiu periodo ĝi aplikigas. Kompreneble, en pli detala studo, la diversaj ciferoj devos esti rekontrolitaj.

65 Tamen oni ellasas el la taksado la valoron de tiu efiko por Irlando; aldono de 5%; responda al la proporcio inter la enloĝantoj respektive de Irlando kaj de Unuiĝinta Reĝlando, ĉiukaze estus konsiderindaj.

grandecojn pli modestajn. La EU de 25 reprezentis, en 2004, 58,1 elcentojn de la totalo da eksportoj de varoj el Unuiĝinta Reĝlando, ĝia parto en la eksportado de varoj kaj servoj tamen ne estis indikita.⁶⁶ Ni rondigu tiun procenton al 60% por enkalkuli la fakton, ke pro motivoj de relativa proksimeco geografia, servoj kiaj lingvaj kursoj kaj lingvaj gastadoj estas, pli ol proporcie, uzitaj de enloĝantoj de aliaj membroŝtatoj de la EU de 25; ni akceptos do, ke tiu procentaĵo de 60% aplikiĝas al la vendo de la tuto de varoj kaj servoj ligitaj al la angla lingvo, kio portas la totalon al 9 miliardoj da eŭroj. Denove konvenus memorigi, ke parto de tiu sumo ĉiukaze ekzistus, eĉ se la angla lingvo ne profitus dominan pozicion. Reprenante la procenton de 75% anoncita supre oni povas, aplikante la saman principon de prudento, konservi sumon de 6,75 miliardoj da eŭroj.

Sekve leviĝas jena demando: kiu estas la kontribuo de Francio en tiuj 6,75 miliardoj da eŭroj? Por tio, oni devus koni la parton de la francoj en la entuta konsumo de varoj kaj servoj ligitaj al la angla lingvo. Ĉar Francio kaj franclingva Belgio reprezentas demografie proksimume 14 elcentojn de la loĝantaro de la Eŭropo de 25, ilia kontribuo valoras ĉirkaŭ 945 milionojn da eŭroj jare por la brita ekonomio.

Ĉiuj ĉi tie diskutitaj ciferoj do reprezentas, kvankam tre proksimume, la nunan situacion – kvankam sendube ili situas, kiel dirite, sub la realo. La sumo de tiuj transpagoj certe iĝus pli alta, se oni sekvus la scenaron “tutanglan”, ĉar tiu plifortigus kaj instituciigas la superan legitimecon de la angla rilate al ĉiu alia lingvo. En atendo de pli detala analizo maleblas riski hipotezon tiurilate. Ni akceptos do – refoje elektante prudentecon – ke la ciferoj respondas al transpagoj, kiuj rezultus el la alpreno de la “tutangla” scenaro.

Tio tamen ekmontras konceptan malfacilaĵon: tiun de la referencpunkto. Ni vidis, ke parto de tiu liverado de varoj kaj servoj en la angla aŭ por lernado de la angla *ĉiukaze* ankaŭ okazus, eĉ se la angla ne estus en hegemonia pozicio. Sed Germanio, Francio, Hispanio kaj ankaŭ je pli modesta skalo Svedio aŭ Hungario vendas lingvaj servojn koncerne siajn respektivajn naciajn lingvojn. En la sekvaj paĝoj, enkalkulante la fakton, ke la proksimumaj valoroj konservitaj por la transpagoj favore al la angla estis sen dube subtaksitaj, ni ne deprenos el la neta bilanco la transpagojn kiujn profitas Francio rezulte de la internacia statuso de la franca lingvo. Ni krome memorigas, ke laŭgrade kiom la angla supereco firmiĝas, la progreso de la franca rilate aliajn lingvojn

66 Fonto: <http://www.statistics.gov.uk/StatBase/Product.aspx?vlnk=613>

(nome la germanan kaj hispanan) povas nur malpliigi.⁶⁷ Malgraŭ tio, okaze de pli profunda analizo, oni povus tre bone konsideri kroman korekton: oni tiukaze dekalkulus parton de transpagoj al Francio, de la sumoj preparolataj ĉi-supre.

Kiel nuntempe statas la aliaj scenaroj? Pro difino, scenaro 3 (Esperanto) okazigas *neniun* privilegiitan merkaton tiuspecan, ĉar neniun lando ĝuus decidigan avantaĝon en la liverado de lingvaj servoj ligitaj al Esperanto. Scenaro 2 (multlingvismo) troviĝas en meza zono, ĉar ĝi implicas dispartigon de la komunikado en plurajn lingvojn, inter kiuj verŝajne la angla pezus pli ol tiom, kiom ĝi meritis pro simpla lingvodemografia vidpunkto, nome proksimume 14% (kio *pli malpli* respondas al la proporcio de la denaskaj angloj en la Eŭropo de 25), des pli, ke pro la ĉi tie starigitaj hipotezoj, la angla estus kun la franca kaj la germana unu el la tri lingvoj profitantaj el privilegiita statuso. Tamen, kio gravas el la vidpunkto de ĉi-studo, estas la grado laŭ kiu tia transpago favore al varoj kaj servoj ligitaj al la angla lingvo superus la transpagon okazantan favore al la varoj kaj servoj ligitaj al la franca lingvo. En lingva situacio, kiu serioze kaj aktive kuraĝigas la multlingvismon – tian, kian ni skizis supre – la netaj transpagoj inter du grandaj lingvoj estus neglektindaj. Aliflanke, ĝi restus pozitiva el la tuto de “malgrandaj” lingvoj al la tuto de “grandaj”, kaj precipe al la triopo angla-franca-germana.

Ŝparado de peno en komunikado

Iuj el la demandoj ĉi tie starigitaj koncepte iom similas al tiuj ĵus pritraktitaj kadre de la “privilegiitaj merkatoj”. Ĉi tie temas tamen pri jena fenomeno: depende de la lingva situacio, al kiu oni sin direktas, kaj do depende de la respondaj kondiĉoj de internacia komunikado, ĉiuj interparolantoj ne devos liveri la saman studopenon.

Ni denove komencu ĉe scenaro 1, tio estas la “tutangla”: ĉi-kaze la plejmulto, eble la tuta komunikado inter personoj de malsama gepatra lingvo okazus en la angla. Do la anglalingvanoj ne bezonus traduki en sian lingvon la mesaĝojn elsenditajn far la neanglalingvanoj, same ili ne bezonus traduki en aliajn lingvojn

67 Ilustre, ni memorigu, ke en ses jaroj, tio estas inter 1997 kaj 2002, la parto de la franca kiel origina redaktolingvo de la dokumentoj de Konsilio de Eŭropa Unio transiris de 42% al 18%, dum ĝi transiris por la angla de 41% al 73% (Ĝenerala Sekretariejo de Konsilio de Eŭropa Unio, citita de Durand, 2004).

la mesaĝojn, kiujn ili elsendas; tiu peno kontraŭe estas neevitebla por ĉiuj aliaj, se ili volas esti komprenataj.⁶⁸

Por taksati, eĉ nur tre proksimume, la sumojn, kiujn tio implicas, oni povas eliri el studo realigita kadre de la eŭropa programo MLIS (ASSIM, 200). Tio, kion ĝia franclingva versio nomas *executive summary* indikas, ke la merkato de tradukaj kaj interpretadaj servoj reprezentis en 1997 sumon de 3,75 miliardoj da eŭroj. Akceptante ke la kresko de la sektoro dum la periodo 1997-2004 sekvis tiun de la nominala MEP en la EU de 15, tio estas 33,7% da kresko,⁶⁹ la nuna nominala valoro de tiu merkato estus proksimume 5,014 miliardoj da eŭroj.

Tamen oni alĝustigu tiun ciferon ankoraŭ por enkalkuli la kreskon de la merkato pro la plivastigo de la EU de 15 al 25 membroj. Tio ĉi reprezentas, laŭ la informoj de Eŭrostat, kreskon de la enloĝantaro de la Unio je 19,3%. Ĉar tiuj novaj merkataj segmentoj estas malpli riĉaj ol la aliaj, oni ne necese antaŭvidu, ke la enhavo de la tradukada kaj interpretada merkato plialtiĝu strikte proporcie kun la demografia kresko. Do, enkalkulante la fakton, ke la mezuma MEP je kapo en la novaj membroŝtatoj povas esti estimata, ĉiam laŭ Eurostat (en ekvilibro kun la aĉetpovo), je iom malpli ol 50% de la mezuma MEP je kapo de la EU de 15, oni akceptos ĉi tie kreskon de la merkata enhavo je 10%, tio estas eŭropa merkato granda pri tradukado kaj interpretado de 5,515 miliardoj da eŭroj en 2004 laŭ kuranta valoro.

Tiu merkato dispartiĝas en certan nombron da lingvoj, kaj por ĉiu lingvo oni devas distingi la tradukadon kaj interpretadon el tiu lingvo kaj al tiu lingvo.

Por alproksimiĝi al taksado de la transpagoj okazigitaj laŭ la scenaro “tutangla”, necesas identigi la parton de la merkato transirantan por tradukoj el kaj al la angla, *preter* tiu, kiu ĝi estus, se la angla ne profitus el sia hegemonia pozicio. Oni pravus konsideri, ke tiu “normala” parto devus respondi al la demografia pezo de la angla kiel gepatra lingvo en la EU de 25, tio estas ĉirkaŭ 14%. Nu, la parto de tradukado el la angla kaj al la angla estas certe pli alta. Miascie

68 Tio estas la decidiga punkto preterlasita de la sveda reprezentantaro en Eŭropa Komisiono, kiu proponis ke, se ŝtato deziras disponi dokumentaron aŭ buŝan komunikadon en sia lingvo, ĝi akceptu la imputadon de la respondaj tradukaj kaj interpretadaj kostoj. Kvankam evidente tio starigas la demandon de la lingvo en kiu la mesaĝoj komence estis senditaj, kaj laŭ kiu rajto...

69 Fonto: http://epp.eurostat.cec.eu.int/portal/page?_pageid=1996,39140985&_dad=portal&_schema=PORTAL&screen=detailref&language=fr&product=Yearlies_new_economy&root=Yearlies_new_economy/B/B1/B11/daa10000

ne ekzistas sistemaj informoj pri tiu temo; tamen la proksimuma kvanto de 50% ĝis 60% indikitaj de la interparolantoj el la kampo de tradukado kaj interpretado, kun kiuj okazis kontaktoj por la realigo de ĉi-studo, konverĝas kaj akordiĝas kun studo publikigita en 1999 de OFIL, kiu referencas sen plia precizo al “taksadoj de Eŭropunia Komisiono”, informoj pri la jaro 1992.⁷⁰ La parto de la angla kiel cellingvo estus 50% (el la tuto de la cellingvoj). Do oni povas akcepti, pro manko de pli detalaj informoj, ke de procentaĵo kiu situas inter 50% kaj 60% konvenas subtrahi la “normalan” parton de 14%. Por la bezonoj de ĉi studo, ni do konservos «eksceson» pro la domina statuso de la angla je nivelo proksimuma al 40% de la tuta grandeco de la merkato, tio estas, tre proksimume, ĉirkaŭ 2,2 miliardoj da eŭroj.⁷¹

Inter krampoj ni notu, ke la proporcio $(0,54-0,14)/0,54 \approx 0,74$ estas interpretebla kiel indikaĵo de trorepresentado de la angla; ja surbaze de ĝi ni aplikis ĉi-supre la procentaĵon de 0,75% por taksu la reale “privilegiitan” parton de la merkato de varoj kaj servoj pri la angla lingvo.

Unuavide oni povus pensi, ke konvenas duonigi tiun sumon por nur konsideri unu direkton de tradukado kaj interpretado. Tamen, estas enkalkulendaj ja la du fluoj, ĉar se la komunikado estus egaleca, la interparolantoj kun la angla kiel gepatra lingvo devus financi la tradukadajn kaj interpretadajn servojn el kaj al sia lingvo, precize kiel la parolantoj de aliaj lingvoj. La referenca punkto do estas ja la lingvodemografia pezo de la angleparolantoj kaj estas la tuto de tiuj 2,2 miliardoj da eŭroj, kiun ili ŝparas pro la domina statuso de la angla.

Estas ege probable, ke kaze de alpreno de la “tutangla”, la ŝparaĵo tiel realigata de la anglalingvanoj iĝus ankoraŭ pli grava. Ĉar ĉiu prognozo ĉi-rilate estas riska, mi kontentiĝas per la plej prudenta hipotezo, akceptante ke tiu sumo de 2,2 miliardoj da eŭroj respondas, eĉ en la scenaro de “tutangla”, al la ŝparaĵo, kiun realigus la anglaj denaskuloj en la eŭropa kunteksto. Laŭ ĉiu probablo la reala sumo ege superus ĝin.

70 OFIL publikigas *Tribuno de la industrioj de la lingvo kaj de multmedioj*; vidu S. Abou, 1999: « El la ĝenerala merkato de tradukado al tiu de scienca kaj teknika tradukado... kaj al tiu de la tradukado per iloj », <http://www.ofil.refer.org/tribune/n19/marche.htm>, TILM n° 19.

71 La demando de la obliganta efiko, starigita okaze de la privilegiitaj merkatoj, povas aperi ankaŭ ĉi tie. Tamen nenio indikas, ke la esenco de tiu tradukada kaj interpretada laboro okazus en Britio aŭ en Irlando. Konsekvence oni ne rajtas fari la hipotezon, ke la sumoj rezultantaj el neĝbula efiko kaŭzas transpagojn en unu aŭ alian direkton.

Nun ni supozu, ke ĉiuj agantoj de la Unio (individuoj, entreprenoj, publikaj komunumoj, asocioj) partoprenas proksimume samgrade en la komunikado; tiam la pezo de ĉiu lingva komunumo en tiu entuta komunikado respegulas ties demografian pezon. Ĉar Francio kaj franclingva Belgio reprezentas ĉirkaŭ 14% de la enloĝantaro de la Unio, la anglalingvanoj ŝuldas al la franclingvanoj ĉirkaŭ 308 milionojn da eŭroj jare pro ŝparado de peno en la komunikado inter franclingvanoj kaj anglalingvanoj. En la scenaro 3, same, ĉiu tiuspeca transpago aŭtomate malaperas, ĉar ĉiu devos akcepti simetrian penon por la tradukado kaj interpretado de mesaĝoj inter sia gepatra lingvo kaj Esperanto.

La scenaro 2 reprezentas, kiel vidite por la “privilegiitaj merkatoj”, mezan solvon. Laŭgrade kiom realigebla multlingva situacio konsentus doni relative pli gravan pezon al iuj “grandaj” lingvoj (laŭ niaj hipotezoj koncerne tiun scenaron, temus pri la angla, la franca kaj la germana), ĝi sendube ebligus al la parolantoj de tiuj grandaj lingvoj ŝpari al si certajn penojn. Tamen la transpagoj inter grandaj lingvoj sendube estus neglekteblaj, kaj ni supozos, ke la neta bilanco por Francio aŭ la franclingvanoj koncerne tiun specon de transpago en tiu specifa kazo, estus nula.

Ŝparado de peno en instruado de fremdaj lingvoj

Ne ĉiu havas la samajn bezonojn pri lingvaj kompetentoj, depende de la elektita lingva situacio. Se la regado de unu aŭ du aliaj fremdaj lingvoj je alta nivelo estas konsiderata neceso por la finnoj aŭ slovenoj, ĝi ŝajnas esti des pli malgranda, ju pli granda la lingva komunumo al kiu oni apartenas. Tio estas konstatebla per la fakto pli detale ekzamenita sube, ke la instrusistemoj angla kaj kimra (malsimilaj al la sistemoj skota kaj nord-irlanda) klare faras malpli grandajn postulojn al la lernantoj pri akirado de fremdaj lingvoj. Ĉi tie gravas la grado, laŭ kiu tiu peno estas malpli granda ol tiu, kiu ĝi devus esti en aliaj kazoj. Por simpligi, ni prenos kiel referencon la aktualan francian fremdlingvan instrusistemon, pri kiu ni resumis la esencajn karakterizojn en tabelo en aldonaĵo A3.

Sur tiu bazo eblas taksu la tutan investaĵon por la instruado de fremdaj lingvoj en Francio je ĉirkaŭ 8,235 miliardoj da eŭroj jare. Tiu sumo supozigas du simpligojn, kiuj estas supozitaj grandparte nuliĝi inter si: unuflanke oni neglektis la fakton, ke la procentaĵo da kolegianoj [NdIT] kaj liceanoj studentaj duan fremdlingvon estis, ekde la kvara jaro, malpli ol 100% (la procentaĵoj variis de 86,4% ĝis 98,1% en 2003-2004); aliflanke ni ne enkalkulis la fakton, ke iu procentaĵo (ne precizigita en la interretejo de

NdIT: (kolegio: kvar plej malaltaj klasoj de mezgrada lernejo; liceo: la tri postsekvantaj plej altaj klasoj.

DEP [NdIT 1]) da liceanoj studis trian fremdlingvon, kaj ke 11% de la lernantoj enskribitaj en BEP, CAP aŭ Bac profesia studas duan lingvon. Ĉar probable, ke tiuj lastaj du efikoj superas la unuan, nia fina taksado pri la totala kosto de fremdlingva instruado en Francio, tio estas ĉirkaŭ 8,235 miliardoj da eŭroj, estas sendube iom sub la realo. La detalo de la taksadoj troviĝas en tabelo 3.

TABELO 3: INSTRUADO DE FREMDAJ LINGVOJ EN FRANCO
(ELEMENTA: 1999-2000 ; ALIAJ: 2003-2004)

| <i>LERNOJARO</i> | <i>Horara parto de fremdaj lingvoj</i> | <i>Elspezo je Lernanto</i> | <i>Nombro(+ da lernantoj</i> | <i>Totala elspezo</i> |
|--|--|----------------------------|------------------------------|-----------------------|
| CP | 0,058 | 261,3 | 783 532 | 204 736 911 |
| CE1 | 0,058 | 261,3 | 822 422 | 214 898 868 |
| CE2 | 0,067 | 304,9 | 797 725 | 243 226 352 |
| CM1 | 0,067 | 304,9 | 793 648 | 241 983 275 |
| CM2 | 0,067 | 304,9 | 801 511 | 244 380 703 |
| Totalo por elementa ciklo | | | | 1 149 226 111 |
| Totalo por elementa × 1 024 ⁷² | | | | 1 176 807 538 |
| Sesa | 0,148 | 1 058 | 821 653 | 869 308 874 |
| Kvina | 0,135 | 965 | 801 084 | 773 046 060 |
| Kvara | 0,123 | 1 630 | 818 337 | 1 333 889 310 |
| Tria | 0,105 | 1 509 | 794 116 | 1 198 321 044 |
| Totalo por Kolegio | | | | 4 174 565 288 |
| Dua | 0,193 | 1 882 | 533 489 | 1 004 026 298 |
| Unua | 0,158 | 1 540 | 487 872 | 751 322 880 |
| Fina | 0,147 | 1433 | 489 111 | 700 896 063 |
| Total por Liceo | | | | 2 456 245 241 |
| BEP/CAP/Bac Pro | 0,061 | 614 | 695 452 | 427 007 528 |
| Totalo BEP/CAP/Bac Profesia | | | | 427 007 528 |
| Totala Elspezo (€) | | | | 8 234 625 595 |

Fontoj: datenoj de DEP (Direction de l'évaluation et de la prospective = Estraro de la taksado kaj Prospektado), (<http://www.education.gouv.fr/stateval/default.htm>) kaj programoj kaj horaroj de la diversaj elektelecoj en la franca instrua sistemo, programoj kaj disponeblaj horaroj en la pedagogia retejo de la ministerio pri nacia edukado (<http://eduscol.education.fr/>). Ciferoj por la jaro 2003-2004 temas pri la mezgrado (Kolegio, Liceo kaj Sekundara ciklo profesia) kaj por la jaro 1999-2000 temas pri la elementa ciklo. Korekto de prielementaj ciferoj estis enkalkulita el demografia kresko de 2,4% inter 1999-2000 kaj 2003-2004.

Ĉar la datenoj validas por 2004 (aŭ kaze de la elementa lernejo, kiuj estis, por 2004, eksterpolitaj el la valoroj de 1999), konvenas dividi la tutan obtenitan sumon de 8 234 625 595 da eŭroj per la enloĝantaro dum tiu sama jaro ⁷³, tio estas 59 900 700, tiel ke oni obtenas elspezon je enloĝanto jare por

72 Enkalkulinte la demografian kreskon de 2,4% registritan inter la jaroj 1999-2000 kaj 2003-2004.

73 Fonto: [http://epp.eurostat.cec.eu.int/portal/page?_pageid=1996,39140985&_dad=portal&_schema=PORTAL&screen=detailref&language=fr&product=Yearlies_new_population&root=Yearlies_new_population/C/C1/C11/caa10000 caa10000].

NdIT 1: DEP: Direkcio por Taksado kaj Planado

NdIT 2: BEP, CAP aŭ Bac profesia: resp. Breveto pri Studoj Profesiaj, Atesto pri Kapablo Profesia, Bakalauro Profesia

la instruado de fremdaj lingvoj, de iom pli ol 137 da eŭroj. Cetere tiu sumo de ĉirkaŭ 8,23 miliardoj de eŭroj samvaloras kiel 10% de la tuta edukada elspezo, ne inkluzive de la tria sektoro. Tiu cifero precize kongruas kun la taksaĵoj faritaj en Svislando antaŭ deko da jaroj.

En la kazo de la brita eduka sistemo, la neprecizeco de la informoj malebligas, rezerve de studo multe pli detala, liveri vere kompareblajn taksaĵojn. Ĝenerale, la problemo ekzistas pro la fakto, ke la fremdaj lingvoj iĝis nedevigaj por kreskanta proporcio de la lernantoj en la angla sistemo. Kiel montras Driscoll, Jones et Macrory: « [...] 44% de la lernejoj instruantaj en la KS2 [Key Stage 2: lernantoj aĝantaj inter 7 ĝis 11 jarojn] en Anglio proponas fremdajn lingvojn al siaj lernantoj. 35% de ĉiuj lernejoj dediĉas al ili instrutempon. Tamen, la oferto de fremdaj lingvoj estas malpli vasta ol tio ĉi povus kredi. Nur 3% de la lernejoj proponas al ĉiuj lernantoj de ĉiuj gradoj fremdlingvan kurson de 20 ĝis 30 minutoj, almenaŭ unu fojon semajne. Krome nur 3 el la pridemanditaj lernejoj proponis al ĉiuj lernantoj kursojn de 50 minutoj aŭ pli semajne. La plej ofta daŭro de leciono estis 20 ĝis 30 minutoj, kun mezuma frekvenco de unu fojo semajne. La naturo kaj la kvanto de la ofertoj povas ankaŭ varii laŭ la aĝogrupoj ene de la KS2. La pli aĝaj lernantoj ricevis ĝenerale instruadon pli enfokusigitan kaj pli longedaŭran. 14% el ĉiuj lernejoj respondintaj al la enketo indikis, ke la lernantoj de la sesa jaro [de enlernejigo] havis lecionojn specife dediĉitajn al fremdaj lingvoj. 39% de la instruantoj de baza grado favoris dediĉi pli da tempo al la instruado de fremdaj lingvoj. La horaraj postuloj estis konsiderataj kiel grava faktoro por decidi, ĉu la fremdaj lingvoj envenu en la programon. 27% de la lernejoj, kiuj forigis la fremdajn lingvojn, motivigis tion per manko de tempo.» (Driscoll, Jones et Macrory, 2004: 10, mia traduko).

Surbaze de tiu sama enketo, de la dokumento *Language trends in 2004—KS4* de *National Centre for Languages*⁷⁴ kaj de la ciferoj de Eurydice,⁷⁵ oni povas fari entutan taksadon de la parto de fremdaj lingvoj en la *key stages* 2 (7 ĝis 11-jaraĝuloj) kaj 4 (14 ĝis 16-jaraĝuloj), dum cetere ni scias ke la *key stage* 3 (11 ĝis 14-jaraĝuloj) estas la nura nivelo, sur kiu la instruado de fremdaj lingvoj estas deviga — tamen kun dozado ege varia. Tio ĉi senteble komplikigas la taksadon de la parto je fremdaj lingvoj en la horaroj, eĉ se oni rezignas enkalkuli, ke nur la minimuma nombro da horoj en la horaro estas fiksita en regularo; la konvertado inter horloĝaj horoj kaj instruhoroj estas ankaŭ problema,

74 Fonto: <http://www.cilt.org.uk/key/trends2004survey.pdf>.

75 Fonto: <http://www.eurydice.org/Eurydice/Application/frameset.asp?country=UK&language=VO> .

kvankam mezumo de 50 horloĝaj minutoj je instruoro ŝajnas esti la normo. La informoj de la brita ministerio pri edukado liveras ciferojn pri la entuta elspezo, el kiuj oni deduktas elspezon je lernanto, pri la tuto de la sistemo (KS1 ĝis KS4) de 4 954 eŭroj jare.⁷⁶ Oni povas fari sinoptikan tabelon (tabelo 4), kiu ebligas tre proksimume taksi la penon realigitan en Anglio por la instruado de fremdaj lingvoj. Tamen, por enkalkuli la fakton, ke la nombro da asignitaj horoj plej kredeble estas superaj en Skotlando kaj en Nord-Irlando, kiuj reprezentas kune 11,3% de la enloĝantaro de Unuiĝinta Reĝlando, ni uniforme plialtigis la indicon de la horara parto je fremdaj lingvoj en la horaro per 10%, kio supozigas, ke la skotaj kaj nord-irlandaj lernantoj havas mezume ĉirkaŭ duoblon pli da kursohoroj pri fremdaj lingvoj ol la lernantoj anglaj kaj kimraj. Tiu alĝustigita cifero estas sekve multiplikita per la datenoj pri la kvantoj kaj la elspezoj pri la tuto de Unuiĝinta Reĝlando.

TABELO 4: INSTRUADO DE FREMDAJ LINGVOJ, UNUIĜINTA REĜOLANDO, ELSPEZOJ ENTUTAJ KAJ JE LERNANTO (2002-2003)

| <i>Grupo da lernjaroj</i> | <i>Meza sem. provizo je F.L. (x 60 min.)</i> | <i>Koncer-nitaj lernantoj (%)</i> | <i>Meza kontakto kun F.L. (x 60 min.)</i> | <i>Tempo parto je F.L. (x 60 min.)</i> | <i>Alĝust-igo tuta UR</i> | <i>elsp. / lernanto por F.L. (€), UR $\mu=4954$</i> | <i>Nombro (lineara mez.)</i> | <i>Totala elspezo (€)</i> |
|---------------------------|--|-----------------------------------|---|--|---------------------------|--|------------------------------|---------------------------|
| ANGLIO kaj KIMRIO | | | | | | | | |
| KS1 | 0 | -- | 0 | 0 | 0 | 0 | 1 672 728 | 0 |
| KS2 | 0,5 | 33 | 0,167 | 0,009 | 0,01 | 49,5 | 3 345 456 | 165 600 072 |
| KS3 | 2,25 | 100 | 2,25 | 0,1125 | 0,124 | 614,3 | 2 509 592 | 1 541 642 366 |
| KS4 | 1,5 | 66 | 1 | 0,05 | 0,055 | 272,5 | 1 672 278 | 455 695 755 |
| Totala elspezo | | | | | | | | 2 162 938 193 |

Se oni rilatigas la entutan elspezon de iom pli ol 2 miliardoj da eŭroj al la enloĝantaro de Unuiĝinta Reĝlando, tio rezultigas jaran elspezon je loĝanto de iom pli ol 36 eŭroj (€ 36,25). La kompareblo inter la francaj ciferoj, bazitaj sur la jaro 2003-2004, kun la britaj ciferoj bazitaj sur la jaro 2002-2003, certe ne estas perfekta; tamen oni rajtas akcepti ke, rilate Francion, prenitan ĉi tie kiel referencon, Unuiĝinta Reĝlando ŝparas nuntempe proksimume 100 eŭrojn je enloĝanto jare, pro la simpla fakto de la dominado de la angla. Tio ĉi reprezentas ĉirkaŭ 6 miliardojn da eŭroj jare. La ŝparo por la tuto de la eŭropaj anglalingvanoj eĉ valoras pliajn 400 milionojn da eŭroj, se oni aldonas ĉirkaŭ 4 milionojn da enloĝantoj de la irlanda respubliko.

76 Fonto: http://www.dfes.gov.uk/rsgateway/DB/VOL/v000538/ed_train_final.pdf.

Ni faros ĉi tie la hipotezon, ke kaze de alprenado de la “tutangla” scenaro, la anglalingvaj landoj ne malpliigos plu sian penon pri fremdlingva instruado, dum la aliaj ŝtatoj, inter kiuj Francio estas ĉi tie prenita kiel referenco, ne pliigos sian; maksimume ni akceptos, ke la unua fremdlingvo devige estos la angla (kiel rekomendas la *Raporto de la Komisiono de la nacia debato pri la estonto de la Instrusistemo*), sed ke la financa peno ne estos modifita. Tio estas fortika hipotezo, ĉar la alprenado de la “tutangla” certe kreskigos la premon por la ĝeneraligo de la frutempa eklernado de la angla. Malgraŭ tio, laŭgrade kiom tiu evoluo akompaniĝus de malinteresiĝo pri aliaj fremdlingvoj, ne estas malsaĝe akcepti, por la bezonoj de ĉi-studo, ke la totalo restos neŝanĝita. Oni do konservos kiel (prudentan) takson de la elspezo por la instruado de fremdaj lingvoj en Francio kaj Unuiĝinta Reĝlando, kaze de “tutangla” scenaro, la sumojn de

$$\mathbf{KFL}_1^{\mathbf{F}} = \mathbf{€ 8,235 md}$$

$$\mathbf{KFL}_1^{\mathbf{UR}} = \mathbf{€ 2,163 md}$$

Kio direblas pri la aliaj scenaroj? Denove, la komplekseco de la komparado kondukos nin al kelkaj fortaj simpligoj, inter kiuj la ĉefaj estis prezentitaj supre en ĉi-sekcio, nome koncerne la enkondukon de Esperanto kiel unua fremdlingvo. Oni krome akceptos, ke en la scenaro 2 (multlingvismo) ĉiuj landoj liveras la saman penon por lerni la fremdajn lingvojn. En la scenaro de pura multlingvismo oni konsiderus tion la rezulton de egaleca rangigo de ĉiuj membroŝtatoj. Estas iom alie en la speciala formo de multlingvismo, kiun ni devis elpensi por esti certaj ke la lernado de konvena nombro da fremdaj lingvoj ĉiam garantias la interkompreniĝon: fakte la personoj kun gepatra lingvo angla, franca aŭ germana povos kontentiĝi lerni ununuran fremdlingvon (nepre apartenantan al tiu triopo) por regi, same kiel la aliaj eŭropaj enloĝantoj, du el tri lingvoj de la triopo; tiu kondiĉo garantias rektan interkompreniĝon en ĉiu subgrupo de eŭropanoj hazarde prenitaj, kiu ajn estas ilia nombro kaj iliaj lingvorepertuaroj. Por simpligi ni akceptos, ke la scenaro de multlingvismo supozigas, ke eĉ Unuiĝinta Reĝlando, Irlando, Francio, franclingva Belgio, Luksemburgo, Germanio kaj Aŭstrio instruas du fremdajn lingvojn al siaj loĝantoj laŭ apliko de la modelo « 1+2 », kiun rekomendas Bruselo kaj Strasburgo. Oni do supozos ĉi tie, ke oni studos en tuta Eŭropo almenaŭ du fremdajn lingvojn, ĉie kun la sama grado de efikeco, tio estas kun la sama elspezo je kapo por la sama rezulto. Oni do obtenos (por du fremdaj lingvoj, tio estas ignorante la eblon instrui pliajn):

$$\mathbf{KFL}_2^{\mathbf{F}} = \mathbf{KFL}_2^{\mathbf{UR}} = \mathbf{€ 8,235 md}$$

$$\mathbf{KFL}_3^{\mathbf{F}} = \mathbf{KFL}_3^{\mathbf{UR}} = \mathbf{€ 4,118 md}$$

Okulfrapas, ke eĉ laŭ la tre prudentaj hipotezoj tenataj dum tuta nia rezonado, Francio havus avantaĝon kuraĝigi la scenaron 3, kiu permesus ĝin ŝpari pli ol 4 miliardojn da eŭroj jare; la aliaj eŭropaj landoj ankaŭ ŝparus sed evidente laŭ proporcio, kiu estas funkcio de la nombro de studentoj; dum Unuiĝinta Reĝolando kompreneble ne profitus ajnan avantaĝon, ĉar samnivelegi la nacian lingvon al la franca aŭ germana kostus al ĝi pli ol 6 pliajn miliardojn da eŭroj jare en la hipotezo de la multlingvismo (scenaro 2), kaj proksimume 2 pliajn miliardojn da eŭroj jare en la hipotezo de ĝeneraligita alpreno de Esperanto (scenaro 3).

Produkto de la reinvesto en edukadon

La sumoj tiel ŝparitaj far la anglalingvaj landoj povas esti reinvestitaj aliloke en la klerigadon kaj esploradon; tiu investado produktas iun rendimenton. Sciante, ke la senriskaj investoj produktas mezuman rendimenton de 3 ĝis 5% kaj ke la kosto-profitado analizoj supozigas ĝenerale oportunokostojn de la kapitalo de 10%, oni retenos ĉi tie rendimenton de 7% kiel mezuman valoron. Tiu procentaĵo, aplikita al la ŝparo de 6 miliardoj da eŭroj taksitaj supre, produktas jaran rentumon de ĉirkaŭ 420 milionoj da eŭroj.⁷⁷ Ni nun kapablas kolekti la diversajn elementojn kalkulitajn ĝis nun, por komplete kompari la tri scenarojn.

6.6 Kompara bilanco

Unue, ni faru etan adicon: la tuttotalo de la avantaĝoj, kiujn profitas Unuiĝinta Reĝolando pro la aktuala supereco de la angla estas resumita en tabelo 5:

⁷⁷ Se oni eliras ne el la vidpunkto de publikaj financoj, sed de la entuta ekonomio, oni rajtas aldoni al la ŝparitaj sumoj tiujn, kiuj rezultas el la minimuma peno en la tradukado el kaj al aliaj lingvoj (2,2 miliardoj da eŭroj jare). Ĉiujare, la rentumo tiel produktita, kreskas tiam ĝis 574 milionoj da eŭroj.

TABELO 5: NETAJ JARAJ TRANSDONOJ FAVORE DE Unuiĝinta Reĝolando EN MILIONOJ DA EŬROJ, 2002-2004

| <i>ERO</i> | <i>REKTA SUMO</i> | <i>OBLIGANTA EFIKO^a aŭ LIVERITA RENTUMO</i> |
|--|-------------------|--|
| Privilegiitaj merkatoj | 1.875 | 5.156 ĝis 6.750 |
| Ŝparo de peno por tradukado kaj interpretado | 2.200 | 154 |
| Ŝparo en la instruado de fremdaj lingvoj | 6.000 | 420 |
| Totalo | 10.075 | 5.730 ĝis 7.324 |

^a *Kiam troviĝas du sumoj, la unua rezultas el la apliko de obliganto de 2,75 al la rekte taksata sumo; la dua baziĝas sur la entuta sumo raportita de Phillipson, post alĝustigoj (2003: 77).*

Por menciitaj netajn enspezojn aŭ evititajn elspezojn (« Rekta sumo » en tabelo 5), la aktuala supereco de la angla enspezigas pli ol 10 miliardojn da eŭroj jare al Unuiĝinta Reĝolando.

Aliflanke, oni ankaŭ povus baziĝi, por la taksado de privilegiitaj merkatoj, ne sur la rekta sumo de elspezoj taksitaj surbaze de la informoj de British Council, sed sur la oficiala taksado de la brita registaro (tio estas ĉirkaŭ 13 miliardoj da eŭroj komence de la jaroj 2000, kio reprezentus sendube pli ol 15 miliardojn da eŭroj nuntempe, sed kiujn ni proponis taksi tre prudente je 6,75 miliardoj da eŭroj por la *privilegiitaj* merkatoj en kunteksto specife eŭropa). Por plene enkalkuli la avantaĝojn, kiujn Unuiĝinta Reĝolando profitas pro tiu situacio, oni rajtas krome memori, ke la sumoj ŝparitaj en la komunikado kaj en la instruado de fremdaj lingvoj produktas formon de jara rentumo de ĉirkaŭ 574 milionoj da eŭroj. Tiukaze la totala sumo de la valoro, kiun la supereco de la angla nuntempe reprezentas por Unuiĝinta Reĝolando, estas ĉirkaŭ 17,399 miliardoj da eŭroj. Ankaŭ en tio la taksado restas bazita sur prudenta uzado de la disponeblaj informoj.

Oni do rajtas rezoni pri sumoj inter 10 ĝis 17 miliardoj da eŭroj jare, laŭ tio, ĉu oni enkalkulas jes aŭ ne la obligantajn efikojn kaj la rendimentojn de la sumoj, kiujn la plej grava anglalingva lando de Eŭropo povas nuntempe ŝpari. Kompare, la buĝeto de la centra brita registaro atingis en 2003-2004 ĉirkaŭ 400 miliardojn da pundoj ⁷⁸, tio estas ĉirkaŭ 584 miliardoj

78 Fonto: <http://www.statistics.gov.uk/pdfdir/psa0604.pdf>.

da eŭroj. Koncerne la nominala brita MEP, ĝi atingis en 2004 ĉirkaŭ 1710 miliardojn da eŭroj⁷⁹; ĉirkaŭ 1% de tiu totalo estas do imputebla al la aktuala domino de la angla.

Ni memorigu, ke tiuj proksimumaj valoroj devas esti komprenataj malinkluzive de ĉiuj simbolaj efikoj, de efikoj kiuj akompanas la disvastigadon de kulturaj varoj kaj servoj en la angla lingvo, kaj de la privilegiita pozicio, el kiu profitas la denaskaj angleparolantoj dum negocaj kaj konfliktaĵaj situacioj, kio neeviteble estas origino de aliaj financaj profitoj. Tiu fakta stato estas financata de la aliaj ŝtatoj, nome eŭropaj (ni memorigu, ke oni provis en la antaŭaj paĝoj enkalkuli nur la fluojn, kiuj aperas en la kunteksto de eŭropinternaj interŝanĝoj), kiuj krome konsentas por tio duobligi siajn naciajn fakturojn por la instruado de fremdaj lingvoj.

La lingva hegemonio estas do, sen ajna ebla dubo, eksterordinare maljusta. Ni memorigu denove, ke ne estas la angla lingvo mem, kiu estas kulpigita, sed jes la lingva hegemonio kiel funkcionmaniero, kia ajn la lingvo kiu profitas ĝin. Estus do strange deziri ĝin plifortigi, kiel sugestas ĉiuj, kiuj proponas atribui al unu nacia lingvo (la angla aŭ alia) tiuspecan statuson. Sinteza tabelo (tabelo 6) ebligas rapide kompari la diversajn elektojn. En tiu tabelo, ni enkalkulas nur la kolumnon de la “rektaj sumoj” de tabelo 5.

79 Fonto: http://epp.eurostat.ec.eu.int/portal/page?_pageid=1996,39140985&_dad=portal&_schema=PORTAL&screen=detailref&language=fr&product=Yearlies_new_economy&root=Yearlies_new_economy/B/B1/B11/daa10000

TABELO 6: KOMPARO INTER TRI SCENARIOJ

(Sumoj en milionoj da eŭroj superen rondigitaj)

| CENARO KAJ LINGVA SITUACIO | ĜENERALAJ PROPRAĴOJ | INSTRUENDAJ FREMDLINGVOJ | INSTRU-ELSPEZOJ por FL | TRANSPAGOJ AL LA LANDO DE HEGEMONIA LINGVO |
|---|---|---|-----------------------------------|---|
| Scenaro 1: “tutangla” | Interlingva komunikado esence en la angla; malegalrajteco favore al la denaskaj parolantoj de tiu lingvo; kreskantaj riskoj je longedaŭra erodado de lingva kaj kultura diverseco. | 1e FL: angla 2e FL: Ĉiu alia lingvo | 8 235 | 10.075 |
| Scenaro 2: «Multlingvismo» | Interlingva komunikado en diversaj eŭropaj lingvoj, gravitanta al malgranda nombro da «grandaj» lingvoj, nome la tri privilegiitaj lingvoj (per hipotezo angla-franca-germana); lingva kaj kultura diverseco pli firma, sed risko de malstabileco necesiganta striktajn aranĝojn por favorigi la komunikadajn kuntekstojn de nedominaj lingvoj, precipe de lingvoj aliaj ol la angla. | 1a FL (por Francio): angla aŭ germana * 2a FL (por Francio): iu ajna * <i>Rim. 1: Unu el la du FL devus esti lingvo latinida</i> <i>Rim. 2: Kadre de tiu instruado, disvolvi ricevan kompetenton en la aliaj latinidaj lingvoj</i> | 8.235 | neglektebla |
| Scenaro 3: «Esperanto» | Interlingva komunikado esence en Esperanto; egalrajteco kvazaŭ kompleta inter parolantoj de ajna gepatra lingvo. | 1a FL: Esperanto 2a FL: iu ajna | 4.118 | 0 |

*: por la landoj, kies la plimulto de enloĝantoj havas nek la anglan, nek la francan, nek la germanan kiel gepatran lingvon, la unua kaj la dua fremdaj lingvoj instruataj devus, por prizorgi ke la scenaro 2 certigas la interkompreniĝon samgrade kiel la du aliaj scenaroj, veni el la triopo angla-franca-germana.

Kelkaj rimarkoj povas helpi al la interpretado de tiu tabelo.

◇ La neta avantaĝo de la scenaro Esperanta ne surprizu, ĉar ĝi respegulas samtempe la efikecon de tiu lingvo kaj ĝian senkomparan justecon. *La enkalkulo de justeco* en la klasifiko de la scenaroj devus do rezultigi la retenon de la scenaroj 2 aŭ 3. Fakte, se oni sekvas la Rawlsan principon de diferenco sub rezervo de certa garantio de efikeco, oni vidas, ke scenaro 1 neniel kontentigas tiun ĉi.

◇ *La konsidero de nekomercaj valoroj* rezultigus plifortiĝon de la allogo de scenaro 2, ĉar tiu ĉi favoras la ĉiutagan videblecon de lingvaj kaj kulturaj diversecoj; kontraŭe, ĝi pli elmontrus la mankojn de scenaro 1, ĉar ĝuste tiu okazigas la plej grandajn riskojn pri unuformeco.

◇ La eksplicita kaj aparta konsiderado de simbolaj dimensioj, ligitaj al la historia kaj politika fundamentoj de la eŭropaj kulturoj (laŭgrade kiom tiaj dimensioj ne estus inkluzivigitaj en la nekomercaj valoroj), plifortigas tiujn konkludojn.

◇ La sumoj ĉi tie kalkulitaj rilatas al kalendara jaro; ili adiciiĝas jaron post jaro kaj plifortigas dinamikon pli kaj pli malfacile inversigeblan en kiu tiuj sumoj mem pezos pli kaj pli grave.

Se pruvigis ke la scenaro «tutangla» estas la plej kosta kaj la malplej justa el la tri, kiel do eblas, ke ĝi daŭre ricevas tian subtenon? Kiel klarigi, ke alternativo preferebla el vidpunkto de efikeco kaj justeco estas neniam serioze konsiderata? Kiujn orientiĝojn ni povas konsideri je proksima kaj malproksima estonto, konsiderante la ĝis nun akiritajn rezultojn? Tiaj estas la demandoj, kiujn ekstraktas la sepa kaj lasta ĉapitroj.

Ĉapitro 7:

Kiuj strategioj?

7.1 Longatempa strategio.

La scenaro 1 (« tutangla ») prezentas gravajn riskojn de uniformigado kaj ne povos eviti la malpromocion de la franca lingvo kaj de la aliaj lingvoj de Eŭropo, escepte de la angla.

La scenaro 2 (« multlingvismo ») estas apogata — almenaŭ je la nivelo de la ĝeneralaj principoj kaj en multe nebula versio — de la tuta diskursaro de la eŭropaj oficialuloj. Tamen, krom tio ke la diskursoj ŝajne apenaŭ kongruas kun la faktoj, tiu scenaro estas nur kredinda se ĝi inkluzivas serion de dispozicioj kiuj normigas sufiĉe strikte la komunikajn kuntekstojn. Tio supozigas subtilan inĝenierarton, ĉar la scenaro nur povas funkcii se ĝi kapablas inversigi por sia propra profito, la duoblan logikon de uzebleco kaj de minimaksigo (aŭ almenaŭ kapablas *nuligi* tiujn fortojn en la kunteksto, kiam ili avantaĝus la anglan); la klopodo estas des pli delikata, ju pli la dispozicioj necesaj al la sukceso de la dua scenaro povas esti rigardataj kiel artefaritaj kaj devigaj.

Do ne estas dubeble ke la scenaro 3 estas la plej bona solvo, el ĝenerala analiza vidpunkto, pro la antaŭaj taksaĵoj, kaj eĉ pli se oni konsideras la rolon de la historiaj kaj simbolaj dimensioj, kiujn ĝi ne inkluzivas.

Kelkaj verkoj provas ekzameni, ofte per tre teknikaj esplormanieroj, kiuj baziĝas sur la teorio de la raciaj elekteblecoj, kial tia evidenteco ankoraŭ ne estas efektivigita en la edukpolitikoj (Pool, 1991b ; Selten kaj Pool, 1997 ; Güth, Strobel kaj Wickström, s.i.d.), malgraŭ ĝia trafeco je la niveloj pedagogiaj (Piron, 1994) kaj financaj (Haszpra, 2003) aŭ plie, je nivelo de humanisma pripensado (Mullarney, 1999). Oni povas serĉi psikologiajn klarigojn (Piron, 1994) aŭ historiajn (Forster, 1982 ; Ministerio pri publika edukado [Italio], 1995). Fettes (1991) kombinas plurajn nivelojn de analizad en rimarkinde nuancita teksto.

La ekzamenado de tiuj ampleksaj demandoj prenis tro da tempo. Surbaze de esplormaniero de la speco de « politikanalizo » uzita en la antaŭaj ĉapitroj, kies konkludoj iras en la saman direkton kiel en la citita literaturo, mi kontentiĝos skizi strategion pri lingvinstruado, kiu postulus longan tempon, tio estas, minimume unu generacion. En la dua paragrafo, mi provos skizi strategion mallongedaŭran. La distingo inter la du estas plej grava. Efektive, ĉiu propono uzi Esperanton estas tuj flankenmetata, ofte sen ajna pravigo; estus do tute vane provi efektiviĝi ĝin rapide.

La efektivigo de scenaro 3 estas nur konsiderebla je tri kondiĉoj. La unua dependas de la provizado de rimedoj kaj ne kaŭzas apartajn problemojn; la du aliaj estas pli malfacilaj, sed kiel ni vidis, la amplekseco de la financaj kaj simbolaj interesoj rilatas al la malfacileco de la defioj.

Klerigado kaj dungado de instruistoj.

Ni nur supraĵe pritraktos la demandon de klerigado de instruistoj. Se la scenaro estas elpensita por efektiviĝi ene de unu generacio, oni havas pli ol sufiĉe da tempo por klerigi la bezonatajn instruistojn. Pri tio, mi nur citos Haszpra, sciante ke la temo eventuale meritos multe pli detalan pritrakton: « [la Esperanto-instruistoj] *povas rapide esti klerigitaj el la nuna nombro da [lingvo]instruistoj. Lingvoinstruistoj jam disponas pri kompetenteco supera al la meza por lerni lingvojn, kaj ili jam estis klerigitaj pri la metodiko de lingvoinstruado. Evidentas ke ducenthora kurso estas por ili pli ol sufiĉa por akiri la kapablon ekinstrui ĝin [...]. La eksperimentoj faritaj en Orienta Eŭropo, post la politikaj ŝanĝoj ĉirkaŭ 1990, montris ke multaj instruistoj pri la rusa lernis alian lingvon kaj, post relative mallonga tempo, kapablis instrui la anglan, la germanan aŭ la francan je la postulita nivelo. Krome, unu instruisto povas instrui Esperanton al dekoble pli da lernantoj, ĉar la necesa lernotempo estas dekono de alia lingvo. [oni retrovas ĉi tie la kvocienton 1:10 menciitan en la antaŭa ĉapitro —FG]. Oni povas aserti la samon pri la instruado de Esperanto al plenkreskuloj, kiuj ja povus dediĉi la necesan tempon por lerni Esperanton, dum ili nur pene povus trovi sufiĉe da tempo por lerni naturan lingvon » (2003 : 6 ; mia traduko).*

Eĉ sen tute fidi tiun faman kvocion de unu al dek, estas probable ke la klerigado de instruistoj ne obstaklas la trian scenaron. Ni do transiru al la du aliaj kondiĉoj, klare pli malfacile plenumblaj.

Informado kaj evoluo de mensostatoj.

La dua kondiĉo estas sukcesi venki la disvastigitajn antaŭjuĝojn. Tio postulas grandan informkampanjon (al la publiko, al la politikistoj, al la amaskomunikiloj, al la decidantoj de la privata sektoro) kaj grandan intelektan flekseblecon, por evoluigi la mensostatojn (tre probable ĉe la samaj personoj). Por tio sendube necesas lukti kontraŭ multaj antaŭjuĝoj — sed kiel diras Pool: « la lingvo estas kampo, kie tiom la fakuloj kiom la laikoj ŝajnas havi la samajn kredojn eksterordinare rigidajn » (Pool, 1991a : 7 ; mia traduko). Eble necesas malkovri la movajn fortojn malantaŭ speco de *lingva mensperturbo*, jam de longe identigita de Gobard (1976). Nu, por proponi politikon pri mastrumado de diverseco, kiu atribuas al Esperanto centran rolon, ne necesas referenci al la nocio de imperiismo (kiel faras Bernard Cassen en *le Monde Diplomatique* de Januaro 2005). Eĉ se la uzo de tiu koncepto povas prezenti la lingvan makrodinamikon kaj certajn ĝiajn instituciajn mekanismojn en tre interesan taglumon (kiel montras Phillipson, 1992), ĝi estas supeflua, ĉar por alveni al rekomendo de la tria scenaro, sufiĉas fari kelkajn kostotaksadojn, kiel ni ĵus faris. La konsidero de egalrajteco povas nur firmigi tiun konkludon. Tamen, eble ne estas malutile pripensi pri la fascino kaŭzita de povo, kaj relegi la *Diskurson pri volontula sklaveco* de Étienne de La Boétie (1530-1563).

Tiu fundamenta laboro pri informado kaj mensostatoj povas apogi sin sur la faktoj kaj sur la ciferoj raportitaj en ĉi tiu studo kaj en la literaturo al kiu ĝi referencas. Tamen restas farenda granda laboro de analizado kaj de pritraktado de faktoj. Ni ne bezonas priatenti nun certajn kutimajn objektojn, kiuj estis sufiĉe refutitaj aliloke (Fettes, 1991 ; Piron, 1994 ; Grin, 2004c); tamen, je mia kono, oni ankoraŭ ne disponas argumentaron pri la investoj jam faritaj, ne nur por la pasinta lernado, sed ankaŭ por la dokumentoj (en la angla) jam konservitaj en diversaj formoj. Efektive, la rebato foje aŭdata estas ke la tuta investaĵo ĝis nun farita, riskas esti perdita.

Ne estas aparte malfacile refuti tiun objekton, eĉ nur per simpla uzo de certaj analogioj: ĉu oni estus devinta, pretekste de la kostoj, rezigni pri la metrika sistemo (kiel en Usono, kie oni ankoraŭ uzas la mezursistemon nomitan - mi ne fantazias - «imperial»)? Ĉu la transiro al la eŭro devus esti rifuzita pro la establita kutimoj de konsumantoj kaj entreprenoj aŭ pro la kontolibroj tenitaj en la respektivaj naciaj valutoj? Ĉu oni estus devinta rezigni pri komputiloj, ĉar la skribmaŝinoj fariĝos neutilaj? Efektive, ĉiu novaĵo, ĉiu ŝanĝo implicas nerepageblajn kostojn, "sunk costs". Sekve, por efektivi la longedaŭran scenaron 3, necesus provizi tradukojn de dokumentoj el la angla al Esperanto. Tio cetere ne estas bezono

kiu aperus frue: ĝi akiros veran gravecon nur ekde la momento kiam unu generacio kiu studis, kiel fremdan lingvon, Esperanton kaj alian lingvon (ne devige la anglan), alvenos sur la labormerkato. Simile oni devas antaŭvidi transiran periodon dum kiu personoj kiuj lernis la anglan kiel unuan aŭ duan fremdan lingvon, devus profiti pri aparta subteno por lerni Esperanton. Konsidere la lerneblon de tiu lingvo, la investo necesa al la regado de Esperanto, almenaŭ je la sama nivelo aŭ pli ol je kiu ili nun regas la anglan, estus modesta.

Tiu evoluo de mensostatoj ne estas imaginebla se ĝi ne baziĝas sur subtila kompreno de la procezoj de individua kaj kolektiva perceptado de la agantoj, interalie kiam tiu okazas en la kampoj de socirilata diverseco kaj de individua plurlingveco. Tial necesas komenci fundan pripensadon pri tio. Oni povas por tio eliri de la nova teorio pri sociaj ŝanĝoj, teorio konstruita ĉirkaŭ Touraine kaj Wiewiorka, kaj apogi sin sur la koncepto de «moNdernigo» (Rossiaud, 1997) jam prezentita en la unua ĉapitro. Je mia kono, tiu pripensado ne estas jam farita rilate al la sociaj preferoj de lingvaj ĉirkaŭaĵoj, sed ĝi necesas por ke individuoj povos lanĉi sin en la scenaron 3 kaj por ke malvolviĝas situacioj, en kiuj la principo de minimaksigo favoras al Esperanto.

Kunordigado.

La problemo kompreneble ankaŭ dependas de la kunordigado je eŭropa nivelo kaj plu specife inter la membroŝtatoj. Ili restas suverenaj sur la tereno de edukado kaj ili restos tiaj ankoraŭ longe. Do la sekva problemo estas solvenda je la nivelo de kunordigado inter ŝtatoj.⁸⁰

En la foresto de interŝtata kunordigado, ĉiu ŝtato inklinas alpreni edukadan politikon, kiu laŭ espero favoros la ekonomian sukceson de ĝiaj civitanoj kaj eĉ donos konkurencon avantaĝon sur la vasta eŭropa merkato.

Sekve, se ŝtato riskus sin sola en la trian scenaron, la rezultoj estus katastrofaj por ĝi, eĉ se la publika opinio grandparte estus transkonvinkita al tio; ili resumiĝus al izolado de la lando kaj de ĝiaj enloĝantoj for de la cetero de Eŭropo kaj tio pruviĝus vana investado pri lingvaj kompetentoj sen ajna komerca valoro. La civitanoj de aliaj ŝtatoj, kiuj daŭrigus prioritare instrui la anglan, vidus, aliaj kondiĉoj restante egalaj/sub cetere egalaj kondiĉoj, la rendimenton de iliaj kompetentoj pri la angla, kreski. Ni vidis en paragrafo 3.4, ke tiu avantaĝo eble estas kondamnita al erodado, sed ankoraŭ neniu maltrankviliĝas pro tio;

80 Eble laŭ la sama logiko kiel la *interkantonaj konkordatoj*, kiuj reguligas en Svislando certajn aspektojn de la edukada politiko.

ĉiukaze, ene de mallonga tempolimo, la alpreno de la tria scenaro fare de ununura ŝtato instigus ĉiun alian daŭrigi la instruadon de la angla.

Kontraŭe, ĉio ŝanĝiĝas se la ŝtatoj ekpensas kunagadon pro sia komuna profito kaj se la plumulto de la landoj kune decidas alpreni la trian scenaron. En tempodaŭro de unu generacio, maljustaj transpagoj de miliardoj da eŭroj povos malaperi kaj neta ŝparaĵo de ĉirkaŭ 25 miliardoj da eŭroj jare estas ebla por la tuto de Eŭropa Unio. Kiel komparo, la totalo de la buĝetigitaj elspezoj por 2005 fare de Eŭropa Unio sumas je 116,55 miliardoj da eŭroj.

Oni malbone komprenas el kia logiko 23 el la 25 ŝtatemembroj devus regaladi la du aliajn per donaco kiu kostas al ili, nur je la nivelo de la eduksistemo, la « bagatelon » de 26,7 miliardoj da eŭroj jare, des pli ke tiu masiva investo lasas la plimulton de la eŭropaj civitanoj en situacio de subuloj. Pro intereso tiom evidente komuna, kiu krome perfekte kongruas kun la postuloj de socia justeco, la saĝeco devus konduki la ŝtatojn interkonsenti pri progresiva kaj kunordigita efektivigo de la scenaro 3.

Memkompreneble, tiu kunordigado inter ŝtatoj ne devas prikonsideri nur la edukpolitikon; ĝi devas ankaŭ zorgi pri la disvastigo de informado kaj evoluigo de la mensostatatoj.

7.2 Mallongtempa strategio.

En la proksima tempo, tamen la scenaro 3 ne estas antaŭvidebla; eĉ la nura anonco ke tia scenaro devus esti konsiderata en la limo de dudek aŭ dudek kvin jaroj, estus ridigita de grandaj partoj de

81 Tiu sumo estas kalkulita jene, per eksterpolado de la elspezo je loĝanto en Francio, kiu nun estas 137 € jare.

Ni vidis ke la akcepto de la tria scenaro permesas duonigi tiun kvanton kaj malaltigi ĝin al 68,50 €, rondigita al 68 ĉi tie. Tiu nombro (kiu, laŭ la nuntempa kvanto de disponigitaj horoj en Francio, financus la lernadon de du fremdaj lingvoj), validas por 86% de la enloĝantoj de la EU de 25 kiuj vivas en lando, kies ĉefa lingvo ne estas la angla (vidu Aldonon A1). Aliflanke, la lerneja sistemo kiu utilas al la 14% de la eŭropanoj, kiuj vivas en tiuj du landoj, devus lerni Esperanton. Ni supozu ke Unuiĝinta Reĝolando kaj Irlando ankaŭ alprenas la lernejan sistemon kun du fremdaj lingvoj (Esperanto kaj alia lingvo); kompare al la nuna elspezo per loĝanto en Unuiĝinta Reĝolando (kiun ni supozos ankaŭ valida por Irlando), kiu sumas je 36 € jare je loĝanto, tio supozas plialtiĝon de 32 €. Kun loĝantaro de 457 milionoj en la EU de 25, oni kalkulas jene: $457 \times [(68 \times 0,86) - (32 \times 0,14)] = 457 \times 54 = 24,678$ € miliardoj.

Notindas ke oni ne disponas je informoj pri la proporcio de personoj kiuj, en la EU de 25 uzas la anglan kiel gepatran lingvon (sendepende de la lando kie ili rezidas). Por la EU de 15, la esploro "Eŭrobarometro n° 54" citas la ciferon de 17,2%.

82 Fonto: <http://www.info-europe.fr/document.dir/fich.dir/QR001028.htm> .

83 Tiu sumo estas kalkulita jene: $0,86 \times 457 \times 68 = € 26,725$ miliardoj.

publiko, ĉar tiom forta estas la kredo, ke ekzistas neniu alternativo al la hegemonio de la angla. Ĉiu forgesis ke multaj ŝtatoj subtenis, je la epoko de la Ligo de Nacioj, la alprenon de Esperanto kiel internacia lingvo, aŭ ke la plenkunsidoj de UNESKO adoptis, en 1954 kaj en 1985, rezoluciojn favore al Esperanto.

Se la scenaro 3 ne estas senprokraste efektivebla, tamen estus danĝere kontentiĝi pri la scenaro 1 aŭ 2, pro la kreskanta malfacileco retromovi la mekanikon; efektive, multaj observantoj, inter kiuj van Parijs (2001b, 2004a, 2004b) opinias ke la procezo favore al la angla jam ne estas retmovebla. Tio estas plia motivo por subteni, je mallonga aŭ mezlonga tempolimo, la scenaron 2, tiun de multlingvismo. Ĉiuj intencdeklaroj de la eŭropaj institucioj iras tiun direkton; necesas do plufirmigi ilin.

Tio postulas multe pli ol kion proponas la *Agoplano* (Eŭropa Komisiono, 2004). La aspekto «instruado de fremdaj lingvoj» estas nur la plej klara parto kaj pro tio eĉ ne temos pri ĝi sekve. Plej grave, por ke la instruado de aliaj lingvoj ol la angla ne estu simpla alibio kaj ke la kompetentoj pri aliaj lingvoj ricevu decan monkompenson, necesas laŭeble krei instituciajn kuntekstojn, en kiuj aliaj lingvoj ol la angla estu la finatingo de la procezo de minimaksigo.

Efektive, estas esence kompreni, ke la nura lernado de pluraj lingvoj fare de la eŭropaj civitanoj ne sufiĉas por garantii, je la meze longa aŭ longa templimo, veran multlingvan interagadon, kaj do la diversecon de la lingva komunikado en Eŭropo. Sekve tiaj akompanaj dispozicioj nepre necesas.

Ne eblas ĉi tie difini ĉiujn dispoziciojn, kiuj povus esti alprenitaj tiucele, ĉar ili devas konformi al la kadro de kohera kaj strukturita lingvopolitiko. Ni tamen povas hipotezi ke tiuj dispozicioj devus interalie inkluzivi:

- 1) la ĝeneralan defendon de multlingvismo en ĉiu eŭropa institucio, kaj en maksimuma nombro da situacioj;
- 2) la postulon, por la dungitoj en tiuj institucioj, interalie ekde certa hierarkia rango, de atestita trilingveco, dum dulingveco ne rajtigus ajnan premion aŭ apartan avantaĝon;

84 Tiutempe (septembro 1922) la dosiero estis blokita de Francio. Léon Béard, tiam Ministro pri nacia edukado, eĉ malpermesis « en ĉiuj francaj lernejoj, la instruadon kaj propagadon pri Esperanto, kiel danĝera vehiklo de internaciismo kaj kiel konkurento de la rolo de la franca lingvo en la mondo » (Ministero della Pubblica Istruzione [Italio], 1995).

-
- 3) la malpermeson de ajna devojiĝo en la politiko pri dungitoj en la eŭropaj institucioj, speciale de dungofertoj kiuj postulas la anglan kiel gepatran lingvon;
 - 4) la difinon, kadre de la funkciado de tiuj institucioj, de areoj en kiuj oni malpermesas la uzon de la plej dominaj lingvoj, se komenci per la angla, sed foje ankaŭ de la franca kaj de la germana. Tio povas sugesti la uzadon de la sudafrika rotacisistemo, aŭ la difinon, por la diversaj ĝeneralaj direktoj de Eŭropa Komisiono, de interna komunikada sistemo en tri lingvoj, en tia maniero ke neniu el la tri ĉiam ĉeestas en ĉiu situacio: alivorte, ke la parolantoj de la favorataj lingvoj, kaj ĉefe de la plej favorata el ĉiuj, la angla, estu konfrontataj al situacioj kiam ili *devas* uzi aliajn lingvojn, dum la personoj kiuj ne denaske regas la anglan, francan aŭ germanan estu konfrontataj al situacioj kiam ne eblas ĉiam kontentiĝi pri la uzo de la sama triopo. Tio povus konkretiĝi per la difino de N-opo de «lingvaj reĝimoj». Tiu speco de aranĝo povas surprizi. Tamen, la leganto povas facile kontroli, ke manke de tiaj dispozicioj, estos malfacile preventi, ke la efektivigo, tute natura, de la principo de minimaksigo, kondukos al lingva hegemonio — evidente, favore al la angla.
 - 5) la disvastigadon de informoj kaj la konsciigadon de la publiko kaj de la medioj pri la problemo de lingva justeco, por komprenigi la neceson de tiaj intervenoj;
 - 6) la kuraĝigon de internaciaj interŝanĝoj de lernantoj kaj studentoj, ne konfuze (kio ĝenerale kondukas al progreso de la angla — kiel skribas De Swaan (2002) : « the more languages, the more English » [NdIT], sed direktite al aliaj lingvoj ol la angla, kaj, kiom eblas, en la kadro de partnerecoj inter membroŝtatoj;
 - 7) absolute neŝanceligeblan konduton de la ŝtatoj rilate ilian superan rajton alpreni dispoziciojn pri la lingvo uzita por la etikedado de produktoj, dispozicioj kiuj devas havi prioritaton je la principo de libera cirkulado de varoj kaj servoj inter la membroŝtatoj;
 - 8) la kuraĝigon de egaleca videblo de ĉiuj eŭropaj lingvoj, dum skriba aŭ voĉa komunikado de administracioj kaj entreprenoj;

85 Vidu *English mother tongue only... 1000 European jobs for English native speakers*, <http://lingvo.org/zz/2/15>. Tiu praktiko ĉesis post multaj protestoj, inkluzive en la eŭropa Parlamento (vidu la skriban demandon E-4100/00 de parlamentano Bart Staes, 10 Januaro 2001). NdIT: ju pli da lingvoj, des pli da angla.

9) la konservadon de sukcesaj servoj de tradukado kaj interpretado, ĉar eĉ je la hipotezo de ĝenerala prioritato donita al tri lingvoj (ekzemple, la angla, la germana kaj la franca), tuta reciproka kompreno ne estas sisteme garantiita, kaj devas esti kompletigita per tre larĝa oferto de tradukado kaj interpretado, almenaŭ inter la lingvoj kiuj profitas de tiu prioritato; tio referencas al la sistemo nomita « oligarkia » en la aldono 2.

La scenaro 2 ne maldevigas nin, eĉ tute male, eklabori pri kunordigado inter membroŝtatoj, kaj fundamente analizi la valoron kaj la identigajn funkciojn de la individua plurlingvismo en la ĉiutaga vivo kaj en la planoj de individuoj.

Se la alprenado de tiaj dispozicioj, en la kadro de la dua scenaro, kondukas al stabila eŭropa lingva medio vere multlingva, ĝi povas esti konservita dum longa periodo kaj la scenaro 3 ne plu devas esti konsiderata kiel necesa. Eble la scenaro 2 estas pli multekosta, ĉu rilate edukadajn aranĝojn, ĉu rilate akompanajn dispoziciojn, kiuj ne limiĝas al la oferto de tradukado kaj interpretado.

